88/4. • 16,– Ft

HUNGARA VIVO

Hódmezővásárhely
fabriko de Modaj Trikotajoj

HÓDMEZŐVÁSÁRHELYI
HÓDIKÖT
DIVAT KÖTÖTTÁRUGYÁR

liveras al pli ol
20 landoj
trikitaju - kroĉetitajn
vestoju virajn kaj virinajn

HUNGARA VIVO

ENHAVO

Fenyvesi, Ervin: Intima kaj labora 122
Benczik, V.: Kroniko de dek sep tagoj 124
Bakonyvári, Á. M.: La fotoartisto Zoltán Fejér (*E. Fenyvesi*) 128
Révész, S.: Faktoj, timoj kaj esperoj pri Hungario 7. 130
Rezulto de la Belartaj Konkursoj 133
Ungar, K.: Preludo kaj fugo 133
Nervi, M.: En mansardo 134
Nervi, M.: Ŝi diris, ke... 134
Ertl, I.: Raporto de Tezeo... 134
Johansson, S.: Renkontiĝo kun boaco 135
Sekelj, T.: Facilanima virino 136
Panoramo 138
Ne nur florojn, ankaŭ legomojn en la ĝardenojn! (*E. Fenyvesi*) 139
Fenyvesi, Ervin: Revuo de revuoj 145
Golden, B.: Se Zamenhof estintus presisto anstataŭ okulisto... 146
Benczik, V.: Ĉu saturiĝis la Sovetia merkato de Esperantaj libroj? 153
Recenzoj 154
Fenyvesi, Ervin: Gaja paĝo 158
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 159
Korespondi deziras, Leterkesto 160

Sur la frontpaĝo: la bela floro digitalo.
(Artikolon vd. sur la paĝoj 139-42)

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso:
Budapest, I. Szentháromság tér 1-3.
Telefono: 563-659, 564-093
Poŝta adreso:
Pf. 193, H-1368 Budapest
Aperas dumonate
XXVIIa jaro, 1988 n-ro 4
(140)

Pato



Finiĝis mia artikolserio pri la timoj, faktoj kaj esperoj. Pasis la jaro inter ĝiaj elverkiĝo kaj publikiĝo. Stranga kaj grava en la fina periodo de la Mez-orient-Eŭropa poststalinismo. La „elasta", „reviziisma" stalinismo fosis sian tombon. La breĉetojn enradikiĝis elementoj de la entreprena aktiveco, de la aŭtonoma intelekta-kultura agado, kaj post jardekoj de la lanta reburĝiĝo la socioj de Pollando, Hungario kaj Jugoslavio iĝis ne plu direkteblaj per la poststalinismaj institucioj kaj politika mekanismo, dum la civila, de-suba organiziĝo de la „nova mez-klaso" ankoraŭ ne sufiĉas por atingi la instituciajn rimedojn de la soci-gvidado.

En tiu pata situacio karuselas suben la koncernaj socioj en krizon kaj anarkion. La kurac-projektoj, reform-projektoj unu post la aliaj fiaskas, ĉar ne ekzistas efektiviga forto, sufiĉa venki la kontraŭfortojn. La fortoj servas nur por estingi unu la aliajn.

Hungario fariĝis ŝtorma politika batalkampo. Fondiĝis kaj plu fondiĝas alternativaj politikaj organizaĵoj: Hungara Demokrata Forumo, Ligo de Junaj Demokratoj, Reto de Liberaj Iniciatoj, Nova Marta Fronto, Fronto de Szárszó (ĉi du lastaj nomoj aludas progresemajn, opoziciajn movadojn de la 30-aj, 40-aj jaroj) ktp. Okazadas (la unuan fojon depost la ribelo de 1956) manifestacioj kun plur-dekmila partoprenantaro; 10-15 mil manifestaciantoj pledis la 15-an de marto por demokratio kaj homaj rajtoj; la 27-an de junio 60-80 mil homoj protestis kontraŭ detruado de vilaĝoj en Transilvanio; plurajn manifestaciojn kaj kunvenojn oni aranĝis por haltigi la konstruadon de akvocentralo ĉe Danubkurbo (la lastan partoprenis 25-30 mil homoj) ktp. Formuliĝas tunoj da amase subskribitaj peticioj, rezolucioj, deklaroj, publikaj leteroj. Multiĝas lokaj protestadoj pro medio-protektaj aferoj, pledoj por memstariĝo de pli frue kunligitaj vilaĝoj, kontraŭ lokigo de danĝeraj establaĵoj. Ekfunkciis aparta sindikato (tiu de la sciencaj laboruloj) kaj organiziĝas aliaj; eksplodis (ja, mallongaj, lokaj kaj ĝentilaj) strikoj, kaj protestmarŝis la vinber-produktantoj.

La parti-konferenco en majo forigis el la gvidaj postenoj parton de la konservativuloj, kaj en la gvidado formiĝis malstabila koalicio de tiuj, kiuj volas simple senbalastigi, raciigi kaj per funkciantaj produkto-motivoj ekipi la sistemon, kaj de tiuj, kiuj volas desube organiziĝantan, demokratian socialismon, t.e. subordigi la politikajn instancojn al la popola suvereneco.

La tension de la politikaj bataloj altigas la abrupta falo de la vivnivelo, la minacanta inflacio kaj la perspektiva senlaboreco. La registaro, sen trovi eliron el la politika pato, hezit-aplombe nutras la socion per ekonomi-kuracaj piloloj, sed tiuj ĝis nun postlasas neniun efikon, nur amaron kaj seniluziiĝon.

INTIMA *kaj* LABORA

Kongreso en Roterdamo, hejmurbo de la jubileanta UEA

Se pasintjare nia revuo en simila raportaĵo iom rezigneme menciis pri la foireca karaktero de niaj kongresoj – pro la ŝajne ne eviteblaj bezonoj de nia multlanda popolo –, ĉi-jare en la mirinde bunta kaj pitoreska Roterdamo oni spertis la malon: la intimecon de la 73a Universala Kongreso. Dum la lasta semajno de julio regis agrabla apudmara vetero, kaj tre eblas, ke ankaŭ tio kontribuis al la vere familia atmosfero, kiu ŝvebis en la urbocentra ampleksa kongresejo. Moderna palaco, konstruita ĝuste tiucele, por akcepti grandajn kongresojn, kia montriĝis ankaŭ nia UK: multfaka kaj multfaceta. 2320 kongresanoj plenigis la grandiozan Zamenhof-salonon kune kun multaj gastoj, eĉ unutagaj kongresvizitantoj (utila novaĵo de LKK), efektive el ĉiuj kontinentoj, el pli da landoj ol iam ajn (63 !). Prave kaj rajte diris prezidanto *Tonkin*: „Nia movado fariĝas pli kaj pli tutmonda."

Post la Jubilea Kongreso en Varsovio ni alpaŝis la duan jarcenton per alia jubileo, festante la 80-jariĝon de la tamen daŭre juna Universala Esperanto-Asocio, efektiva fokuso de la tuta movado mondvasta. Kaj tio devis karakterizi la kongresajn eventojn en Roterdamo, en la tuja proksimeco de la Centra Oficejo, kvaronhora promenado sufiĉis ja por viziti ĝin. *Movadaj farendoj* traplektis tiujn eventojn, la kunvenojn regis multe pli laboremo kaj progresemo ol mi iam ajn spertis tion dum aliaj kongresoj.

Lige kun la kongresa ĉeftemo – „Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo", enkondukita de *Ottó Haszpra*, estrarano de UEA – la centra demando estis dum la plej diversaj kunvenoj: kiel agi en la komenciĝinta jarcento, kiel konduki UEA-centron, la movadon, la lingvoutiligon en epoko, kiam rapide ŝanĝiĝas cirkonstancoj por la homaj bezonoj, aparte por la „lingvo-bezono". Kiel utiligi la mensojn kaj homfortojn, kiuj ja troveblas dise en la tutmonda movado? Mi ĵus evitis skribi „inter la esperantistaro", ĉar oni ne forgesu: granda aro da helpemaj simpatiantoj volonte subtenas Esperanton, kaj ili estas pli multaj ol ni kutime pensas, ofte apenaŭ kalkulante je ilia bonvolo. Evidentiĝis la deziro – konvene al la prezentiĝanta vasta bezono – ke UEA, kvazaŭ multnacia entrepreno reorganizu sin, kaj kunordigu la landajn kaj fakajn asociojn en iliaj agadoj direktiĝantaj al la ekster Esperantujo agantaj organizaĵoj. Plifortigo de la praktikaj uzebloj de Esperanto necesas – intencoj kaj disponoj tiucele prezentiĝis ankaŭ dum la multaj kunsidoj de la fakaj asocioj.

La preskaŭ spontana harmonio en tiu rilato montriĝis ankaŭ en la enkondukaj vortoj de la rektoro de la Internacia Kongresa Universitato, profesoro *Jan Knappert*. Li kuraĝigis la personojn alte kvalifikitajn, verki kaj prelegi pli multe en kiu ajn fako, altnivele, kaj por interesigi la koncernan fakularon, kaj por vivigi la fakan lingvaĵon. Nepre prave, kaj tute akorde ĉe Terminologia Esperanto-Centro sonis voĉoj de eminentaj kunlaborantoj – *Bormann, Blanke, Eichholz* kaj aliaj – instigantaj la fakulojn multe pli prelegi, gvidi kursojn, do praktiki *interne de la fako*. Tiaj agadoj nepre necesas por disvolvi kaj modernigi nian terminaron, kaj samtempe gravas ilia varba-propaganda valoro.

„Se Varsovio simbolas la komencon de Esperanto, Roterdamo simbolas ĝian estontecon" – tiel enkadris prezidanto Tonkin la jubileojn de nia movado, aludante la fokusan rolon de la ĉefsidejo de UEA. La gvida laboro de UEA – subtenata de multaj aliaj agantoj – sukcesis sub la marko de la Jubileo atentigi la vastan mondon pri Esperanto, amasiĝis festaj eventoj en multaj landoj, same rimarkindaj eldonaĵoj kaj gravaj paŝoj, iniciatoj kaj fondaĵoj. Neniam antaŭe la atento al Esperanto estis tiel granda – sonis lia plenrajta aserto, prijuĝante la grandiozan agadon de la socio, kiu parolas la sama lingvon kaj strebas al interhoma-internacia, komunan lingvon uzanta socio. Kvazaŭ firmigis la brilan paroladon por la venonto la kantado de niaj etuloj de la *Infana Kongreseto*, akceptitaj kun varmega ĝojo de la entuziasmigita publiko. Kaj unu etaĝon pli supre, la novaj sukcesoj parte montris sin eble pli reale: apenaŭ imagebla, grandioza aro da plej diversaj libroj, amaso ankaŭ de la plej-plej novaj eldonaĵoj el la tuta mondo perpleksigis la alvenintojn; eĉ trarigardi kiel ekspozicion tiun riĉecon ŝajnis kapturna ĝojo en la ĉiama svarmo de la aĉetantoj.

Ni haltu por momento, rimarkinda en la historio – en 1988 eksplodis paco en la mondo, tute ne limigita al forigo de iuj nukleaj armiloj laŭ akordo de la grandpotencoj, finiĝas lokaj militoj... esperiga perspektivo por Esperanto – por citi el la festparolado de *d-ro John Wells*; aldonu la kunvenintojn en la „Tago de la paco", kiuj per prelegoj kaj kantoj ligis ĝin ankaŭ al medioprotekto kaj socia justeco. Idee alligiĝas la *Zamenhof-Esperanto-Centro* projektata en *Bialistoko*: la urba gazeto aperis plene Esperanto-lingva kaj ofertis loterion favore al la financa bazo de tiu internacia kulturcentro. Sukcesego! – en ĉeesto de la urbaj estroj, bonŝance du kongresanoj *gajnis* dusemajnan feriadon en la naskiĝurbo de Zamenhof.

Multe da eŭropismoj enhavas PIV – nia plej aŭtoritata, kvankam ne-oficiala vortaro – kaj tiuj ofte difinas vortojn ne klare por ekster-Eŭropanoj. Nia *Akademio* publike konfesis tion, kaj esprimis la deziron revizii tiun vortaron; pri novaj sufiksoj proponitaj ni aŭdis, ke laŭ la reala praktiko venos la tempo, kiam iujn la Akademio sankcios, ĝis tiam necesas toleremo koncerne ilin. La samo validas laŭ la akademianoj pri E-igo de la *nomoj* – amata ĉevaleto de iuj, kiuj pretervidas la kutimojn de siaj etnolingvoj – kion eblas toleri, tamen plej indas lasi ilin originalaj (eventuale doni parenteze la proksimuman prononcon). La diskuto bone montris la ĉiaman nacian influon de la propra gepatra lingvo, kiun eĉ akademianoj emas sekvi en la Esperanta

vortfarado kaj difinado, forgesante ties propran aŭtonomion... Verdire tie troveblas „forta voko" krei-penetrigi novajn sinonimojn en Esperanton, kaj ilia inundo igis multajn plendi dum la publika kunsido.

Tio same provokis disputon ĉe *Terminologia Esperanto-Centro* kaj dum la *Esperantologia Konferenco*. Malcertecoj en la ortografio estis menciitaj, alvokante niajn instancojn: klopodi al ordo en tiu sfero de nia ververe skriba kulturo. Internacia lingvo – per naciaj kaj Eŭropaj kutimoj ŝarĝata, jen la nuntempe akriĝinta problemo, kiu pli kaj pli ĝenas lernadon kaj interkomprenon ekster Eŭropo. Temas nur parte pri lingvistika (aŭ lingvika) problemaro: estas normoj kaj kutimoj „inter ni" familiaraj, sed kiuj estas – oriente kaj sude – apenaŭ konataj kaj komprenataj, ĉar ne tutmondaj, nur regionaj... Ĉu konservi ilin?

Novaj organizaĵoj estis kreataj aŭ planataj, tiuj de *juristoj* kaj de *ateistoj* (ATEO) – cetere ambaŭ iniciatitaj de Usonanoj; kvankam hazarde, tamen kuraĝige rilate la Usonan movadan forton. Terminologio estis forte traktita ĉe ambaŭ, samkiel – ekzemple – dum la jubilea kunveno de UMEA (medicinistoj), kaj ene de la Komerca-Ekonomia Fakgrupo. Eble vi miros, sed tio ne estis temo de la verkistoj (EVA), kies konkurso por originala teatraĵo finiĝis bonrezulte. Tiucelan novan konkurson denove instigis per malavaraj

Prof. Gaston Waringhien festis sian 87an naskiĝtagon dum la UK

monpremioj *Adamo Goralski;* ni atendu do pliriĉiĝon de nia drama literaturo aktuale sufiĉe manka, aŭ pli precize: ne sufiĉa. Pri ampleksiĝo de lerneja instruado kaj pri novaj, espereble pli efikaj metodoj venis informoj abunde en la „Tago de lernejo", kaj oni larĝe priparolis la „politikon" koncerne la enkondukon de Esperanto en lernejojn. Tamen... tio estas multe pli grava afero, kaj ne nur tiu de instruistoj...

Apud la labora programo kaj la kongreso, kaj mem la granda havenurbo prezentis tre diversajn distrajn eblojn. Tute nekutima estis la urborigarda „ekskurso" pro la multaj, ofte kuriozaj arkitekturaj vidindaĵoj, eĉ pli pro la perŝipa ĉirkaŭrigardo en la gruoplena haven-instalaĵaro kaj basenserio. Tiu pitoreska vidindaĵo el alto de preskaŭ ducent metroj de Eŭromasto denove prezentis plezurojn, kvazaŭ laŭ birda perspektivo observi la senhaltan trafikadon de la multspecaj ŝipoj. Inter la teatraj eventoj tre indas mencii la ĝuitan komedion: „Fabeloj pri la kalpakoj", plene profesie prezentitan, ja la *Bulgara Esperanto-Teatro* ĉi-jare iĝis 30-jara!

Tute alispeca komedio, vera novaĵo en Esperantujo donis altan plezuron fare de la *Pupteatro de Bialistoko*: Dekamerono-rakonto de *Bokaĉo* sursceniĝis gaje kaj spektakle ludata inter ne ordinaraj pupoj kaj ne tre ordinaraj renesancaj gesinjoroj, inkluzive la rikanan diablidon. Sed tute eksterordinaras la interluda okazigo de la parolo kaj muziko, la rava movtekniko de la aktoraro kaj la sprite-pikanta reĝisorado. Senhalta gajeco, senĉesa surprizo devenis de la unika-stila ĝenro.

Liberiĝanta gajeco ondadis ankaŭ tiam, kiam oni vidis-aŭdis la *Nederlandan Ĵazorkestron*, precipe dum ludado de la virtuozaj gitaristoj. Certe „nacia" ĝi prezentiĝis, kvankam ekster la Nacia vespero, kiu en si mem montris sin trankvila kaj kontentiga el arta vidpunkto. La pinto tiuvespere estis denove agrabla surprizo, la kvarteto *„Kajto"*: tri ĉarmulinoj kun „maristo" kantis lude, ludis babileme, ravis freŝe kamparanece kaj manipulis profesiece muzikinstrumentojn, folklorajn dancante kaj maristajn kanzonante – en bonega

La statuo de Hugo Grotius, fondinto de la internacia juro, antaŭ la urbodomo de Roterdamo

Esperanto! – tute katenante la publikon per sia sincere sindona prezentado.

La plurfoje premiita hungara filmo *Mefisto* aperis antaŭ la kongresanaro ĉi-foje per Esperanto-voĉoj. Ekscitite ni devis sekvi la rapide sin sekvantajn scenojn en la antaŭmilita Germanio, en la streĉa teatra vivo, poste en la teatreca kruela realo de la nazia periodo. La arte elektita gamo de karakteroj, grimacaj kaj letergiaj, ekparolis en nia lingvo tute nature, eĉ foje kun tiu natura hasto, kiu eĉ en la reala vivo ofte ne permesas kompreni bone la rolantojn, kiam oni perceptas pli la tonon ol la vortojn, pli la sentojn ol la sencojn. Prezentita nur unufoje, la filmo meritus nepre pli da zorga aranĝado, ol kiel okazis... tro malfruvespere, sen antaŭa kaj dumpaŭza komentoj (multaj kredis la paŭzon – fino!). Temas ja denove, fakte la duan fojon pri granda, spektakla kaj altnivela filmo aŭskultebla en Esperanta varianto – bonvena por popularigi Esperanton.

Ni adiaŭis la vere agrablan kongresejon per grandioza ferma kunveno, en korvarmiga, altentuziasma etoso. Ĉiuj volonte aplaŭdis la bravajn organizantojn de LKK kaj Centra Oficejo de UEA, kies diligenta laborado multe kontribuis – ankaŭ pere de ses numeroj de la Kongresa Kuriero – al la ĝojoj kaj ĝuoj de la kongresanoj, al la inde festita jubileo de nia movado.

Ervin *Fenyvesi*

1988. 06. 17. vendredo

La aviadilo de tipo TU-154 startas en Budapeŝto je la 15a horo kaj 25 minutoj. Post la iom pli ol duhora flugado ni atingas Moskvon nur ĉ. la 20a horo, ja al la flugodaŭro aldoniĝas du horoj pro la ŝanĝiĝo de la horzonoj. Post kelka atendado, je 23,55 eniro en samtipan aviadilon de Aeroflot, kaj ek al Ulanbatoro.

1988. 06. 18. sabato

Nokta flugado okhora; sed fakte la nokto nun ŝrumpas nur je du horoj — pro la flugado alorienta baldaŭ la suno aperas sur la horizonto, kaj kun plezuro ni admiras la majestajn blankajn rokojn de Uralo en la ruĝa aŭrora lumo.

Alveno en Ulanbatoro je la 13a horo — la ŝanĝiĝo de la horzonoj ŝtelis pliajn kvin horojn el nia vivo. Ne gravas — revenvoje ni rericevos ilin.

Post kelktempa ĉasado ni kaptas taksion, kaj atingas la hotelon „Bajangol". Agrabla surprizo — kiel antaŭ tri jaroj, kiam lastfoje ni vizitis Ulanbatoron, ankaŭ nun ni ricevas ĉambron sen antaŭa rezervo. Kaj eĉ pli agrabla novaĵo: la prezo de la ĉambro identas kun tiu de antaŭ tri jaroj. Ioma promenado tra la urbo, validigo de la trajnobileto al Pekino por la morgaŭa tago, kaj frua enlitiĝo por iom kompensi pro la perdita nokto.

1988. 06. 19. dimanĉo

Je la 9a horo matene entrajniĝo al Pekino. La kupeon de la dormvagono ni dividas kun agrabla mongola sinjoro, la kvara lito restas malplena. En interesa ruslingva konversacio kun li evidentiĝas, ke li estas artisto, vicprezidanto de la Asocio de Mongolaj Artistoj. Li vojaĝas al Japanio, por partopreni internacian konferencon.

1988. 06. 20. lundo

La mateno trafas nin en la trajno. Memorinda evento sekvas nur ĉ. la 13a horo, kiam la trajno — dank' al la afableco de la kompilintoj de la horaro — faras kelk-kilometran devojiĝon kaj 20 minutan halton ĉe Badaling, por ke la pasaĝeroj povu admiri la grandiozan Grandan Muron.

Alveno en Pekino precize laŭ la horaro, je 15,33. En la stacidomo renkontas nin delonga amiko, s-ro Dai Songen, oficisto de Ĉina Esperanto-Ligo, kaj reprezentanto de la Estraro de la urbo Qingdao. Per aŭtomobilo ni veturas al la gastodomo de la Ŝtata Konsilantaro, kaj sekvas kelka ripozo en vere luksa ĉambro. Je la sepa horo atendas nin abunda ĉina vespermanĝo kun s-ro Zhang Xiao Dong, direktoro de la reprezentejo de la Urba Estraro de Quingdao en Pekino. Ni konstatas, ke la ĉina gastronomio daŭre konservas siajn palatotiklajn virtojn. Post la vespermanĝo aparte bonvenas plia ripozo en la gastodomo.

1988. 06. 21. mardo

La „tago" komenciĝas vere frue. Je 0,58 horo ekveturo trajne al la urbo Qingdao. Al la societo aliĝas du eksterlandaj esperantistoj: s-ro Tanaka, kunlaboranto de la japana televida kompanio NHK, kaj Sabira Stahlberg, finna studentino de la ĉina lingvo, kiu venis al Ĉinio cele de lingva ekzerciĝo. Sekvas dek tri hora veturado tra la pitoreskaj pejzaĝoj de la Shandong (Ŝantung)-provinco. Dense loĝata provinco — sur ĉ. cent kvindek mil kvadrataj kilometroj vivas sepdek kvin milionoj da homoj. Ne mirinde do, ke la grundo estas maksimume eluzata por nutraĵproduktado. Sufiĉas, ke inter du rokoj sur montdeklivo troviĝu kultivebla spaco de dek kvadrataj metroj, oni jam utiligas ĝin. Bele pompas tie legomĝardeneto bonege prizorgata, sen unu sola misherbo inter la legomvicoj.

Alveno dum la malfrua posttagmezo, afabla akcepto fare de la reprezentantoj de la Urba Estraro kaj de la lokaj esperantistoj, kaj rapida aŭtomobila veturo al la luksa hotelo Huang Hai (Flava Maro). Lokiĝo en la komforta ĉambro, poste individua promenado sur la marbordo. En Pekino akceptis nin varmego de 35°C, ĉi tie la temperaturo estas je dek gradoj malpli, do tre agrabla. Qingdao estas pitoreska, ĉarma urbeto — nu, laŭ ĉinaj kriterioj, ĉar la loĝantaro superas unu milionon. Ĝi havas multajn domojn, konstruitajn laŭ Eŭropa stilo, ja inter 1897 kaj 1922 la urbo vivis sub german okupado. La marbordaj plaĝoj, la belaj hoteloj, la vigla bazaro atestas pri evoluanta urbo. Multaj familiaj butikoj kaj restoracietoj reklamas per sia ekzisto la rapidan ritmon de la ĉina ekonomia reformprocezo.

1988. 06. 22. merkredo

Matene la oficialan inaŭguron de la televida Esperanto-kurso „Espero" partoprenas jam pluraj eksterlandanoj: Yoshimi Umeda, vicprezidanto de UEA, du reprezentantoj de la japana religia movado Oomoto, William Menary, aŭstralia profesoro de lingvoj, kaj kun ioma malfruo atingas la urbon Qingdao ankaŭ Roman Dobrzynski, prezidanto de Pola Hungara Esperanto–Asocio, redaktoro de la Pola Televido. Ĉeestas s-ro Li Shijun (Laŭlum), vic-ĉefredaktoro de El Popola Ĉinio, gvidantoj de la centraj radiostacioj, s-roj Liu kaj Nan, redaktoroj de la Esperanto-elsendoj de Radio Pekino, la fama ĉina kaj Esperanta verkisto Chun-chan Yeh (Cicio Mar), aŭtoro de „La Montara Vilaĝo", reprezentantoj de pluraj provincaj esperantistaj organizaĵoj, tiuj de la lokaj esperantistoj, kaj fine sed ne laste multajn elstaraj gvidantoj de la socia kultura kaj politika vivo de la urbo Qingdao kaj de Shan-

Rolantoj de la televida kurso dum amika kunveno

dong-provinco. Kompreneble ĉeestis ankaŭ la televidkameraoj de la Televida Stacio de Qingdao, por registri la eventon.

La televida kurso konsistas el 24 partoj. Ĉiu parto estas duonhora, tiel la tuta materialo ampleksas 12 horojn. Estas evidente, ke la ĉeestantoj ne povis spekti la tutan materialon. La reĝisoro antaŭpreparis por tiu ĉi okazo ĉ. 40-minutan superrigardan muntaĵon el la tuto, kaj krome ni spektis la 18an parton. Tio, kion ni vidis, nepre superis niajn imagojn. La kurso prezentas la Internacian Lingvon en vere vivecaj situacioj: ĝi prenas la formon de televida teatraĵo, kiu harmonie kombinas instruadon kaj amuzadon. La „agado" estas simpla: instruistino Li Cheng en la bela apudmara regiono de Qingdao interkonatiĝas kun kelkaj esperantistoj, kaj tio donas elirpunkton por realigo de scenoj kun la bazaj parolsituacioj, kiel komuna lernado, reciproka vizitado, butikumado, ekskurso ktp. Apartan laŭdon meritas la kameraisto de la filmo, pro la okulkarese belaj bildoj pri la urbo Qingdao kaj pri la vidindaj pejzaĝoj de la ĉirkaŭaĵo.

La naskiĝo de la filmo grandparte ŝuldiĝas al la fervora agado de s-ro Liu Zheng, dua ĝenerala sekretario de la Urba Komitato de la Ĉina Komunista Partio, kiu samtempe estas honora direktoro de la Esperanto–Asocio de Qingdao. Konsilantoj de la kurso estis s-ro Chen Yuan, vic-ministro de la ĉina Komisiono de Lingvo, kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, kaj s-ro Yoshimi Umeda, vicprezidanto de UEA. La scenaron kompilis s-ro Li Shijun, membro de la Akademio de Esperanto. La lingvan gvidadon plenumis s-ro Dai Songen. La gramatikajn klarigojn en la filmo prezentis geparolistoj de la Esperanto-Sekcio de Radio Pekino: s-ino Xue Meixian kaj s-ro Liu Junfang.

La antaŭtagmezan prezenton — kiun akompanis pluraj salutparoloj de ĉinaj aŭtoritatoj kaj de eksterlandaj esperantistoj — sekvis posttagmeze detala diskuto sub la prezido de s-roj Liu Zheng kaj Yoshimi Umeda. Ĉiuj parolintoj substrekis la konvinke bonan nivelon de la tuta kurso, kun aparta laŭdo de la senriproĉa Esperanta prononcado de la amatoraj geaktoroj, kiuj plenumis la diversajn rolojn. La eksterlandaj gastoj promesis fari klopodojn ĉe la sialanda televido, por ke tiu aĉetu la kurson, kiu ja estas relative facile adaptebla por alilanda uzo. S-ro Lin Zheng informis, ke la televida stacio de Qingdao enprogramigos la kurson dum la venonta jaro, kaj poste dissendos ĝin ankaŭ la centra televida stacio de Ĉinio. Tio — precipe la dissendo pere de la centra televida stacio — donos ĝis nun neimageble vastan eblon al la lernado de Esperanto, ja en Ĉinio funkcias 160 milionoj da televidaj aparatoj, kaj ordinare oni kalkulas pri 600 milionoj da televidspektantoj. Eĉ se nur ono de tiu amaso spektos la kurson „Espero", oni povas antaŭvidi kelkajn dekmilionojn da homoj, kiuj akiros bazajn aŭtentikajn informojn pri Esperanto, kaj minimume kelkaj centmiloj komencos serioze studi ĝin! Tio taskigos grandegan laboron al la organizita movado en Ĉinio, sed, mi supozas, iu ajn landa esperantista

Internacia babilado antaŭ la hotelo Huang Hai

organizaĵo volonte alfrontus tian laboron.

La posttagmezan diskuton vespere sekvis pompa bankedo, kiun partoprenis multaj gravaj gvidantoj de la urbo, interalie ankaŭ s-ro Wang Zhaoji, ĝenerala sekretario de la Urba Komitato de la Ĉina Komunista Partio. Mi havis la bonŝancon sidi apud li, kaj babili pri plej diversaj aferoj en tre malfermita, sincera atmosfero. S-ino Xue, kiu devus interpreti por ni, nun povis ripozi, ĉar montriĝis, ke s-ro Wang faris siajn universitatajn studojn en Leningrado, kaj tiel ni povis interkompreniĝi en la rusa lingvo. S-ro Wang tre pozitive parolis pri la agado de esperantistoj en Qingdao, kaj tiu fakto pruvas la altan socian prestiĝon, kiun ĝuas nia lingvo en tiu bela apudmara ĉina urbo.

1988. 06. 23. ĵaŭdo

Post laboro sekvu plezuro — tiu ĉi tago estis dediĉita al ekskurso al la pitoreska apudmara montaro, kiun regas la bela monto Laošan, 1133 metrojn alta. Bedaŭrinde la vetero ne estis favora al ni, tamen ni sukcesis vidi du templojn-sanktejojn, kaj grimpi ne tre altan rokon, de kie ni povis ĝui la panoramon: la rokplenaj montoj kaj la golfo de la Flava Maro eĉ en la pluveta vetero gravuriĝis en nian memoron.

La ekskursan tagon vespere kronis komuna kultura programo kun la lokaj esperantistoj. En tiu programo aktive partoprenis ankaŭ la eksterlandaj esperantistoj: oni povis aŭdi kaj vidi, kiel kantas kaj dancas la vicprezidanto de UEA, kaj la varma etoso kantigis eĉ la aŭtoron de tiu ĉi artikolo...

1988. 06. 24. vendredo

Antaŭtagmeze kurta ekskurseto en la urbo, poste entrajniĝo al la urbo Yenchou (Jenĝoŭ), de tie per duonhora aŭtobusa veturo ni atingas la urbon Qufu (Ĉjufu). Alveno vespere, ekloĝo en la tradici-stile konstruita, tamen hipermoderna kaj luksa hotelo Qeli. En la trajno alternas rigardado tra la fenestro al la belaj pejzaĝoj de la Shandong-provinco, kaj babilado en la diversnacia esperantista societo. Kurioze, ke ĉi tie, dek mil kilometrojn for de Hungario kaj Pollando, kun Roman Dobrzynski ni solvas iujn punktojn pri la kunlaborado inter HEA kaj PEA.

En Ĉjufu atendas nin varmego eĉ je la deka horo vespere. La sude vigla vivo sur la stratoj tamen tentas fari mallongan promenon. Ĉjufu estas urbo de la granda ĉina filozofo Konfuceo (551-479 a.K.), ni provas kapti ion el la atmosfero de la loko.

1988. 06. 25. sabato

Vizito al Kung Miaŭ, al la Templo de Konfuceo, fondita unu jaron post la morto de la granda filozofo: nun ĝi okupas la areon de 22 hektaroj. (Oni komprenu la vorton „templo" ne en Eŭropa senco: sur tiu ĉi granda areo oni trovas pli ol kvindek ornament-pordojn kaj multajn pli-malpli grandajn konstruaĵojn, inter tiuj tri grandajn halojn.)

La templo estas iasence ankaŭ kvazaŭ-



La tombo de Konfuceo

muzeo de la ĉina historio: oni trovas ĉi tie grandegan kolekton de steleoj (ŝton-tabuloj) el diversaj epokoj, inter ili 16 tabulojn el la epoko de la Han-dinastio (206 a.K. – 220 p.K.).

En la ĉefa halo – kiu ampleksas 1836 kvadratajn metrojn – oni vidas grandan statuon de Konfuceo, kaj tiujn de kelkaj el liaj disĉiploj.

Aprecinda vidindaĵo estas la arbo, kies „praulon" laŭ la tradicioj plantis mem Konfuceo: laŭ la aserto de la ĉiĉerono la nuna arbo elkreskis el la radikoj de la antaŭa „generacio" dum la 18a jarcento – entute, tiu ĉi arbo estas la tria „generacio" de la Konfucea plantaĵo.

Se jam temas pri generacioj, meritas mencion, ke dum preskaŭ dumil kvincent jaroj oni precize sekvis la heredan linion de la posteularo de Konfuceo. Oni imagu nur, tio estas simila afero, se oni konus en Eŭropo la rektan posteulon de la Atena Periklo! Kia senprecedenca respekto al la tradicioj! Kaj certe ne temas pri blufo, ĉar ĝis la kvardekaj jaroj de la nuna jarcento la rektaj posteuloj de Konfuceo (laŭ vira linio) ĝuis tre gravajn privilegiojn, do la atenta kaj zorga sekvado de la hereda linio havis tre praktikajn kialojn. Nun tamen la oficiala linio de la rekta posteularo rompiĝas. La vira membro de la 77a generacio vivas en Tajvano, sed liaj filo kaj filino trovis por si usonan edzinon, respektive edzon. Virina membro de la 77a generacio vivas en Pekino, ŝi havas gefilojn – tamen, laŭ la ĉina tradicio la posteularo estas konsiderebla nur en la vira linio. Do, la pli ol dumil jara genealogia arbo – tre probable unika en la mondo – ne plu kreskos.

Apud la Templo de Konfuceo ni vizitas ankoraŭ Kung Fu, t.e. la palacon de la rektaj posteuloj de Konfuceo. Sur la areo de 16 hektaroj situas preskaŭ 500 pli-malpli grandaj konstruaĵoj: ili atestas pri la lukso, kiun la imperiestroj de ĉiuj dinastioj certigas al la rektaj posteuloj de la granda filozofo.

Sekvas vizito al la „Arbaro de Konfuceo", t.e. al la tombejo de la familio de Konfuceo. La vojon al ĝi borderas okcent jaraj cipresarboj: la tombejo ampleksas du-



Impona pordego pinte de la Tai-monto

cent hektarojn. Ĉi tie troviĝas kompreneble ankaŭ la tombo de Konfuceo mem. La tuto aspektas plie arbaro ol tombejo (konforme al la nomo), oni ne vidas spurojn de homa interveno, la vegetaĵaro pompas en sia natura, origina formo.

Plia vizito sekvas ankoraŭ al la sanktejo de Yen Hui (Jen Huj), unu el la plej fervoraj disĉiploj de Konfuceo: li mortis pli frue ol la majstro.

Konfuceo mortis antaŭ preskaŭ 2500 jaroj, sed liaj instruoj, kiuj pledis por la konservo de la tradicia socia strukturo („Estas damaĝa afero sekvi instruojn kiuj diferencas disde la malnovaj") ĝis nun elvokas diskutojn en Ĉinio. Ne tre antaŭlonge dum la „kultura revolucio" la ruĝgvardianoj atakis lin feroce, sed ankaŭ nun troviĝas multaj ĉinoj, kiuj vidas en la konfuceismo obstaklon de la progreso de Ĉinio. Je la unua aŭdo la instruoj de Konfuceo sonas vere tre konservativaj, tamen mi ne povas forhuŝi de mi la aserton, troveblan en multaj analizoj pri Japanio, laŭ kiuj la lando de la leviĝanta suno ŝuldas sian miraklan ekonomian progreson ne malgrandparte al la devosento de la loĝantaro, kiu sento nutriĝas ĝuste el la konfuceismo. Ĉiukaze, en mia lando mi mem bonvenigus volonte certan dozon de tia produktiva konfuceismo...

1988. 06. 26. dimanĉo

Ekveturo al la urbo Taian per aŭtobuso. La distanco estas negranda, ni jam tagmanĝas ĉi tie. La posttagmeza programo prognozas viziton al templo, sed la ĉinaj amikoj faras rapidan ŝanĝon: la vetero estas elstare bela, kvazaŭ destinita por grimpi nun la monton Tai.

La monto Tai (Taj-ŝan) altas nur 1545 metrojn, tamen ĝi estas inter la kvin „sanktaj montoj" de Ĉinio, eĉ inter tiuj ĝi estas la plej respektata. Laŭ praa ĉina kredo ĉi tie komencas la suno sian marŝadon sur la firmamento. Dum la longa historio de la lando tre multaj ĉinaj poetoj kaj imperiestroj grimpis ĝin, pro tio la montdeklivo plenplenas de sanktejoj kaj memorlokoj, kaj abundas ankaŭ klasikaj literaturaĵoj pri la beleco de la monto. De la montopiedo ĝis la pinto la distanco estas 1350 metroj – tion transpontas ŝtona ŝtuparo konsistanta el sepmil ŝtupoj.

Ni tamen elektis manieron malpli laciga. Aŭtobuso veturigis nin ĝis Chong Tian Men („Duona Vojo ĝis la Ĉielo"), tamen kun ioma prokrasto, ĉar – eble oni interpretu tion kiel dian averton pro nia pigreco – la aŭtobuso neripareble paneis, kaj oni devis atendi, ĝis oni sendis alian el la urbo. Sed la averto ne naskis en ni diligentecon, ĉar de la „duona vojo" ni daŭrigis la veturon per kabloveturilo, kiu dum ok minutoj flugigis nin preskaŭ al la pitoreska pinto, kiun okupas impona taoisma sanktejo. Vidante la belegan panoramon, la majestajn rokojn kaj la verde pompantajn arbarojn, oni ne plu miras, kial tiu ĉi monto fariĝis pilgrimejo de tiel multaj elstaraj figuroj de la ĉina kulturhistorio.

La posttagmezaj horoj rapide forflugas. Reveno al la hotelo, kie nin atendas banke-

Amika renkontiĝo en la sidejo de Guoji Shudian

do, prezentita de la urba estraro. Sed la tempo kruelas. Restas al ni nur duona horo por ĝui la sennombrajn palatotiklajn pladojn, rapida sed vere elkora adiaŭa tosto per bongusta ĉina brando, kaj la aŭtomobilo jam flugigas nin du, kaj nian akompananton s-ron Pang Jing-wei, kunlaboranton de la Esperanta Sekcio de Guoji Shudian, al la stacidomo, kie ni entrajniĝas al Pekino.

Kolonoj en la templo de Konfuceo

1988. 06. 27. lundo

Alveno en Pekino je la kvina horo matene. Atendas nin kunlaboranto kaj aŭtomobilo de la reprezentejo de la Urba Estraro de Qingdao en Pekino, kaj ĝi fulmrapide portas nin al la hotelo Minzu, troviĝanta tre proksime al la Placo Tienanmen. Ripozo tie ĝis la naŭa kaj duono, poste reaperas s-ro Pang kun komforta Toyota Crown, kiun verŝajne disponigas al ni afable Guoji Shudian. (Ni eĉ ne scias precize – tio bele ilustras la modestecon de la grandanima gastamo de niaj ĉinaj kamaradoj...)

Sekvas libera vagado kaj butikumado tra Pekino, per la sperta kaj afabla gvidado de s-ro Pang. Denove frapas nin la amasa ekzisto de malgrandaj familiaj butikoj, kiuj ofertas la plej diversajn varojn – antaŭ tri jaroj, kiam lastfoje ni vizitis Ĉinion, oni ne spertis tion. Mia edzino ne povas kontraŭstari la tenton, kiun prezentas la belaj varoj (verdire ankaŭ mi ne tre), kaj nia monujo maldikiĝas, sed dank' al la moderaj prezoj, la butikumado ne kaŭzas familian bankroton...

En la malfrua posttagmezo ni vizitas la sidejon de Guoji Shudian, por trakti pri kelkaj problemoj de la librointerŝanĝo inter Ĉinio kaj Hungario. Estas plezure por ni denove renkonti s-inon Zhou Qian-yun, estrinon de la Esperanta Sekcio, kaj interkonatiĝi kun la tre ĉarma f-ino Sun Xiao-yan, kunlaborantino de la sekcio. Ĉar ekzistas reciproka bonvolo, ni trovas la solvon de la problemoj.

Vespere en la hotelo ordigo de la valizoj, prepariĝo por la sekvataga frumatena forvojaĝo el Pekino. Miaj manoj trafas medalon kun la bildo de Konfuceo. Mi rigardas ĝin, la konturoj de la barbula kapo malklariĝas, kaj aperas antaŭ miaj okuloj la vizaĝtrajtoj de la donacinto, tiuj de s-ro Li Shijun, dum li klarigas iun detalon pri iu historia loko de Ĉinio, ĉu pri la imperiestra palaco en Pekino, ĉu pri ĝardeno en Soŭĝoŭ, ĉu pri la kiosko, kiu staras sur la sama loko, kie iam Konfuceo instruis siajn disĉiplojn en la ombro de abrikota arbo... Mi vidas kaj admiras la ĝojon de inicitoj sur lia vizaĝo. Per decida movo mi lokigas en ĉemanan lokon libron ricevitan de li kun afabla dediĉo, la historian dramon de Guo Moruo pri Qu Yuan (Ĉju Juan) (340-278 a.K.), kiu vivis kaj mortis por Ĉinio. Ĝi estos inda dumvoja legaĵo.

1988. 06. 28. mardo

Pekino adiaŭas nin pluve. La adiaŭo tamen estas dolora, ja oni ne scias, kiam eblos reveno. Antaŭ tri jaroj, adiaŭante, ni supozis ke la adiaŭo estas porĉiama. Nun ni esperas pri revido. Optimisma rigardo el la aŭtomobilo maldekstren al la imperiestra palaco, kaj dekstren al la vasta Tienanmen. Alveno al la stacidomo, adiaŭo al s-ro Pang, entrajniĝo. La dramo pri Qu Yuan vere digne finas, kronas kaj resumas Ĉinion. La traduko admirindas, ĝi estas flua, eĉ facila Esperanto, tamen, kun karakteriza ĉina aromo.

Ĉinstilaj pentraĵoj pri la Konfuceaj memorlokoj

1988. 06. 29. merkredo – 07. 03. dimanĉo

Ulanbatoro kaj la hotelo Bajangol atendas nin fidele. Daŭre restas la samaj la prezo de la ĉambro kaj la karakteriza ŝafvianda odoro en la restoracio. Nur la vetero ŝajnas esti ŝercema. La ĉielon kovras nuboj, minacas pluvo, kaj la minaco baldaŭ ĉesas esti nura minaco. Ĉu la jara pluvokvanto falos ĉi tie dum nia tritaga restado?

Ŝajne jes. La grandaj gutoj mitrale pafas la malglatan betonon de la stratoj, kaj ili indulgas eĉ ne la altan statuon de Stalin, kiu spitante „perestrojkon" kaj „glasnoston" firme staras antaŭ la biblioteko de la Mongola Akademio de Sciencoj.

Tamen, dum la pluvopaŭzoj ni sukcesas reviziti la lamaistan monaĥejon kaj la palacon de la iamaj ĥanoj – vidindaĵoj ne postrestantaj al tiuj en Ĉinio, sed en Ulanbatoro turistoj maloftas, do ni estas preskaŭ la solaj gastoj.

Sabate je la 17a horo ekflugas nia aviadilo al Moskvo – nun ni rericevas tiujn horojn, kiujn ni perdis antaŭ malpli ol du semajnoj, kaj je la 20a horo vespere ni jam alteriĝas en Moskvo.

Dum tiuj tagoj en la soveta ĉefurbo kunsidis la soveta partia konferenco, sekve ĉiuj hoteloj estis plenplenaj. Nia aviadilo al Budapeŝto startos nur dimanĉe tagmeze, do ni decidas resti en la transita atendejo. Sed la deĵorantaj sovetaj limpolicistoj decidis alie, kaj per tradicie severaj movoj kaj vortoj ili irigis nin al la doganejo. La doganisto probable divenis, ke ni havas amason da tempo, ĉar li konscience dufoje trakalkulis niajn forintojn, rublojn, tugrikojn kaj dolarojn, kaj poste dediĉis plenajn dudek minutojn al la traserĉado de la mansaketo de mia edzino, farante demandojn pri ĉiuj objektoj, kiel kombilo, broseto kaj aliaj aĵoj, kiuj ordinare plenigas virinajn retikulojn. Nu, „perestrojko" evitis ne nur Ulanbatoron, sed ŝajne ĝi ne sukcesis penetri ankaŭ Ŝeremetjevo-2...

Post ne tre komforta nokto en la granda atendohalo ĉirkaŭ tagmezo ni ekflugas al Budapeŝto, lacaj sed riĉaj per neforgeseblaj travivaĵoj...

Vilmos Benczik

LA FOTOARTISTO ZOLTÁN FEJÉR

Lia nomo depost 1971 estas konata por niaj legantoj. La kovrilpaĝojn de Hungara Vivo ornamas liaj — ofte vere trafe majstraj — fotoj, ankaŭ la artikolojn ilustras ofte bildoj, kiuj devenas el la fotiloj de nia fidela kunlaboranto.

El tiuj bildoj — ankaŭ el la fotoj premiitaj (kvinfoje!) en la Belartaj Konkursoj de niaj Universalaj Kongresoj — Fejér aranĝis ĉi aŭtune foto-ekspozicion en la Urba Biblioteko de Vác. Pri tiu arta kolekto, pri la delikataj portretoj de Zoltán Fejér la sekvan interesan recenzon verkis konata arthistoriistino, Ágnes M. Bakonyvári.

La fotoartista kariero de Zoltán Fejér komenciĝis laŭ la kutima maniero: la vojaĝimpresoj kaj la homa figuro ricevis per lia kamerao proprajn nuancojn, lia individua vidmaniero formis nova-tona eĉ konatajn pejzaĝojn kaj ĉirkaŭaĵojn. Post tia komenco lia atento direktiĝis pli kaj pli al bildigo de prestiĝaj personoj, kio estas ja tradicia temo de la artoj, bezonanta kapablon, veran talenton por „kapti" la karakteron de la granduloj.

Al tiu necesas reliefigi iujn fenomenojn kaj situaciojn, akcenti ilin per kelkaj ĉefaj trajtoj, do iom abstraktigi kaj skizi — por trafi la esencon. Kvankam la fotado, nature, tro inklinas al precizemo, al naturfideleco, tiel malfaciligante la artan koncentradon al la akcentindaj motivoj, la konscian komponadon.

Sur la portretoj de Fejér videblas konataj hungaraj verkistoj kaj eminentuloj de la belartoj, plejparte viroj. La personoj estas do elstaraj individuoj, tute ne grizaj figuroj de la ĉiutagoj, eventualaj tipoj de certaj grupoj aŭ profesioj. Temas do pri aparte konsciaj artistoj, propre individuaj; ĝuste pro tio Fejér aperigas ilin sur la fotoj kun same konscie, planite aranĝita ĉirkaŭaĵo. Tamen tiu komponado ne sentigas ĉe ni arbitrecon, sed la ordon, decan al la personecoj.

Tia metodo de la fotoartisto povus facile renkonti troigojn kaj artajn fiaskojn, sed Fejér evitas ilin, ĉar li alcelas la specifajn karaktertrajtojn. Liaj aranĝoj nur emfazas kaj enfokusigas ilin. Tiel agante, li lasas manifestiĝi la imagojn, kiujn la fotinda persono pri si mem havas, sed samtempe li interpretas kiel la eksteruloj — fakte la fotoartisto — rigardas la personon.

Sugestaj montriĝas la fotoj de la personoj, montrataj en la propra ĉirkaŭaĵo; tio devenas de la rigardoj, de la bildaj pozicioj de la okuloj. Se ili portas okulvitrojn, por la karakterizo ŝajnis sufiĉa la rilatigo de ilia rigardo al la vitretoj. Vidu la foton de la erudicia pentristo Jenő *Barcsay:* li aperas kun okulvitroj ŝovitaj surnazen, super ili rigardante, do neglektante la ripareblojn de la vidado *ekstera,* atentante nur la vidadon internan.



Jenő Barcsay pentristo (1984)

En pluraj portretoj ankaŭ *manoj,* la tenado de la manoj konsistigas gravan parton de la karakterizado. La multtalenta pentristo Endre *Bálint* interplektante siajn manojn apogas sin sur la bastono: la rompiĝemon korpan kompensas lia firma rigardo.



Endre Bálint pentristo (1984)

Mano subtenas la vizaĝon de la pentristo András *Orvos,* kelkaj fingroj atingas lian buŝon, kovrante-kaŝante iom pri liaj personeco kaj sentoj. Sed la larĝaj lipharoj kaj la barbo parolas pri tiuj. La libere falanta kolumo de la malfermita jako aludas per la intenca neglektemo al personeco elasta kaj aperta. Jen, la vizaĝon apogantaj manoj, signantaj kutime meditemon, laŭvarie povas sentigi eĉ nuancajn diversecojn de la personecoj.



András Orvos pentristo (1984)

La fingroj de István *Nemere* preskaŭ spasme premiĝas rigide, kvazaŭ projektitaj linioj de inĝeniero. La rigoraj rektoj de lia vizaĝo, la fiksa rigardo kaj la blokeca korpo komplete kaŝas liajn sentojn, pensojn, tute mankas la tono de la momento. Nenio signas la ĉirkaŭmondon, el hela, malplena spaco alrigardas nin la blankpulovere vestita verkisto. Lia bildo tiel formita alvokas la imagitajn mondojn, la figurojn de tiuj agoplenaj eventoj, kiuj legeblas en liaj fantazie plektitaj verkoj.



István Nemere verkisto (1984)

Eszter *Mattioni* apartenas al la malmultaj virinoj, kies figuro kaj personeco eltenas la akrecon de la fotostilo, per kiu portretas la kamerao de Zoltán Fejér. Al tiu maniero tre bone taŭgas la fortaj trajtoj, la firma karaktero de la pentristino. Substrekas la individuecon en la figurado ankaŭ la koliziigo de la florbrodita mebloŝtofo kaj la kvadrateca veŝto, la virineca kunludo de krispoj kaj tolfaltoj. Harmonie aliĝas al la pentristino ŝia fone videbla verko: per kelkaj linioj skizita virina vizaĝo kun fortaj konturoj en abunde ornamita medio.

Eszter Mattioni pentristino (1984)

Zoltán Fejér demonstras la fotistajn eblojn de la portretfarado sur siaj bildoj. Multflankaj manifestadoj necesas por ricevi-rimarki la komplekson de l' personeco; sur la portretoj Zoltán Fejér karakterizas la personojn koncigizante laŭ multflankaj manifestoj iliajn trajtojn.

Ágnes M. *Bakonyvári*
(Tradukis E. *Fenyvesi*)

Révész Sándor

Faktoj, timoj kaj esperoj pri Hungario

7. La fendiĝinta monolito II.

Al mi ŝajnas evidente, ke la formala demokratio estas nesufiĉa, sed necesa kondiĉo de la aŭtenta demokratio. La ekonomia (kaj sekve la kultura) superforto laŭ la sociologia verŝajno sekure garantias la konserviĝon de la potenco de la socia elito eĉ enkadre de la formala demokratio. Aliflanke, mi ne povas imagi aŭtente demokratian potencon sen la garantio de la formala demokratio (escepte ekstremajn, ekzemple militajn situaciojn). La aŭtenta demokratio en mia vort-uzo estas cel-idealo. Mi ne konas ĉimonde aŭtente demokratian socion. Estas, do, mise demandi pri demokratieco ĉu-e kaj respondi jese-nee. La ĝusta demando estas „kiom...?".

Laŭ la konvinko de ni multaj la tut-socia proprietado fakte potencialas pli altkvalitan demokration, sed la tut-socieco de la proprietado sen la formala demokratio restas — nur formala mem. Last-ĉapitre, do, temu pri la formala demokratio.

La akso de la formala demokratio estas la formala, civitana vol-deklaro: balotado, voĉdonado, plebiscito.

Laŭ la balot-sistemo enkondukita en 1949 la Popolfronto difinas la balot-programon kaj kandidatigas la kandidatojn por konsilantoj kaj parlamentanoj. Ĝis 1967 la parlamentaj kandidatoj eĉ ne ligiĝis al konkreta balot-distrikto, kaj ĝis 1971 estis por ĉiuj deputitaj seĝoj po unu kandidato. La balotantoj havis nur la enviinde facilan taskon preni kaj enkestigi la balotkartojn. La popolfronto-komitatoj eĉ poste nemultloke uzis la eblon kandidatigi plurajn kandidatojn, tiu ĉi eblo ne ekhavis praktikan gravecon ĝis la lasta balotado. Sed la lasta balotado jam okazis laŭ nova leĝo. Laŭ la nova leĝo estas devige havi plurajn kandidatojn ĉiudistrikte. La Popolfronto, la distriktaj organizoj aŭ iu ajn balotrajta civitano rajtas proponi kandidatojn al la t.n. kandidatigaj kunvenoj, kaj kandidatiĝas tiuj proponitoj, kiujn akceptas la triono de la suma ĉeestantaro de la kandidatigaj kunvenoj. En tiuj kunvenoj havas voĉdonrajton ne nur la loĝantoj, sed ankaŭ la laboristoj kaj funkciuloj de la koncerna distrikto (do, ankaŭ tiuj, kiuj balotas alidistrikte). La Popolfronto ne plu havas kandidat-proponan monopolon, sed plu havas programmonopolon. La kandidatoj sampapere subskribas la akcepton de la kandidateco kaj la akcepton de la Popolfronta programo. La kandidatoj, do, (teorie) povas reprezenti alternativojn nur pri la loknivelaj detaloj. Tiel oni elektas ĉ. 90%-ojn de la parlamentanoj, la resto estas por la t.n. tutlanda listo. La tutlandan liston pribalotas ĉiuj balotrajtantoj, la ĉi-listanoj sen konkurencantoj havas plu senriskan vojon al la parlamento. Ĉi-liste kandidatiĝas la ĉefaj politikaj gvidantoj, estroj de la tutlandaj politikaj organizoj, reprezentantoj de la eklezioj, de la minoritataj asocioj, de la sindikata centro kaj aliaj konataj personoj (verkistoj, aktoroj ktp.).

La 1985a balot-procezo estis sendube multe pli interesa, efektiva kaj enhav-riĉa ol la antaŭaj. La antaŭ-balotaj kunvenoj (kaj la kandidatigaj kaj la aliaj) multloke (kvankam ne ĝenerale) fariĝis ekscitaj kritikaj forumoj, kie la „podianojn" surfalis kritiko- kaj demando-lavangoj, sed ankaŭ multloke ĉio marŝis tiel sendialoge, fermabuŝe kaj maŝine kiel antaŭe. Entute la spertoj pri la balotado estas tiel heterogenaj, ke oni malfacile povas resumi ilin.

La vidpunkto laŭ kiu estas sencohave pritaksi la balot-sistemon miaopinie estas tio, kiugrade ĝi helpas aŭ malhelpas la vol-deklaron de la civitanoj pri la socievoluaj alternativoj loke kaj tutlande. La program-monopolo jam en si mem malhelpas la konkurencadon de la alternativoj. Plua obstaklo estas la praktikaj propon-principoj de la popolfrontaj komitatoj. Ili preskaŭ nenie klopodis trovi homojn de alternativaj vidmanieroj, sed plurloke nur serĉis senŝancan pretekstulon por platigi la vojon antaŭ la vere dezirata persono. Estis forta propon-faktoro la sociologia proporcio de la delegitaro (elektiĝu proporcie gejunuloj, virinoj, laboristoj, intelektuloj ktp.), kaj multdistrikte konkurencis du pli-malpli samaĝaj, samseksaj, samprofesiaj ktp., kaj estis plej grave, ke ili diferencu nur je la okul-koloro. Tiujn klopodojn multe ĝenis la „spontanaj", ne popolfrontaj proponoj. La civitanajn kandidat-proponojn la lokaj instancoj traktis nerare politika provoko, kaj klopodis malebligi la kandidatiĝon de la proponito ĉu per persona „konvinkado" por retirigi la proponiton, ĉu per manipulado de la kandidatigaj kunvenoj. La kandidatiga procezo kaŭzas multe da problemoj. Laŭ la oficiala raporto 4% de la balotrajtuloj partoprenis la kandidatigajn kunvenojn, kaj ili decidis pri la kandidatigoj. Estis tre simple organizi preskaŭ seninforme kandidatigajn kunvenojn kaj plenigi la kunvenejon per „konfidindaj" homoj por voĉdonigi ilin kontraŭ la kandidatiĝo de la ne-plaĉaj uloj. Pri ĉitipaj anomalioj temis ankaŭ en la kunsido de la jura komisiono de la Popolfronto, kaj verkiĝis eĉ filmo pri ĉi-tiaĵo.

Pro ĉio ĉi la kandidataro estis multe malpli bunta ol la proponitaro aŭ mem la opini-skalo de la kunvenoj. Laŭ la opinisondado de la Amaskomunikada Esplorinstituto tri kvaronoj de la balotintoj ne vidis diferencon inter la kandidatoj. Kaj la plej fortaj elektaj faktoroj estis surfacaj: persona konateco, sekso, aĝo, loko en la listo (tio estis en abc-ordo), belsona nomo, simpatia aspekto ktp. Nur 4% de la enketitoj menciis la programon, la parolenhavon de la kandidato kiel elekto-faktoron.

Estas menciinde, ke inter la malvenkintoj estis ankaŭ aktuale aŭ ekse alt-funkciaj kandidatoj kaj pluraj anoj de CK de la Partio. Ekzemple la estro de la plej potenca

hungara sindikato (tiu de la metal-laboristoj), ankaŭ CK-ano, eĉ 10%-ojn ne atingis. (La sindikataj funkciuloj ĝenerale rolis malbonrezulte). La antaŭnelonga plenpotenca parti-estro de la Departemento Veszprém en sia departemento restis sub 10%.

La tutlanda listo estas duona, nematura solvo de tiu reala bezono, ke la interesoj reprezentiĝu ne nur laŭ geografia dimensio, sed ankaŭ la plej gravaj tutlandaj organizaĵoj, interesdefendaj asocioj, la minoritatoj, la eklezioj ktp. havu reprezentantojn en la parlamenta laboro. Lanĉiĝis la ideo plenumi tiun funkcion future en senata formo, sed ĉiuokaze la deputitajn lokojn oni devus disponigi ne al konkretaj personoj, sed al la reprezentendaj institucioj, kiuj kandidatigus plurajn personojn por siaj deputitaj seĝoj, kaj tiamaniere neniu plu elektiĝus inter privilegiaj kondiĉoj.

Fine mi mencias la problemon pri la senŝarĝigo. La civitana rajto senŝarĝigi la deputiton ĝis nun ne efektiviĝis, kaj la senŝarĝiga procedo eĉ ne estas jure ellaborita.

Unu jaron post la balotado granda parto de la hungaraj plenkreskuloj denove havis okazon je formala vol-deklaro. La okazo estis la t.n. „setlej-konstrua kontribuo", tia hibridaĵo, kiu brile ilustras la transiran staton de la hungara demokratio. La ideo estis la sekva: la konsilantaroj havas malmulte da mono, sed multe da komun-interesaj farendaĵoj, oni uzu la rezervon de la por-komunuma oferemo, pag-volonto de la loĝantoj. La konsilantaroj por konkretaj celoj petu modestan jaran sumon (ĉ. 1-2% de la averaĝa jara salajro) de la loĝantoj – kondiĉe, ke la plimulto de la lokaj familioj konsentas.

La konsilantaroj (eble escepte tiujn de la pli malgrandaj vilaĝoj) ne estis tro fervoraj, ĉar ili antaŭvidis, ke la akceptigo kaj poste la enspezado de tiu „setlej-konstrua kontribuo" konstos multe da laborkapacito kaj ŝvito, la eventuala ne-akcepto faligas la konsilantaran prestiĝon, kaj la esperebla sumo laŭ la franca proverbo estas nur „piso de kulo en la maro". Grandparto de la konsilantaroj tamen ekaranĝis la aferon, ĉar por melki pli abunde la signifajn melk-fontojn estis konsilinde pruvi la sinhelpemon de la loĝantaro, kaj ne ŝajni malkuraĝa por voĉdonigi la lokanojn.

La loĝantoj komprenis la „setlej-konstruan kontribuon" kiel pluan paŝon por financi el la privataj salajroj (kun falanta reala valoro) pli kaj pli da antaŭe buĝete financitaj investo-taskoj. La voĉdonado ne ŝajnis demokratia, sed truda, ĉar ĝi ne okazis sekrete. La aktivuloj de la lokaj politikaj organizaj vizitis la familiojn kaj agitis ilin por jesi. La reprezentanto de la familio devis subskribi aŭ la jeson aŭ la neon. Eĉ se la konsilantaroj ne artifikis anomalie (kio kelkloke tamen okazis), la loĝantoj povis konjekti tion, ke la ontajn decidojn de la lokaj instancoj pri aferoj koncernantaj ilin influos ilia jeso aŭ neo. Malgraŭ tiu timo multloke la neo estis plimulta. Mi ne trovis indikon pri tio, kiomfoje fiaskis la afero en la lando, sed en la plej „ne-ema" ĉefurbo inter la 22 distriktoj nur 10 akceptis la kontribuon (inter ili du nur en la dua turno kun ŝanĝitaj celoj). Eĉ tie, kie oni akceptis la kontribuon, la averaĝa proporcio de la kontraŭvoĉoj estis 30%. En la ĉefurbo ĝis la limdato pli ol triono de la familioj ne enpagis la kontribuon. Eĉ se ĉie enpagiĝus la akceptita kontribuo, la sumo estus malpli ol 2% de la sumaj konsilantaraj enspezoj.

En la kvina artikolo mi jam raportis pri plebiscito en rememstariĝema vilaĝo. Ankaŭ la voĉdonado pri la „setlej-konstrua kontribuo" similis (se ne laŭ formo, almenaŭ laŭ funkcio) plebisciton. La lokaj plebiscitoj tute ne estas leĝe reguligitaj, kaj ankaŭ pri la tutlanda plebiscito temas nur unusola frazo en la konstitucio, laŭ kiu la Prezidio „rajtas dekreti plebisciton pri aferoj de tutlanda signifo", sed estas nescieble, por kiuj kaj kiel estas deviga, se entute... la rezulto de la plebiscito. Depost la dua mondmilito en Hungario ne okazis tutlanda plebiscito. La juristoj nun antaŭpreparas la leĝon pri la plebiscito, sed tio ankoraŭ ne signifas definitivan decidon pri la alparlamentigo de ĉitipa leĝo. En aŭgusto de 1987 la informisto de la ministraro formulis tiel, ke „la evoluo de nia socialisma demokratio verŝajne rezultigos tion, ke pri kelkaj sortodifinaj demandoj ni araŋgos eventuale eĉ plebisciton. Serĉi la formojn kaj la metodojn de tio estas inter la taskoj de la sekva periodo."

La elekto-sistemo ene de la partio estas ankaŭ antaŭ kaj post ŝanĝoj, sed la civitana publiko informiĝas malmulte pri tio. Ĉiuokaze oni elektadas ĉiam pli kaj pli altfunkciajn kadrulojn sekrete inter pluraj kandidatoj. Tiamaniere oni elektis jam eĉ departementajn parti-estrojn (praktike la „unuajn homojn" de la koncernaj departementoj).

La alia ĉefa dimensio de la formala demokratio estas la rilato de la plenum-organoj al la popola suvereneco. Ni jam parolis pri tio, ke en la nuntempa politika superstrukturo la plenum-organoj superpotencas.

Péter Schmidt, altprestiĝa universitata profesoro pri juristiko formulis tiel, ke en Hungario estas ŝtat-administra jur-farado. La parlamenta jur-farado, t.e. la leĝa jurnivelo multe repuŝiĝis. Oni povas tion facile pruvi eĉ kvante. Antaŭ 1945 oni proklamis 60-80 leĝojn jare, inter 1945-1948 50-60 leĝojn, ekde 1950 nur 4-5 leĝojn! La lokon de la leĝoj okupis plenum-organaj dekretoj, ediktoj, rezolucioj, direktivoj. La nombro de la devigaj leĝ-objektoj (t.e. tiuj aferoj pri kiuj estas devige fari leĝojn) estas tre malalta. Praktike dependas de la plenum-organaj kaj partiaj decidoj, kio submetiĝas al parlamenta decido, kaj – *mutatis mutandis* – estas tiel ankaŭ departementa- kaj loka-nivele.

Eĉ rilate la devigajn leĝ-objektojn oni povas decidi sen la parlamento, ĉar la Prezidio laŭ la konstitucio povas *plenrajte* anstataŭi la parlamenton inter la parlamentaj kunsidoj, kaj akcepti „leĝ-fortajn ediktojn", pri kiuj la parlamento eĉ poste ne voĉdonas. La Prezidio praktike estas help-organo de la ministraro, kaj ne de la parlamento (laŭ la ĵus menciita profesoro, Péter Schmidt), malgraŭ, ke la parlamentanoj elektas ĝiajn membrojn. La anstataŭa plen-rajto de la Konsilio estas unu el la plej akre kritikataj elementoj de la aktuala

politika strukturo. Jam esprimis sin kontraŭ tiu konstituciero la Popolfronto, la Komunisma Junulara Asocio ktp.

La leĝoj ofte estas tre framaj, kaj gravaj aferoj decidiĝas nur en la plenumaj rezolucioj, dekretoj de la ministerioj aŭ aliaj plenum-organoj, kaj okazas ofte, ke la plenumaj rezolucioj kontraŭdiras la leĝon, aŭ pro la manko de la plenumrezolucioj la koncerna leĝo efektive ne validiĝas.

La plenum-organoj praktike havas proponan, iniciatan monopolon pri la leĝoj. La ekskluziva metiejo de la leĝproponoj estas la ministerioj kaj la similkarakteraj organoj. La parlamento neniam havas la okazon pritrakti alternativajn proponojn de *malsamaj* organoj. Septembre en 1987 en la parlamento proponis Rezső Nyers (protagonisto de la 1968-1972a reformperiodo, tiutempe sekretario de CK pri ekonomio), ke por la parlamenta diskuto prepariĝu regule alternativaj ekonomiaj, financaj, komercaj kaj socialpolitikaj planoj-proponoj fare de malsamaj organizaĵoj. Al la propono la parlamento reagis per orelfrape brua aplaŭdo.

Sume: estas esence grave ellabori la jurajn rimedojn, la instituciajn kondiĉojn por la sekura efektivigo de la plimulta civitana volo, por havi garantiojn kontraŭ la plenum-organa, „aparata" arbitro. Ĉicele devus disvolviĝi la formoj de la senpera civitana vol-deklaro, la laboro de la parlamento kaj la lokaj, departementaj konsilantaraj kunsidoj devus iĝi kontinua kaj profesieca.

Inter la rimedoj menciendas memkompreneble ankaŭ la Konstitucio. Pri la Konstitucio mi ĉisube (konsente) resumas la studaĵon de István Kukorelli, juristo, sekretario de la Jura Komisiono de la Patriota Popolfronto: la konstitucion, proklamitan en 1949 forte karakterizis la imitado de la 1936a soveta Konstitucio. La samepoke naskiĝintaj kaj samkarakteraj alilandaj Konstitucioj nuntempe estas jam eksvalidaj, kiel ankaŭ la 1936a soveta Konstitucio eksvalidiĝis jam antaŭ jardeko. La hungara Konstitucio malgraŭ la intertempaj modifoj pluvalidas tre simila al sia origina formo.

Nia Konstitucio en internacia komparo montriĝas tre malampleksa kaj tro frama (konsistanta el 76 ∧, el 206 frazoj). (Inter alie) pro la tro ĝeneralaj formuloj kaj pro la preteratento de la specifaj kondiĉoj kaj trajtoj de nia socio, la „Konstitucio ne fariĝis vere viva, ĝenerale mankas ĉe ni la konstitucia pensmaniero. Inter la decidoj de la ŝtataj organoj, aplikantaj la juron, apenaŭ troveblas tiaj, kiuj mencias konstitucieron". La Konstitucio estas entute malofte citata, kaj bedaŭrinde sed kompreneble, malmulte konata. Certaj eroj de la Konstitucio ne realiĝis, la konstituciaj valoroj kaj larealo videble kontrastas." Mi aldonas, ke tiu kontrasto neniam estis serioze analizata, sed estis tro longe tabuo. La leĝ-serio de la lastaj kaj la baldaŭaj jaroj (la leĝoj pri la Konstituci-jura Konsilio, pri la balotado, pri la informado, pri la asocioj, pri la plebiscito, pri la juro-fontoj ktp.) dispuŝos la konstituciajn kadrojn. Estus bezonata nova Konstitucio, kiu respegulus la specifajn karakterojn kaj evoludirekton de la hungara socio, kiu okupiĝas ankaŭ pri la ekonomiaj rajtoj, en kiu la civitanaj rajtoj emfaziĝas kun pli da garantiaj elementoj kaj ne subordigitaj al la ŝtatismaj idealoj.

En la modifita Konstitucio enestas la frazo, ke „la gvida forto de la socio estas la marksisma-leninisma partio de la laborista klaso". Estas tre grava, tre komplika, sed apenaŭ analizata problemo: kiel kompreni tiun ĉi konstitucieron el la vidpunkto de la formala demokratio. Kion signifas la esprimo „gvida forto"? Kiajn rajtojn implicas tiu esprimo, kiajn ne, kiel rilatas la gvida forto al la popol-suvereneco, kiel al la plenum-organoj, kiel enkonstruiĝas la partio la leĝ-faradon, la ŝtat-administrajn procezojn ktp. Ja, ĉiam ekzistis (eĉ se ne homogenaj, nek senŝanĝaj) teoriaj kaj praktikaj respondoj al tiuj demandoj, sed ne ekzistas reguligo kaj jura formaligo. Tiun mankon oni povas kompreni diversmaniere. Ekzemple tiel, ke: ĉar la partio reprezentas en esenca formo la popolsuverenecon kaj la aŭtentan civitanan volon, ĝi havas superjuran plenrajton pere de la diversaj organoj kaj instancoj gvidi kaj administri la socion, la formalaj decid-mekanismoj funkcias nur inter la limoj kaj kondiĉoj difinitaj de la partio. Laŭ tiu kompreno la partiaj proponoj estas ordon-fortaj. Laŭ alia ebla kompreno: la koncerna konstituciero estas sociteoria tezo, konvinko, aserto pri tio, ke la partio reprezentas aŭtente, integre kaj esence la tutsociajn interesojn, kaj tiel per la influo de la parti-proponoj kaj la partianoj la liberaj, ne antaŭpreskribitaj decidoj de la diversaj senperaj, deputitaj aŭ plenumaj institucioj de la suverena civitanaro estos ĝenerale konformaj al la politiko de la partio. Laŭ la unua kompreno la koncerna konstituciero estas postula, kaj la partio estas la gvida ordonanto de la socio, la decidoj nekomformaj al la partiaj intencoj estas kontraŭ-konstituciaj. Laŭ la dua kompreno, tiu ĉi konstituciero estas priskriba, la partio estas gvida influanto de la socio, kaj la decidoj ne-komformaj al la partiaj intencoj malfortigas la validecon de tiu ĉi tezo. La prezentitaj komprenoj estas, ja, polusaj, la politikistoj verŝajne prezentus mezvojan, pli nuancitan kaj laŭ niveloj (strategia, taktika, teoria, praktika ktp.) distingan klarigon pri la „gvida rolo" de la partio, se oni ne preferus lasi ĉi esprimon kun malklaraj konturoj. Ĉiuokaze la fortiĝo de la formala demokratio implicas kaj kondiĉas la proksimiĝon al la dua „kompren-poluso". Tiu politika strukturo, en kiu la parti-proponoj ne nur forme, sed efektive estas nur proponoj por la ne-partianoj kaj ne-partiaj institucioj, en kiu la kompromisiĝo kun la partia starpunkto, eĉ se estas dezirinda, ne estas enda, povas esti akceptebla ankaŭ por tiuj, kiuj dubas pri la traktata konstitucia tezo.

* * *

Senceremonie mi finas la artikol-serion. Mi esperas, ke Vi komprenas nun iomete pli bone, kion oni timas kaj kion oni esperas en Hungario. Ĝis la publikiĝo de tiu ĉi nun tajpiĝanta frazo pasos ĉ. unu jaro. Mi esperas, ke ĝis tiam la morna bildo ĵus finskizita almenaŭ iomete senvalidiĝos. Kaj mi timas, ke ne...

Belartaj KONKURSOJ '88

Rezulto de la Belartaj Konkursoj de UEA en 1988

Poezio: **1-a premio:** Mauro NERVI (Italio) pro „En mansardo"; **2-a premio:** Mauro NERVI pro „Ŝi diris, ke..."; 3-a premio: István ERTL (Hungario) pro „El la libroj de forgeso kaj komenco". Honora mencio: István ERTL pro „Raporto de Tezeo pri la lastaj horoj de la iama juda kvartalo" kaj Baldur RAGNARSSON (Islando) pro „Lingvoj" kaj „Baroj". Partoprenis 79 verkoj de 33 aŭtoroj el 16 landoj.

Prozo: **1-a premio:** Sten JOHANSSON (Svedio) pro „La ĉokolada biskvito"; **2-a premio:** Tibor SEKELJ (Jugoslavio) pro „Facilanima virino"; **3-a premio**: Meva Maron (Britio) pro „Rubusoj". Honora mencio: István ERTL pro „La deka logo" kaj Sten JOHANSSON pro „Renkontiĝo kun boaco". Partoprenis 37 verkoj de 22 aŭtoroj el 11 landoj.

Teatraĵo: **1-a premio:** ne aljuĝita; **2-a premio:** ne aljuĝita; **3-a premio:** Emilija LAPPENA (Jugoslavio) pro „Lanĉo". **Honora mencio:** Eduard V. TVAROZEK (Ĉeĥoslovakio) pro „Kesto da venenaj serpentoj" kaj „Je la dua post noktomezo". Partoprenis 7 verkoj de 5 aŭtoroj el 4 landoj.

Eseo: **Premio „Luigi Minnaja":** Bernard GOLDEN (Hungario) pro „Piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj". Partoprenis 7 verkoj de 6 aŭtoroj el 4 landoj.

Kanto: **Premio „An-okin pri Kanto":** Antoaneta ATANASOVA (teksto) kaj Ŝerafima DJUTĈIN (muziko) el Bulgario pro „Epitafo" kaj „La sciuro". Partoprenis 18 kantoj de 9 aŭtoroj aŭ aŭtoraj duopoj el 6 lanodj.

Fotografio: **1-a premio:** Gerrit KALKMAN (Nederlando) pro „Esperanto-transpontas-teknikon-sciencon"; **2-a premio:** Bertil DANIELSSON (Svedio) pro „F-ino Fabeck kvarjara"; **3-a premio:** ne aljuĝita.

Nova Talento: Krys UNGAR (Britio) pro la poemoj „Preludo kaj fugo", „Februaro" kaj „Aŭtuna korkanto". Lia nomo estos gravurita sur la pokalo **„Henry Harabagiu"**, konservata en la Centra Oficejo de UEA.

Infanlibro de la Jaro 1987: „La fratoj Leonkoro" de Astrid LINDGREN, tradukita kaj eldonita de Kerstin ROHDIN (Svedio). Partoprenis 7 libroj de 7 eldonejoj el 7 landoj.

Komisiono pri la Belartaj Konskursoj de UEA

V. BENCZIK, prez. **O. BULLER, sekr.**

Krys Ungar (Britio)

Nova Talento

PRELUDO KAJ FUGO

Dum la longaj vintraj noktoj, kiam
Triste tintas glacieroj, tiam
Senviviga malespero batas
Korojn. Lacaj arbskeletoj gvatas
Sub ĉielo nigre peza, kie
Mortopala luno senpasie
Ŝvebas inter densaj nubvualoj.
Tra l'aer' eksonas ŝtormtimbaloj.

Kaj la ter' atendas morne ĝis
Milda vent', per dolĉe varma kis'
Ĝojigas, fajfante gajigas!

Vekiĝas papilioj,
Flugetas tra l'folioj,
Koketas al la bravaj
Burĝonoj verde flavaj.
Senzorge, jubilante,
Sur branĉoj babilante
Birdetoj pepas flue.
Fanfaron blovas ĝue
Trumpetoj dafodilaj
Al sunradioj brilaj.
Ridetas la primoloj,
Malkaŝas sin violoj.
La tuta mondo festas,
Printempo ja ĉeestas!



Izolda Macskássy: Festo de la libro

Belartaj KONKURSOJ '88

Mauro Nervi (Italio)

Originala Poezio
Unua Premio

En mansardo

Dediĉe al R.

Tagoj aŭroris malfacile ekster la vitraĵ'
— blanke glacia lumo, solje de l' mateno —; vi rigardis
silente mian manon sur kuseno, dum ekstere
homoj klaĉadis, motoro ekfunkciis,
kaj kamion' forglitis sur la streta vojo
trans la fenestro, klakis la hejtilo, per muzik'
zumadis aparat' en dom' najbara; sub la traboj
tegmentaj vi silentis, kaj nur vintro, vintro regis.

Kaj nun, ho amiko, ĉio delonge foras,
ĉi aŭtunon enkrozas disvele mia spleno.
Disciplino alvokas, sed por mi, naskiĝinta sub Kankro,
vi scias, gravas lunoj kaj opaloj: mia mano
iam atingos vin trans la vortico, kaj denove
jen ĉio, mansardo kaj kuseno... Al la nordo
komenca, kvazaŭ por plenum' de l' teoremo,
harmonie kaj dolĉe revenos la kompaso.

Mauro Nervi (Italio)

Originala Poezio
Dua Premio

Ŝi diris, ke....

Ŝi diris, ke mi devus paroli
pri ambaŭ ni; ĉar sezonoj mikse ludas
depost nia renkontiĝo: septembro en april',
en februar' junio. Ŝi diris, ke amindaj estas
mia moralo kaj mia maltrankvilo —
ne multon alian cetere mi posedas,
tamen ĉi ecoj amindas ja.
Kaj sur la ŝaktabulon de ŝia ironio
mi ĵetas do la loton de miaj versoj; jen,
ke ŝi ridetu, ke ŝia simpla kaj dura simetrio
mirinde reokazu, super ĉia mondkonfuzo.

István Ertl (Hungario)

Originala Poezio
Honora Mencio

Raporto de Tezeo pri la lastaj horoj en la iama juda kvartalo

Al Endre Lábass

Ĉi-nokte mi penetris la intestojn
de la insida urbo, kiu tenas
nin ĉiuj en la kaĝoj de l' embusko.

Mi venis por kolekti la impostojn
de la senhonta vero de l' distrikto
— ĉi tie trompe pompaj ĉefŝtuparoj
sendentas en la malĉiela lumo
de ampoloj pendumite pendolantaj
tra jaroj alvenontaj kaj pasintaj —,
sed la korvoj min vidis proksimiĝi,
ili forlasis la kornicojn are,
kaj nun mi sola serĉas en la stratoj laŭ la faden'
eliron Minotaŭron

(Kupolojn mi aspirus, kampanilojn,
sed kirkoj mute altas en aliaj
urboj; la mia nur kanalojn havas,
kavernajn kortojn kaj kioskojn kaŭrajn.)



Grafikaĵo de Árpád Müller

Sten Johansson (Svedio)

Originala Prozo
Honora Mencio

Belartaj KONKURSOJ '88

Renkontiĝo kun boaco

Dum la lasta somero ni iris al Nordkabo. Kiel miloj da samlandanoj ni kondukis nian aŭton milojn da kilometroj norden por rigardi la noktomezan sunon brili el nordo super la mara horizonto.

Tiel ni iris laŭ la fjordoj, mirinde bela vojo, almenaŭ kiam ni kuraĝis rigardi. Ĉe Nordkabo ni gvatis grizan maron, grizan ĉielon kaj nian brakhorloĝon dum kelkaj horoj, du noktojn en vico. Poste ni turnis nin suden kaj prenis vojon tra la internaj regionoj. Tiel bela kaj timiga kiel la fjorda vojo, tiel teda kaj enuiga estis tiu vojo tra mizera arbaro kaj marĉoj. Kaj tamen nia ĉefa memoro de la ferioj estas el tiu reveturado suden.

Ĉe iu dezerta ŝoseo proksime de la Muonia rivero grego de boacoj trankvile promenis laŭ la vojrando. Ni malmulte atentis, ĉar ni jam alkutimiĝis al tiuj bestoj kaj ilia stranga trotado, simila al fluanta akvo. Mi diris nur ion pri la ebleco trovi boacan kornon, se oni irus iom for de la ŝoseo. Sed Hanne, mia edzino, opiniis ke se ni trovus iun, tiu verŝajne estus malnova kaj plena de vermoj, kiujn ŝi ne deziris kunporti al nia lando kaj hejmo.

Tiam unu besto saltis tuj antaŭ nin. Mi reflekse turnis maldekstren, sed vane. Forta, obtuza bruo, la aŭto skuiĝis kaj mi sentis la bruston premiĝi al la sekurzono. Haltinte, ni konstatis ke koliziis kun ni bela granda virboaco. Ĝi ne sangis sed kuŝis morta sur la pavimo. Ni ŝovis ĝin flanken. Sur la kapoto estis malprofunda kavo, sed nenio grava.

– Ni devas raporti al iu! – diris Hanne.

– Al kiu? – mi demandis. – Estas ja besto kiu libere vagas, centojn da kilometroj. Pli-malpli sovaĝa bruto. Nekredeble ke oni ne ŝirmas la ŝoseon kontraŭ ili. Estas ja mortdanĝere!

– Sendube, ĉiuokaze por ĝi, – diris la kara edzino, karesante la felon. Cetere, vi bone scias ke ĝi havas posedanton, kiun spertulo povas identigi laŭ la orela signo. Ĝi tute ne estas sovaĝa besto!

– Ĉiuokaze ni ne scias legi tiun laponan alfabeton, kaj la ĉirkaŭaĵo estas dezerta, eĉ la ŝoseo. Ni pluiru!

Hanne hezite prenis lokon en la aŭto, kaj ni ekiris. Kiam post nur du kilometroj ni pasis bieneton kie fumo leviĝis el la fumtubo, ŝi decidis:

– Haltu. Ni iros sciigi pri la boaco.

Mi sekvis ŝin. La bienulo estis hejme, la kafo staris surtable, almenaŭ ia supo kiun li nomis kafo, kaj ni komencis klarigi kion ni volis komuniki. Ni interparolis dum longa tempo, ni germane kaj angle, li sendube finne kaj svede, kaj ĉiuj tri per la internacia lingvo de gestoj, kies gramatiko kaj radikaro tamen montriĝis surprize malgranda.

Resume: nia informo tre amuzis lin, por ne diri ĝojigis. Laŭ li, la laponaj boacbredistoj intence pelas la bestojn al la ŝoseo por ke aŭtoj mortigu ilin, ĉar por tiel mortigita boaco la ŝtato donas kompenson. Precipe post Ĉernobilo, tio estas la ĉefa maniero akiri monon per boacoj.

Mi ne povas diri ke mi kredis al li. Lia diro, aŭ ĉu mi diru lia teatra prezentado, al mi ŝajnas fonti el antigonismo inter la bienulo kaj la boacisto – jen simpla esprimo de nacia antaŭjuĝo. Malgraŭ tio, ni konkludis ke ne indus peni plu raporti la akcidenton al iu. Sekve ni adiaŭis la nordan bienetulon kun la intenco pluiri suden.

Ekironte mi tamen memoris unu aferon: ni forgesis fotografi la boacon. Fakte, ankoraŭ mankis al ni taŭga portreto de boaco, ĉar la malĝentiluloj ĉiam forkuris kiam ni haltis kaj levis fotoaparaton. Mi decidis reiri la mallongan distancon por eternigi la forpasintan beston. Verdire, al Hanne la ideo ne plaĉis, sed ŝi ne rifuzis kuniri.

La boaco kuŝis ĉe la vojrando. Mi kun peno ŝovis ĝin al apuda roko por iom apogi la kapon. Ĝi eĉ ankoraŭ ne malvarmiĝis. Nia vizito ĉe la bienulo do eble ne daŭris tiel longe kiel ŝajnis al ni? Farinte unu foton mi ekhavis pli bonan ideon. Mi malvestis mian jakon, metis ĝin sur la ŝultrojn de la mortinta besto kaj krome pendigis mian binoklon ĉirkaŭ ĝian kolon. Mian karan edzinon mi volis starigi apude, sed ŝi ne volis kunpozi. Kiom pli malfacile instrukcii al viva aktoro ol al mortinta! Nu, kun aŭ sen Hanne, mi volis fari la amuzan portreton, sed rigardante tra la okulario mi preskaŭ svenis. Senpova mi devis vidi la bestaĉon leviĝi, ĵeti tien-reen la kapon, salteti, kaj forkuri de la ŝoseo, vestita per bonkvalita lanjako kaj taŭga japana binoklo.

Kompreneble mi klopodis sekvi ĝin. La rezulton ne necesas priparoli. Kaj kiel la kara leganto sendube jam divenis, mia monujo kaj pasporto kuŝis en jakpoŝo. Mi preferas ne detale priskribi la interparolon en la banko, kie mi devis anonci la malaperon de la vojaĝĉekoj. Se tiuj nordaj ŝtatoj almenaŭ aliĝus al la Eŭropa Komunaĵo, tiel ke ne plu necesus al ni pasporto! Sed ne, ankaŭ ĉe la polico mi devis ripeti la historion: ne sinjoro, mi tute ne ŝercas; jes, mi estas tute sobra; ne, en mia lando efektive neniam okazis al mi kolizio kun sovaĝa besto; jes, sendube nia ambasado sendos taŭgajn vojaĝdokumentojn.

Nun, kiam homoj demandas pri la vojaĝo al Nordkabo, mi diras simple:

– Nu, la noktomeza suno efektive estas neforgesebla spektaklo, sed la veturado estas iom tro longa kaj enuiga.

Tibor Sekelj (Jugoslavio)

Belartaj KONKURSOJ '88



Originala Prozo
Dua Premio

Facilanima virino

– Ĉu vi scias, Eleonora, kiam mi la unuan fojon aŭdis paroli pri vi?

Ne, ŝi ne povis eĉ imagi. Ne nur ĉar mi mendis jam la trian botelon da vino, sed ankaŭ ĉar la cirkonstancoj estis iom strangaj. Eble mi faris la demandon iom pli laŭte ol necese, ĉar ankaŭ la kelnero dormetanta malantaŭ la servotablo subite levis la kapon por subaŭskulti la interparolon de la solaj gastoj en la angulo de la kela drinkejo.

– Okazis tio en la mezamerika urbo G., kie mi apartenis al iu rondeto de literaturamantoj. Dum kunveno unu el la rondanoj priparolis lokan poeton M., kiu estis diplomato de tiu lando en Eŭropa ĉefurbo.

– Nu, jes, mi komprenas ke ligite al li vi aŭdis ankaŭ pri mi. Li ja estis mia edzo, – diris Eleonora klinante la glason kun ruĝvino, eĉ ne levante la rigardon al mi.

Mi daŭrigis la temon.

– La rakontanto faris longan parentezon koncerne la poeton, kaj larĝe parolis pri vi al la aŭskultavida rondeto. Laŭ li, vi venis en tiun ĉi urbon kiel deksepjara knabino, por viziti vian onklon G., ankaŭ diplomaton, vivantan ĉi tie kiel fraŭlo. Li kondukadis vin al diplomataj festoj, fiere vin prezentadis kiel nevinon, kaj vi carmis la ĉeestantojn per via beleco kaj juneca vervo. Sed, komprneble, neniu kredis je tiu simpla „onkla-nevina" rilato.

Mi ekrigardis mian amikinon, por vidi ĉu mi eble ofendis ŝin, aŭ tuŝis malagrablan detalon de ŝia vivo. Sed nenion tian mi rimarkis. Kontraŭe, ŝajnis al mi ke ŝi iomete ĝuas la rakonton pri si mem. Kaj mi daŭrigis:

– En unu el la kunvenoj vi konatiĝis kun la juna poeto M., al kiu vi iom poste edziniĝis.

– Korekte li estis informita. Mi fariĝis edzino de M.

– Sed post kunvivado, kiu ne atingis du jarojn, li mortis. Tamen, via vidvineco ne estis tro soleca. Kiam vi restis sola, vi pakis viajn valizojn kaj foriris al sunoplena marbordo por gasti ĉe la poeto D., sub la preteksto de ordigo de iuj financaj rilatoj inter li kaj via mortinta edzo. Ĉu korekte?

– Jes, certe, – diris Eleonora duonfermante la okulojn dum ŝi ellasis la cigaredfumon tra la naztruoj. – Nu, daŭrigu.

– Tiu vizito daŭris ses monatojn kaj, kompreneble, al ĉiu estis klare ke ne temis nur pri financaj diskutoj.

Voĉoj aŭdiĝis de la ŝtuparo kiu de la strato kondukis en la kelon. Du ebriuloj enrigardante vidis la preskaŭ malplenan volban kelon kaj tuj restumblis la ŝtuparon supren. Denove ni restis solaj en la angulo de la humida medio de tiu mezepoka volbaĵo, kun profunde enmasonigitaj fenestroj.

– Kelnero, bonvolu alporti pluan botelon da ruĝa vino. Kun la vino alvenis ankaŭ telereto kun manĝetaĵoj.

– Kiam vi revenis, kompreneble, vi ne elfalis el la diplomatia rondo. Oni diras ke troviĝis tie sufiĉaj manoj pretaj de tempo al tempo etendiĝi por akcepti perditan ŝafidon.

– Kaj kio okazis poste? – Nora, kiel mi intime nomis ŝin, instigis min al plua rakontado.

– Poste? La situacio jam fariĝis pli klara kiam vi denove edziniĝis, ĉi-foje al la piloto S. Nun jam restis nenia dubo ke vi trovis la ĝustan vivoparon por vi, kaj malgraŭ liaj oftaj forestoj, vi vivis feliĉan geedzan vivon. Pri tio mi konvinkiĝis plej bone aŭkultante vian prelegon pri lia personeco, en la mezamerika urbo, kie ni konatiĝis. Post lia iom mistera morto vi restis vere sola, kun sakopleno da impresoj kaj travivaĵoj neripeteblaj.

– Neripeteblaj kaj neforgeseblaj. Li estis pli ol piloto. Lia spirita kreivo estis nekredebla.

– Post tiu periodo ŝajne mia informanto perdis vian spuron, ĉar li nenion pluan povis diri pri via posta vivo.

– Mi mem ne scias kiel mi travivis tiujn militajn kaj postmilitajn jarojn! Mi kaŝadis min ĉe provincaj parencoj. Jaroj devis pasi antaŭ ol mi povis komenci normalajn homajn rilatojn.

– Kiam ni renkontiĝis en Mezameriko, ŝajnis al mi strange ke vi post nur unuhora interparolo invitis min gasti ĉe vi, se mi iam hazarde venos al Eŭropo. Kaj jen mi jam la duan fojon „hazarde" estas via gasto, kaj ne nur gasto sed ankaŭ via daŭra admiranto.

– Nu, ne mirigu vin la rapida invito. Ĝi ne estis hazarda. Mi sopiris je kontakto kun veraj homoj. Via ŝaŭmeca spirito, libera kiel papilio, kiu reflektiĝas ankaŭ en via vivmaniero, ege memorigas min je mia mortinta edzo.

Pasis jam la tria horo post noktomezo. Mi levis la kapon kaj rigardis direkten al la kelnero. Li tuj preparis nian konton kaj rapide alportis ĝin. Kaj li estis certe seniluziiĝinta, kiam, anstataŭ pagi, mi diris per distra voĉo:

– Ankoraŭ unu botelon kaj teleron da manĝetaĵoj, mi petas.

Iun tempon ni silente ŝmacis kelkajn bagatelaĵojn. Mia amikino ŝajnis estis profunde droninta en siajn rememorojn. Mi sentis la momenton oportuna por starigi la demandon, kiun mi formulis iom timeme:

– Kara Nora, ĉu vi konsentas kun la komentoj de mia informanto? Ŝajnas al mi, ke vi povus aldoni kelkion.

– Jes, kelkion.. certe...!

Anstataŭ pluaj demandoj mi kovris per mia manplato

Belartaj KONKURSOJ '88

la pli malvarman manon de mia amikino. Ŝiaj verŝajne artefarite blondaj bukloj ĉirkaŭis la delikattrajtan vizaĝon kun ekestantaj sulketoj apenaŭ kaŝeblaj. Post kelkaj minutoj ŝi ekparolis:

– Jes, multaj pensis ke mi estas amatino de mia onklo G., ĉe kiu mi gastis dum longa tempo. Kaj se iu tion sugestis, nenian kontraŭargumenton mi havis. Mi povis nur simple ridi kaj ŝerce preni la rimarkon. Tamen, la vero estas, ke tia problemo neniam aperis. Mia onklo prezentadis min, kaj invitadis al festoj kaj kunvenoj, por iel rejunigi sin mem. Kvazaŭ li portus rozburĝonon en la butontruo. Sed pri sekso li neniam faris al mi aludojn.

Tial li kun plezuro konsentis ke mi edziniĝu al la poeto kaj diplomato M.

Ankaŭ mi ĝojis, ĉar li estis saĝa, simpatia kaj bona amiko. Sed la ĝojo estis mallongdaŭra. Pasis tagoj kaj noktoj, pasis semajnoj, kaj mia edzo eĉ ne tuŝis min. En mia embaraso mi klarigis la situacion al mia plej bona amikino, ankaŭ diplomatedzino, pli aĝa kaj pli sperta ol mi. Ŝi donis al mi konsilon kuraĝan sed akcepteblan: „vespere, kiam li enlitiĝas, senvestigu vin tute, kaj eniru lian ĉambron. Tiam vi vidos kio okazos."

Tiel mi faris. Li sidis en sia lito okupita per korektado de presprovaĵoj, kiam mi aperis en lia pordo, nuda kiel mi naskiĝis. Unue li rigardis min surprizite super la okulvitroj, poste depreninte ilin li diris per tre karesema voĉo: „Kolombino mia, kio okazas? Ĉu vi ne povas dormi? Venu rapide en mian liton, por ne malvarmumi". Mi, kompreneble, volonte obeis, kaj post kelkaj delikataj kisoj kaj karesoj, li resendis min en mian ĉambron. Post jaro kaj duono li mortis. Eble li antaŭsentis tion, kaj ne volis komenci amvivon kiu baldaŭ devos ĉesi."

La ekscio ke Eleonora eliris el sia geedza vivo kiel virgulino, vere frapis min. Mi sentis la bezonon diri ion por ke la rakonto ne haltu ĉe tia morna momento:

– Sed ne diru ke vi restadis ses monatojn ĉe la marborda poeto nur por ordigi financajn aferojn!

– Tion certe mi apenaŭ faris. Sed ne kredu ke multe pli ol tio okazis inter ni. Eĉ ne venis al mi la ideo ekkuŝi kun tiu ekzaltita olda sifilisulo! Jes, mi gastis ĉe li ses monatojn, sed samtempe gastis ankaŭ aliaj, kaj li tute ne estis okazo por mi.

La iom pli longan silenton mi denove interrompis:

– Sed ne diru al mi ke vi atendis la alvenon de via piloto kun via knabina virgineco.

– Tio fakte okazis. Mi ne estis preta por eksperimentado.

– Nu, sed fine vi enflugis kun la piloto en trankvilan kaj normalan aerhavenon...

– Aerhavenon, jes. Sed nek trankvilan nek normalan. Amo abundis. Pasia kaj sindona. Ambaŭflanke. Ekscitiga, aventuroplena vivo. Ĉio. Jes, preskaŭ ĉio. Mankis tamen io... io eble esenca.

– ???

– Ĉu vi vidas tiun botelon sur la fenestro?

Sur la fenestrobreto en la niĉo de la dika brikmuro, preskaŭ super niaj kapoj, staris unulitra verda botelo. Kapjese mi agnoskis ĝin.

– Tia estis lia aparato. Neeble komunikiĝi. Estis teruraj tagoj, se majnoj, ni estis malfeliĉaj, senesperaj. Ni travivis ĉiujn fazojn de la purgatorio kaj de la infero... ĝis kiam fine, nia amo estis tiel granda, ke ni forgesis kie estas la buŝo, kubuto, brusto, akselo... ni simple kunfandi ĝis en amo-amason...

Sekvis fantazie feliĉaj tagoj, kvankam strangaj rigardataj de ekstere. S. estis pli da tempo survoje ol hejme. Sed subite li telefonis de alia kontinento: „Venu morgaŭ al Kazablanko, ni pasigos tie unu tagon kune". Kaj mi flugis tien per mia sporta aviadileto, kaj ni vivis en paradizo dum plena tago. Alian fojon la invito flugigis min al alia mondparto. Kaj mi estis ĉiam preta. Por tio mi vivis... Ĝis la katastrofo kiu lin forportis."

Eleonora restis longe enpensiĝinta en siajn rememorojn, tiel ke ŝi eĉ ne rimarkis kiam mi mendis taksion. Ni suprenstumblis la ŝtuparon kaj silente hejmenveturis.

Ni jam estingis la lampojn, sed la dormo ne volis alveni.

Eleonora en mia imago plene ŝanĝiĝis. El facilanima virino ŝi fariĝis sanktulino.

Kaj mi? Tiun nokton mi sentis min iom la fiera onklo, iom la malsana poeto, iom la senespera piloto.

Sed neniel mi sukcesis esti mi mem... al kiu ŝi tiel senespere sopiris.

Sándor Plugor: Muzo

Demonstracio por Transilvanio

La 27-an de junio en Budapeŝto pluraj dekmiloj demonstraciis en Budapeŝto por la savo de 7000 likvidotaj vilaĝoj en Rumanio. La demonstraciantoj deziris transdoni skriban proteston al la rumana ambasadoro, sed la pordoj de la ambasadejo restis fermitaj.

Kiel sciate, en la kadroj de la t.n. „plano de sistemigo" oni likvidos ĉ. sep mil vilaĝojn, el kiuj la plej multajn loĝas hungaroj kaj germanoj. La plenumo de tiu plano egalos al kultura genocido, ja la forŝiro de la kulturaj radikoj de tiuj minoritatoj treege akcelos ilian rumanigon. Sur nia foto: la demonstraciantoj portas tabulojn kun la nomoj de la likvidotaj vilaĝoj. (Foto de Z. Fejér.)

Dek unu ormedaloj

Superis ĉiun esperon la atingoj de la hungaraj sportistoj en la ĉijaraj olimpiaj ludoj en Seŭlo. Ili akiris dek unu orajn medalojn, kvankam oni antaŭvidis ne pli ol kvar-kvin. Kun tiu rezulto en la neoficiala tabelo Hungario povis okupi la sesan lokon inter 160 partoprenintaj landoj. Sur nia foto: la novaj ĉampionoj dum la varma oficiala akcepto en Budapeŝto.

VETÓMAG
BELFÖLDI ELLÁTÓ KÖZPONT

Ne nur florojn, ankaŭ legomojn en la ĝardenojn !

Multaj homoj ŝatas la ĝardenojn, kvankam ne ĉiu apartenas al la vico de la profesiaj ĝardenistoj, kiuj plejofte specialiĝas en la kultivado. Estas kiuj kultivas nur iujn el la multaj legomoj, ekzemple nur brasikojn, kompreneble ties plurajn speciojn, eĉ se ne ĉiujn. Specialiĝinte akumuliĝas pli da spertoj kaj fakscioj – tio estas ja bone konata. Tiun direkton sekvas multaj ĝardenantoj, kiuj jen hobie, por propra plezuro, foje nur por sin okupi, tempon pasigi kreas familian ĝardenon, jen pro biologia interesiĝo kaj studemo ĉirkaŭ ŝatataj vegetaĵoj. Tamen troveblas ne malmultaj, kiuj volonte ĝuas la florplenan terpecon apud la domo, sed ankaŭ deziras akiri iom por la kuirejo, ne malofte la familian kason iom ampleksigi vendante la hejme superfluajn florojn aŭ legomojn.

Kiel ajn estas la deziroj kaj emoj rilate la ĝardenojn, estas bone rimarkebla la tendenco: ĉie ajn kreskas la ĝardenkulturo, kaj ne sole la tersurfaco de la ĝardenoj, sed ankaŭ plimultiĝas la kultivataj specioj ĉu de floroj, ĉu de legomoj, kaj aparte kreskas ĉiurilate la kultivado de la ornamplantoj.

La amikoj de la ĝardenoj, la profesiuloj kaj la amatoroj de la ĝarde-

Draĝeo -farejo

Digitalo
(Digitalis purpurea – plurjara)



noj konsentas pri la premiso de tiu agado: nepre necesas bonkvalitajn agado: nepre necesas bonkvalitajn semgrajnojn akiri de specialiĝintaj institucioj. Efektive nur tiuj kapablas kontentigi la nuntempajn bezonojn, zorge selektante la eventuale tordiĝintajn, misiĝintajn semojn, kiuj neeviteble aperas dum ĉiuj reproduktaj procedoj. Por ne mencii la genetikajn metodojn uzendajn por plibonigi laŭ difinitaj postuloj la subspeciojn.

La Entrepreno Semgrajno jam depost la jaro 1962 organizas la komercadon de la semgrajno-produktaĵoj kaj de floroj, kaj de ornamplantoj, kompreneble ankaŭ de legomoj. Tiucele oni devas akiri la plej zorge elektitajn varojn el produktaĵoj de la hungaraj specialistoj, same de la eksterlandaj. Aliflanke tiuj semgrajnoj, kolektitaj de la entrepreno, estas vaste vendataj kaj en la hungara, kaj en la eksterlanda merkatoj. Por konvene kontentigi la bezonojn de la ĝardenkultivantoj, profesiaj aŭ nur hobiaj, la entrepreno devas nepre funkcii jen kiel importanto, jen kiel eksportanto de bone merkatigeblaj semgrajno-varoj.

Estas inde demonstri al la publiko gravan departementon de la entrepreno, nome la agadon de la *Enlanda Komerca Centro* (EKC). Ĝi havas la taskon provizi la loĝantaron, same la grandbienojn kaj etfarmistojn, la grand- kaj etkomercistojn per pakumitaj semgrajnoj ĉiaspecaj.

El inter la legomoj estas proponataj ĉirkaŭ ducent subspecioj de almenaŭ tridek specoj, respektive ties semgrajnoj, krome multaj aliaj importataj semgrajnoj, kiuj ne apartenas al la kutima, ĝenerala kultivado en Hungario.

Ĉiujare aldoniĝas al la oferto ankaŭ novaĵoj, por pliampleksigi la gamon de la aĉeteblaj varoj, sed ankaŭ por veki la intereson ĉe la ŝatantoj de delikataj spico-vegetaĵoj kaj kontentigi iliajn postulojn.

Precipe larĝaj estas la sortimentoj de semgrajnoj de fazeoloj, pizoj, delikataj maizoj kaj herboj, pakumitaj laŭdezire kaj tre diversmaniere.

Oni ofertas multe da florgrajnoj; el inter la unusezonaj floroj tricent subspecioj de ĉirkaŭ sepdek specioj estas elekteblaj, el inter la du- kaj plursezonaj floroj por kvardek specioj estas grajnoj aĉeteblaj.

La ŝatantoj de ornamplantoj trovas grandan sortimenton precipe de bulbaj plantoj, kiuj estas sufiĉe popularaj en la Hungarlanda hortikulturo.

Gloksinio (Gloxinia hybrida – florpota)



Tigo-brasiko (Szentes – blanka)

La eksterordinare vasta sortimento, ampleksiganta preskaŭ ĉion necesan en la hortikulturo, estas dankinda al multaj negocaj kontaktoj kun la grandkomercistaj firmaoj, kun plurcento da etkomercistoj kaj produktejoj. Al tiuj ligiĝas aliaj unuoj de la entrepreno kiel partneroj, liverantoj de multe bezonataj kaj de ili pakitaj semgrajnoj.

La diversmaniere enpakitaj kaj alimaniere dozitaj semgrajnoj estas ne nur ofertataj en la vendejoj. La aĉetantoj – sed ankaŭ aliaj interesiĝantoj – ricevas laŭbezone fakajn konsilojn kaj proponojn, prezentadon de novaj kaj novaj specioj, multajn informojn necesajn eĉ al la fakuloj.

Por plivastigi la merkatajn kontaktojn, la entrepreno prezentas sin en foiroj, ekspozicioj kaj en diversaj borsoj. Ankaŭ en tiuj lokoj la interesiĝantoj ricevas multe da fakaj konsiloj dum ili aĉetas aŭ mendas ion el la semgrajnoj vendataj de la entrepreno, unuavice koncerne tiujn, kiuj estis selektitaj en Hungario.

Ofte okazas prezentadoj de novaj specioj de la entrepreno, kun la celo rekonigi ilin kun la ĝardenkultivantoj, veki ĉe ili intereson utiligi la novajn speciojn en la parkoj kaj ĝardenoj. Tiuokaze la entrepreno ĉiam klopodas aranĝi interparolon de rekonataj kaj prestiĝaj fakuloj ĉu hungaraj, ĉu eksterlandaj, krome ebligi apud la interŝanĝoj de spertoj ankaŭ prezenton de iliaj konkretaj agadrezultoj.

Tre multspecaj sortimentoj troveblas ĉe la entreprenaj vendejoj el pakumitaj semgrajnoj. Aparte ili zorgas pri la plej bonkvalitaj semgrajnoj al la posedantoj de la apuddomaj kaj feriaj ĝardenoj. Daŭra estas la klopo-

Kapsiko (Fehérözön)

do plibeligi la eksteran aspekton de la pakumoj, moderniganta la pakadteknologion per gravaj investadoj. Neniam estas forgeseble en tiu rilato, ke la pakmaterialoj kaj la paka metodo ankaŭ devas protekti la kvaliton de la grajnoj. Tiucele oni faras daŭre eksperimentojn por trovi pli kaj pli konvenajn manierojn de la pli ĝusta pakado.

Forte konsilinde estas elekti el la pakumitaj semgrajnoj la draĝeitajn semojn. Zorge plenumante la preskribitan teknologion de la semado, tiuj draĝeitaj semoj alportas tre favoran rezulton al la kultivanto.

Kompreneble la pakumado estas multmaniere disvolvebla por igi pli plaĉa, flanke de la entrepreno, precipe se tiurilate venas laŭcelaj postuloj flanke de la mendantoj, ĉu enlanda, ĉu eksterlandaj. Forte zorgante pri la kvalito de la pakumadoj, ĉiam aldoniĝas ankaŭ la bazaj informoj kaj instrukcioj por la utiligantoj.

La multaj klopodoj kaj penoj de la entreprenaj fakuloj abunde montriĝas – je ilia vera kontento – rimarkante la belajn rezultojn tie, kie

Petunio (Petunia hybrida Superbissima – unujara)

la vasta publiko renkontas ilin: en la pliboniĝintaj riĉaj sortimentoj de multaj magazenoj de legomoj kaj florvendejoj.

Esperantigis: *E. F*

Petroselo (Longa)



Enlanda Komerca Centro (BEK)

Budapeŝto, VII., Rottenbiller u. 33.)

Vendejoj: Budapeŝto, VII., Rottenbiller u. 35.
Dunaújváros, Piac tér 6.
Szentes, Köztársaság tér
Sárbogárd, Tanácsköztársaság u. 128.
Cegléd, Arany u. 4.

20-a de aŭgusto

La 20-a de aŭgusto estas triobla festo por hungaroj: ĝi estas tago de la nova pano, memortago de la unua hungara reĝo Sakta Stefano, kaj tago de la Konstitucio.

Ĉijare la centra festo de tiu tago okazis en Székesfehérvár, urbo de Sankta Stefano, kun la partopreno de reprezentanto de la papo. La feston inaŭguris parolado de la nova prezidanto de la Prezidio, profesoro Bruno F. *Straub*, kiu estas la unua ne-partiano en alta ŝtata posteno depost longa tempo. Sur nia foto: Bruno F. *Straub* (meze) dum la festo.



Hungara aŭtomobilo

Dum la aŭtuna Internacia Foiro en Budapeŝto la publiko povis vidi aŭtomobilon, kiu estis produktita en Hungario. Ĝi estas malgranda, „enurba" aŭtomobilo, kiu ricevis la nomon „Puli" („pulio", t.e. malgranda, karakterize grandhara hungara ŝafisthundo).

Tamen, tiu novaĵo verŝajne ne mildigos la grandegan mankon de aŭtomobiloj en Hungario, ĉar la prezo de la ĉarma eta „kvarradulo" estas tiel pipra, ke ĝi verŝajne pli frue aperos sur la stratoj de la okcidentaj ĉefurboj, ol en Budapeŝto.

MERKATADO EN HUNGARIO
DE PRODUKTAĴOJ,
TEKNOLOGIOJ,
ENTREPRENADOJ EN LA
KONSTRUINDUSTRIO

EKSPOZICIOJ • FAKKUNVENOJ • PREZENTO DE FIRMAOJ • VARPREZENTO
KONFERENCOJ • PROPAGANDO • PROSPEKTOJ • FOTOJ • VIDEOFILMOJ

INFORMCENTRO PRI KONSTRUFAKO
(ÉTK)

Tiu entrepreno servas kiel informejo pri la hungara konstrufako. Pere de siaj oficejoj en la ĉefurbo kaj sep grandurboj de Hungario la Informcentro observas ĉi-rilate la tutan landon. Rektaj kontaktoj kun multaj fakaj informejoj tra la mondo/ Referencojn haveblaj ankaŭ ĉe U.I.C.B. (Internacia Federacio de Konstrufakaj Centroj) kaj C.I.B. (Internacia Konsilio pri Konstrufaka Esplorado kaj Dokumentado), kies membro estas ÉTK.

INDAS KUNAGADI KUN **ÉTK**!

Budapeŝto, VII., Hársfa u. 21. H-1074
Poŝta adreso: Budapest Pf. 83, H-1400.
Telekso: 22-6564
Telefono: + 36 1 117-317

revuo de revuoj

Estas ekster dubo, ke la Jubilea Jaro grandioze ebligis divastigi tra la mondo la publikan informadon, kiel neniam antaŭe dum la Esperanta centjaro. Tiu ĉi rubriko jam informis pri kelkaj eventoj kaj sukcesaj elpaŝoj de landaj informlaboroj. Tamen kun aparta fiereco indas legi la Estraran Raporton de UEA en la junia numero de ESPERANTO, ĉar ĝi prezentas, kvankam tre koncize, tiajn batalserion kaj sukcesojn, akumulitajn el longa vico da landoj kaj organizaĵoj, ke restas al mi nenia eblo, bedaŭrinde, ilin nun detaligi. Pri la vorto „batalo" ne miru: ie-tie ankaŭ malfavorajn prezentojn oni devis niavice reataki, kaj foje necesis ne malmulte lukti por vere indaj demonstradoj. Kun tiu vorto cetere ĉe mi asociiĝas tiurilate la adjektivo „triumfa" – kvankam ankoraŭ ne en substantiva formo...

Tutcerte la konscio pri nia lingvo kaj ĝia utilo atingis tiujare dekmilionojn, nekalkuleble multajn kiuj pli frue nenion aŭdis pri ĝi; certe ne-malmultaj ekpaŝis sur nia vojo. Por ke ili *restu* apud aŭ inter ni, nepre ŝajnas sekvinda la jam ripetita alvoko: oni daŭrigu kaj ekspluatu la jubilean vervon nun, ankaŭ dum la sekvaj jaroj – eĉ memorindaj jubileoj restas ankoraŭ abunde, ankaŭ vialande, ankaŭ surloke. Post lego de tiu Raporto, ampleksanta progresojn en multaj sferoj por nia afero, eblas solide aserti, ke *nia movado grave firmiĝis,* kaj efektive iĝis pli vasta ol oni tion simple, „surstrate" povus rimarki, do laŭsurface, laŭ iaj ŝajnoj. (Cetere UEA volonte sendos al vi tiun multediran Raporton laŭ skriba peto.)

Frapi la feron ĝis ĝi ardos! – laŭ tiu diraĵo ŝanĝis nomon kaj formon la hungarlingva revuo de Hungara Esperanto- Asocio. Ĝi prezentos al la vasta publiko nian movadon en medio de la spirita-kultura vivo. Rekonata hungara verkisto prenis la torĉon por malpli rekte, ne tro „samideane" tiri la atenton per altnivelaj legaĵoj, jen literaturaj, jen historiaj, sociaj. Famiĝinta hungara verkisto *Ferenc Temesi* en novelo, kvazaŭ biografia pri sia familio, prezentas majstran rakonton pri la vilaĝa avo, kiu en alta aĝo rekontas Esperanton, tuj enamiĝas kaj baldaŭ ekinstruas ĝin per kursoj, kaj al kamparanoj, kaj al vilaĝaj intelektuloj. Kun profunda entuziasmo li organizas ankaŭ movadan vivon... Kaj el liaj disdonitaj Esperanto-libroj restis post lia morto nur unusola: la japana *„Infanoj de l' atombombo"* – kun kortuŝa dediĉo al la nepo... (TEKINTET, 1. = Rigardo).

Urbeto Italia, apenaŭ sude de Ĝenovo fokusigas esperantistojn de la regiono ĉirkaŭ Chiavari (pron. Kiavari) kaj jen, ili prezentas jam la duan jaron, imitindan *„Tigulia Esperanto-Kajero"* periodaĵon. Distran kaj interesan oni kompilis, ne nur fervore kaj plaĉe – eblas ja eldoni bultenon ankaŭ tiel! – sed ankaŭ edukante modele-koncize pri la evoluo de niaj lingvo kaj movado (en daŭrigoj) fare de *Ervino Credente.* Gratulinde!

Nomo tiras kun si omenon – oni diras, kaj ne maleblas, ke tio manifestiĝis ĉe *Georges Lagrange,* en liaj erudiciaj lingvohistoriaj priskriboj (KATALUNA ESPERANTISTO, 256.) koncerne latinidajn lingvojn (fakte iam dialektoj). Sed kiel venkis iu aŭ alia dialekto? Neniel pro la kvalito (rigardu la anglan kun ĝiaj misaj kvalitoj), sed kiel la Pariza dialekto – ekzemplas la aŭtoro – helpe de potencrilatoj, estante kerno de la lando franca. Jen la malforto de Esperanto, disvastiĝi sen ekonomia, sen politika potenco! Mi ŝuldas ankoraŭ pri la nomo (=La Semejo), okulfrape aludanta al preskaŭ samsenca nomo de konata lingva geniulo...

Multaj opinioj de plej diverslandaj legantoj publikiĝas en BULTENO de ATEO (2.) diskutante pri la rolo kaj redaktado de tiu gazeto de la ateista Esperanto-organizo. Enketo pri la pli kaj malpli konvenaj linioj de la ateismo nuntempa, estas nepre necesa por iri ĝustan vojon dum tiu agado, kaj ne erarvagi al subjektivaj emocioj perdante la sinceran racian bazon, ekzemple dum kritikado de religiemaj politikaj elpaŝoj.

Dum la demokratiigo de la socia vivo en Pollando ricevis apartan gravecon la digna solenado pri neforgesinda datreveno. Antaŭ 45 jaroj ekribelis la getto en Varsovio kontraŭ la Hitleraj krimuloj, kiuj laŭpaŝe ekstermis tie preskaŭ duonmilionon da teruritaj homoj. Inter la lastaj dekmiloj ekbatalis la senesperaj herooj kontraŭ la potencaj naziismaj fortoj, kontraŭ la nepriskribebla krueleco (MONATO, 6.). La omaĝoj al la batalintoj, el kiuj nur kelkaj restis vivaj, memorigis averte, ke la pola loĝantaro ne sufiĉe helpadis, montris tro da indiferento pri la pereigo de judoj. Konfesis polaj oratoroj ankaŭ postmilitajn antisemitismajn ekscesojn en la lando – antaŭ dudek jaroj – dum la nunaj oficialaj kaj multe vizititaj solenaĵoj, kiujn kompletigis aro da valoraj artaj aranĝoj, ankaŭ armea honorigo.

Juna fajrobrigadano en pola urbeto devis rigardi en la jaro 1942 kiel furioze batas germana ĝendarmo judan junulinon. Malgraŭ tio, dum brulego de la tiunokte ekstermita getto, ŝi neniel volis disiĝi de *unu libro,* distretita de la germano (ESPERO KATOLIKA, 5.). La junulo ravita de la nokta travivaĵo kaŝe prenis la libron, kaj por si mirindan novaĵon li ekkonis en la tiel trovita FUNDAMENTO – fariĝinte rezolute fidela ano de la Zamenhofa idealo dum la longaj jardekoj, ĝis nun.

Ervin *Fenyvesi*

Bernard Golden

Se Zamenhof estintus presisto anstataŭ okulisto...

Kompostado de Esperantaj tekstoj en presejoj

Pli ol unu fojon enkondukis la pritraktadon de difektoj de la Esperanta alfabeto la demando: „se Zamenhof laŭprofesie estus estinta presisto, ĉu li estus doninta al la alfabeto de sia planlingvo literojn kun diakritaj signoj? Efektive, kelkaj el la plej akraj kritikoj kontraŭ la uzo de supersignitaj literoj venas ĝuste de presistoj kaj aliaj fakuloj okupiĝantaj pri redaktado kaj eldonado de periodaĵoj kaj libroj en Esperanto.

Antaŭ kelkaj jaroj mi ricevis leteron de antaŭa gazet-redaktoro, kiu skribis jene: „[...] certe estis unu el la plej mallumaj horoj en la vivo de Zamenhof, kiam li eltrovis la supersignitajn literojn. Mi povus plenigi paĝojn pruvante tion, ĉar mi pasigis mian vivon en presejoj kaj scias, pri kio mi parolas." Tia amara sinteno pri la literoj kun diakritiloj estis esprimita plurfoje dum la historio de Esperanto.

Objeto kontraŭ Esperanto pro teknikaj kialoj

Ĉiuj argumentoj kontraŭ la uzo de alfabeto kun supersignoj estis resumitaj de Louis Couturat kaj Léopold Leau jam en 1910[1]. La plej evidenta estas la manko de la bezonataj litertipoj en presejoj de la plej granda parto de la civilizita mondo, dum ĉiuj posedas la tipojn de la latina alfabeto. Diri, ke estas facile akiri tiujn supersignitajn literojn estas forgesi, ke la uzo de tiuj tipoj prezentas aldonajn elspezojn ne nur por la litertiparoj sed ankaŭ por kompostado. La aldono de la ses literoj, ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ kaj ŭ, estas pli elspeziga ol oni kredas, ĉar estas necese havi ĉiujn specojn de litertipoj: minusklaj, majusklaj, rektaj, kursivaj, dikaj, grandaj por titoloj ktp. Manke de ĉiuj specoj, presejo devas uzi surogatajn supersignojn aŭ tute ellasi ilin, kaj tio kreas malagrablan efikon.

La uzo de supersignitaj literoj kaŭzas multajn presdifektojn tre malfacile malkovreblajn kaj ĝustigeblajn, kaj duobligas la laboron kaj penadon de aŭtoro, kiu devas korekti presprovaĵojn. Cetere, la ĝusta lokado de la diakritiloj sur ĥ kaj ĉiuj majuskloj komplikas la laboron de la kompostisto kaj plialtigas la koston. La malfacilaĵoj estas eĉ pli grandaj, kiam oni uzas kompost-maŝinojn kiel linotipojn. Por aldoni eĉ unu solan litertipon al unu el tiuj maŝinoj, estas necese tute ŝanĝi ĝin.

Couturat kaj Leau faras jenan pesimisman konkludon: „Se Esperanto volas „konkeri la mondon" ĝi devas adaptiĝi al la teknikaj kutimoj kaj bezonaĵoj; ĝi ne povas havi la pretendon devigi ilin ŝanĝiĝi por ĝia profito [...]." tiel estas esprimita la nocio, ke ne estas eble modifi la teknikon, do la sola solvo estas transformi la lingvon. „Ŝanĝu la lingvon!" fariĝos ofta rekantaĵo, kaj ĝi estas aŭdebla ankaŭ nun en la epoko de la komputeroj.

Paul Berthelot, pionira presisto kaj redaktoro

Kelkaj esperantistoj, kiuj laboris profesie kiel presistoj, apogis la vidpunktojn de Couturat kaj Leau, kaj ne provis serĉi manierojn adapti teknikojn de kompostado kaj presado al la lingvo; male, ili proponis aŭ eĉ enkondukis ortografiajn reformojn.

Aktiva presisto kaj redaktoro en la fruaj jaroj de la 20-a jc. estis Paul Berthelot, kiu en 1905 fondis la revuon *EsperantoT*[2a, 2b]. En 1903 li dungigis sin kiel kompostisto ĉe presisto en Céret, malgranda franca urbo kelkajn kilometrojn de Perpinjano. Tie li komencis mem presi kaj eldoni verkojn en Esperanto. Jam en 1904, sub la pseŭdonimo Marcelo Verema, li verkis kaj presis en Céret Fonetiko litera, 16-paĝan broŝuron kun la subtitolo „skizo pri kelkay konsonantoy". Dua eldono aperis en 1906. Ankaŭ en Céret en 1904 Berthelot propranome publikigis ankoraŭ unu 16-paĝan libreton titolitan Provo de khemia nomigado. Ekzemploj de la sensupersigna ortografio uzata en tiu verko estas: suficha, chiuy, kombinajoy, shtofo(3). Estas evidente, ke Berthelot ne nur anstataŭigis la ĉapelitajn literojn per digramoj (ch = ĉ, ŝh = ŝ) sed modifis ankaŭ la prononcon de la litero j (=ĵ) kaj enkondukis novan literon, y (= j)

Teo Jung, ankoraŭ unu pesimisma presisto

Duonjarcenton poste, ankoraŭ unu presisto-redaktoro, uzante preskaŭ la identajn kialojn de Couturat kaj Leau, prenis kontraŭan starpunkton rilate la ĉapelitajn literojn de la Esperanta alfabeto.

La patro de la fondinto de *Heroldo de Esperanto* estis presisto, kaj lia filo Teo, kiel 16-jarulo, komencis sammetie labori en Kolonjo, Germanio, en 1909[4]. Dum pluraj jardekoj Teo Jung rolis kiel unu el la plej influhavaj eldonistoj en Esperantujo. Ankaŭ li interesiĝis pri la demando de ortografia reformo de Esperanto. En 1948 li aperigis en sia gazeto preskaŭ tutpaĝan artikolon titolitan „La supersignoj", en kiu la skribis pri la „nepraktika alfabeto", kies supersignoj „estas malhelpo, eĉ grava, ĉe la disvastigado de nia lingvo"[5]. Jung kiel presisto marteladis la punkton, ke la supersignita alfabeto prezentas obstaklojn por la presado de tekstoj en Esperanto. Same kiel laikoj, li asertis ke nur malmultaj presejoj sur la tuta terglobo posedas tipojn kun Esperantaj supersignoj, kaj kredeble eĉ unu skribmaŝino en la tuta mondo ne havas la Esperanto-tipojn. Same kiel Couturat kaj Leau, tiu ĉi presarta fakulo akcentis, ke eĉ se presejo havas supersignitajn literojn, ili estas nur en du-tri gradoj de unu aŭ du karakteroj, do variado en la kompostado estas strikte limigita. Se ekzemple estas necese komposti grand-literajn titolojn, bezonantajn supersignojn, la redaktoro elturniĝas, ŝanĝante la vortojn en la titolteksto! Jung senespere konkludas per jenaj vortoj:

> „...la manko de la supersignoj en la *presejoj* estas tre *grava* malhelpo. Kaj tiu malhelpo tre

malagrable sentiĝas ĝuste nun, en la periodo de propagando. Se la internacia lingvo jam estus ĝenerale enkondukita, la malhelpo ne ekzistus, ĉar tiam ĉiu presejo en la tuta mondo vole-nevole havigus al si la supersignajn tipojn ... kvankam restas la fakto, ke ĉiuj supersignoj en kiu ajn lingvo ĉiam restos certa ĝeno."

Kompostado per linotipo

En 1903 A. Saint-Martin, la redaktoro de *La Lumo*, Esperanta revuo eldonita en Kanado, skribis al d-ro Zamenhof por informi lin, ke presistoj en Montrealo ne volas plu presi tekstojn kun literoj supersignitaj. En sia respondo de la 31-a de decembro 1903, d-ro Zamenhof proponis, ke *La Lumo* uzu la permeson anstataŭigi la ĉapelitajn literojn per digramoj (ch, gh, hh, jh kaj sh) kaj ŭ per simpla u. Sed Zamenhof avertis s-ron Saint-Martin, ke „se Vi dezirus presadi per alfabeto tute reformita, tio ĉi estus tre danĝera, danĝerega paŝo, kiu baldaŭ disfaligus nian tutan aferon"[6]. Saint-Martin ne akceptis la admonon de Zamenhof. En 1903 H. Bel proponis en *La Lumo* alfabeton sen supersignoj kun sh (=ŝ), tsh (=ĉ), zh (=ĵ) kaj x. En la sekva jaro sur la paĝoj de la *La Lumo* Saint-Martin verkis artikolon titolitan „Fonetika alfabeto", kaj la kanada revuo tiel elektis la vojon al reformo[7].

Couturat kaj Leau publikigis en Parizo en 1910 sian pesimisman opinion, ke linotipa kompostado de Esperantaj tekstoj neeblas, sed en la sama urbo kvin jarojn pli frue, esperantisto kun pli larĝa vidpunkto montris sin pli optimisma. Li estis Paul Fruictier, ekde 1902 la ĉefredaktoro de *Lingvo Internacia* kaj kunfondinto de Presa Esperantista Societo en Parizo en 1905. En artikolo aperinta en 1905 Fruictier memorigis la legantojn pri la kampanjo de *La Lumo* kontraŭ la supersignitaj literoj, ĉar ili preskaŭ malebligas kompostadon de Esperanto per linotipo.[8]. Citinda estas la starpunkto de *La Lumo*, ĉar ĝi ja estas troigo.

> „Laŭ tiu gazeto, ĉiuj presistoj en Nord-Ameriko nun uzus tiajn maŝinojn, kiuj grandaparte malaperigos pli-malpli baldaŭ la mankompostadon. Sekve la supersignitaj literoj de Esperanto – same kiel la supersignitaj literoj de multaj aliaj naciaj lingvoj – devas malaperi."

Sed ili ne malaperis!

Fruictier raportis, ke Presa Esperantista Societo akiris linotipon por la presejo kaj decidigis la anglan firmaon, kiu fabrikas tiujn maŝinojn, prepari kaj liveri la specialajn Esperantajn literojn por la sama prezo kiel la aliajn! Sekve, per linotipo nun ĉiu presisto aŭ gazeto povas presi Esperantajn tekstojn, elspezante nur ĉirkaŭ 5-10 frankojn por aĉeto de la specialaj litertipoj. Per linotipo la presigo de Esperanta teksto estas multe pli facila ol per ordinara mankompostado. Fruictier atentigis pri „malgranda malhelpaĵo"; majuskloj kun supersigno ne estas facile uzeblaj en kompostmaŝino, sed la problemo estis esplorata, kaj oni esperis baldaŭ ricevi bonan solvon. Tamen, Fruictier eraris konkludante, ke tiel malaperos nova argumento kontraŭ nia lingvo. Kiel ni vidos en postaj artikoloj, tiu argumento kaj pluraj aliaj ne tute malaperis; ili estas uzataj ankoraŭ hodiaŭ.

D-ro Zamenhof, okaze de sia restado en Parizo en 1905, vizitis Presan Esperantistan Societon kaj kompostis mem per linotipo la sekvajn tri liniojn.

Vivu Esperanto!
L. ZAMENHOF
Parizo, la unuan de aŭgusto 1905.

Tajpado de Esperantaj tekstoj per skribmaŝino

Alfarado de skribmaŝinoj

La historio de la uzo de la skribmaŝino por tajpado de Esperantaj tekstoj paralelas tiun de kompostad-teknikoj en presejoj, sed ĉar modifado de la klavaro de tajpilo okazigas malpli da obstakloj mekanikaj kaj financaj, unu solvo estis atingita pli frue.

Ekzistas du manieroj mekanike adapti skribmaŝinon por tiu celo: (1) per aldono de po unu nova klavo por la ses supersignitaj literoj; (2) per aldono de nur la du diakritiloj, la cirkumflekso kaj la arketo, sur mortaj klavoj. Couturat kaj Leau emfazas, ke estas neeble aldoni unu solan litertipon al skribmaŝino; estas necese ŝanĝi ĝin, kaj tio sekvigas grandan elspezon, kion oni farus nur esceptokaze. Sendube ekzistas maŝinoj kun supersignitaj literoj, sed ili estas specialaj modeloj, tiucele konstruitaj kaj havantaj pli grandan nombron da litertipoj ol la ordinaraj modeloj; sekve, ili estas pli multekostaj. Se skribmaŝino estas ekipita per sendependa cirkumflekso kaj arketo sur la t.n. morta klavo, tio signifas, ke estas necese tajpi du fojojn; unue oni frapas la klavon de la supersigno kaj, ĉar la ĉareto ne antaŭeniras, estas eble tajpi la konsonanton aŭ u en la sama loko. Laŭ Couturat kaj Leau oni povas same rapide tajpi digramon, kaj eĉ tio estus malpli ĝena. Por emfazi la malavantaĝon, esperantisto ja povas akiri maŝinon respondantan al liaj bezonoj, sed se iu, kiu jam havas tajpilon, fariĝas adepto de Esperanto, estas necese, ke li rezignu skribi Esperanton per ĝi aŭ li aĉetu alian skribmaŝinon. Tio ne estas tre kuraĝiga por novaj adeptoj kaj ankoraŭfoje indikas la grandan obstaklon kontraŭ la disvastigo de Esperanto kaj ĝia uzado[10].

Fabrikado de skribmaŝinoj por esperantistoj

En la jaroj de la unua kaj dua Universalaj Kongresoj kelkaj skribmaŝin-firmaoj alfaris siajn tajpilojn kaj ne nur publikigis reklamojn kaj katalogojn pri ili sed ankaŭ ekspoziciis la modelojn dum la kongresoj. La kongresa libro de la unua Universala Kongreso en 1905 en Bulonjo-ĉe-maro enhavis reklamon pri la skribmaŝino Armstrong, kiu estis alfarita speciale por esperantistoj. La reklamo ne indikis la prezon sed plej probable la tajpilo estis ekspoziciita kaj mendebla en la kongresejo[11].

Raporto pri la dua Universala Kongreso en Ĝenevo en 1906 enhavas donitaĵojn pri pli da skribmaŝinoj tiutempe haveblaj por tajpi en Esperanto, kaj tiuj tajpiloj

troviĝis en la kongresa ekspozicio[12]. La skribmaŝino Yost, sen speciala aranĝo, povis skribi Esperanton sed ne estis kapabla supersigni majusklojn, kaj anstataŭigis ŭ per u. Oficisto anoncis, ke baldaŭ la firmao Yost aranĝos specialan tipon de maŝino kapabla skribi Esperanton tute plene kaj korekte, kaj eldonos Esperantan katalogon pri siaj skribmaŝinoj. La tajpilo de la firmao Oliver el Londono kapablis skribi la lingvojn francan, germanan anglan kaj ankaŭ Esperanton tute korekte kun la speciala litero ŭ kaj ĉiuj supersignitaj literoj grandaj kaj malgrandaj. Plie, la firmao eldonis ilustritan katalogon en Esperanto kun klarigoj pri la funkciado de la maŝinoj. Oliver ne estis la unua skribmaŝino sperciale aranĝita por skribi ankaŭ Esperanton krom diversaj etnolingvoj. Jam de longe la tajpilo Hammond, fabrikita en Parizo, posedis tiun kapablon per simpla ŝanĝo tre rapide farebla de peceto en la maŝino. Ĝia skribo estis pli bela ol tiu de la maŝino Oliver, ĉar ĝi tajpis supersignitajn literojn per unu sola frapo de klavo, dum la skribmaŝino Oliver supersignis minusklojn kaj majusklojn samalte, do troalte super minuskloj. Skribmaŝinoj, kiuj, sen speciala aranĝo, povis skribi Esperanton ne supersignante la grandajn literojn kaj uzante la literon u anstatau ŭ, inkludis krom la Yost ankaŭ la Remington kaj la Dactyle; tiu ĉi havis malaltan prezon.

La skribmaŝino de d-ro Zamenhof

Pluraj aŭtoroj spekulativis pri la dato, kiam Zamenhof akiris sian skribmaŝinon kaj pri la fabrik-marko de tiu tajpilo. Ĝis nun ne estis malkovrita objektiva dokumentaĵo. La persono, kiu ja sciis, bedaŭrinde preteratentis registron de la bezonataj donitaĵoj. En 1927 en la decembra numero de Pola Esperantisto, Lidja Zamenhof verkis artikolon titolitan „La skribmaŝino de mia patro"[13]. En ŝia priskribo mankas teknikaj detaloj pri la tajpilo, kiun ŝi pritaksas per la sekvaj vortoj. „Kompare kun la lastaj sistemoj, ĝi ne prezentas grandan valoron. Mankas kelkaj gravaj aranĝoj; kaj stenotipistoj rigardas ĝin kompate, preskaŭ malestime."

Zamenhof uzis sian skribmaŝinon por tajpi la tradukaĵojn de la Biblio, la fabeloj de Andersen kaj aliaj beletraj verkoj. Ankoraŭ ekzistas ankaŭ en tajpita formo la tekstoj de la dua, kvara kaj sesa kongresaj paroladoj. Laŭ la tiutempa kutimo lia korespondaĵo estis manskribita[14]. Zamenhof mane skribis ankaŭ presotajn tekstojn, kaj Waringhien opinias, ke la tajpitaj verkoj estis tiuj, kiujn li sendis al pluraj korespondantoj por peti ilian opinion. Ankoraŭ unu nerespondebla demando estas: kiu tajpis la verkojn? Ĉu Zamenhof mem faris tion aŭ, kiel pensas Waringhien, okupiĝis pri tiu tasko unu el la filinoj?

En artikolo aperinta en *Esperanto* en decembro, 1967, pri tajpita teksto de Zamenhof, M. Delcourt, la aŭtoro, opinias, ke Zamenhof posedis la Yost-maŝinon, reklamitan en L'Esperantisto en 1907. La koncerna teksto estas la tradukaĵo de *La Gimnazio* farita en 1909[15]. La litertiparo estas kursiva, kaj la cirkumfleksoj estas perfekte tajpitaj sur minuskloj kaj majuskloj; troviĝas ankau ŭ. Se Zamenhof vere akiris skribmaŝinon de la firmao Yost, ĝi devis esti modelo pli perfektigita ol tiu ekspoziciita dum la Universala Kongreso en 1906, ĉar tiu pli frua maŝino ne kapablis supersigni majusklojn kaj anstataŭigis ŭ per u.

Laŭ André Albault, kiu ekzamenis tajpaĵojn de tradukaĵoj de la Biblio, la skribmaŝino de Zamenhof havis du aŭ plurajn mortajn klavojn por tajpi minusklajn kaj majusklajn cirkumfleksojn kaj ankaŭ la arketon super u[16]. Ankoraŭ unu problemo koncernas duan skribmaŝinon. La tradukaĵoj de la Biblio, *La Rabeno de Baĥarah* kaj *La Gimnazio* estis tajpitaj per skribmaŝino havanta kursivajn litertipojn, dum unu tajpaĵo de la jaro 1907 havas rekte starantajn literojn[17]. Itô kanzi demandas, ĉu Zamenhof vere havis du tajpilojn, aŭ ĉu nur en unu okazo li petis iun tajpi lian malnetan manuskripton?

Kiam Zamenhof akiris sian skribmaŝinon?

Estas malfacile ekscii, precize kiam Zamenhof akiris sian skribmaŝinon. Ĉar la tajpilo Armstrong estis reklamita en la kongresa libro de la unua Universala Kongreso en 1905, Itô kanzi supozas, ke Zamenhof povis mendi tiun modelon tiam kaj uzi ĝin por tajpi la tekston de la kongresa parolado de la sekva jaro. Sed oni ne povas esti certa, ke Zamenhof uzis la modelon Armstrong[18].

Kvankam neniu el la aŭtoroj pritraktantaj la skribmaŝinon de Zamenhof havis precizan informon pri la kosto de tajpilo en la fruaj jaroj de la 20-a jc., la ĝenerala opinio estas, ke ĝi estis luksa varo, do multekosta, same kiel probable estis la rubandoj kaj karbonpapero en la tiutempa Ruslando. Waringhien suspektas, ke iu donacis la skribmaŝinon al Zamenhof, kiu kutime rifuzis tiajn donacojn, aŭ ke li aĉetis la tajpilon per la unuaj profitoj, kiujn alportis al li *La Revuo* (post 1906)[19]. Tio ja ne estas verŝajna, ĉar la parolado de la dua Universala Kongreso estis tajpita.

Itô kanzi informas, ke jam en 1895 Leo Tolstoj havis skribmaŝinon[20]. Se Tolstoj akiris tajpilon unu jardekon antaŭ ol Zamenhof konjekteble aĉetis sian (en 1905 aŭ 1906), eble li havis ĝin pli frue. Por Tolstoj, kiu estis riĉa kaj vojaĝis eksterlanden, la akiro de skribmaŝino ne prezentis problemon, sed la situacio estis tute alia por la malriĉa Zamenhof.

La skribmaŝino inventita de d-ro Zamenhof

Ekzistas tre fidinda atestaĵo, ke Zamenhof havis sperton kun skribmaŝinoj longe antaŭ ol li uzis unu el tiuj maŝinoj por tajpi siajn proprajn verkojn. En 1890 li inventis specon de skribmaŝino funkcianta per tiporada mekanismo, kiu estis patentita en Germanio en 1892[21]. La verkinto de la raporto asertas, ke „evidente tiu ĉi intentaĵo de Zamenhof neniam realiĝis en konstruita maŝino." Ankaŭ pri tiu aspekto de la malbone dokumentita historio ne estas eble esti tute certa. Ĉiuokaze, la patento estas pruvo, ke Zamenhof okupiĝis pri skribmaŝinoj longe antaŭ 1905 aŭ 1906 kaj eĉ antaŭ la dato, kiam Tolstoj akiris sian tajpilon. Zamenhof certe estis devinta posedi aŭ havi okazon ekzameni la

mekanismojn de skribmaŝinoj ekzistantaj fine e la 19-a jc. Nek la enhavo de la citita raportaĵo nek la akompanaj tro reduktitaj desegnaĵoj de la patent-dokumento indikas, en kiu maniero estas eble tajpi supersignitajn literojn per la tiporada mekanismo.

Konkludo

Estas evidente, ke jam en la fruaj jaroj de la 20-a jc. la unuaj paŝoj estis faritaj ne nur alfari skribmaŝinojn kapablajn tajpi tekstojn en Esperanto sed ankaŭ surmerkatigi ili per reklamado, eldono de katalogoj kaj praktika demonstrado en ekspozicioj. Tiel, tiaj tajpiloj fariĝis tute normalaj komercaj varoj. Tamen, malgraŭ tiu ĉi antaŭenpaso kaj malgraŭ la konvinka argumento de Presa Esperantista Societo, ke eblas komposti Esperantajn tekstojn per linotipo, nek la esperantistoj nek la skeptikuloj kaj malamikoj de Esperanto ekster la movado estis kontentaj. Pli kaj pli ofte aŭdiĝis postuloj, ke la origina ortografia sistemo de Esperanto estas barilo, kiu devas esti forigita, jen per surogata alfabeto, jen per drasta ortografia reformo, karakterizita per la enkonduko de digramoj anstataŭantaj literojn kun diakritiloj kaj ankaŭ per aldono de novaj literoj kiel q, w, x kaj y.

Iom amuza intermezo en la ĉiam pli drameca polemikado pri la ortografio de Esperanto estas la informo, kiun Zamenhof donis okaze de intervjuo kun la rusa pioniro V.N. Devjatnin[22]. Dum de unu flanko venas postuloj, ke la supersignitaj literoj estu forigitaj, ĉar ili malebligas presadon de Esperantaj libroj en naciaj presejoj, aliflanke troviĝas homoj, kiuj proponas la aldonon de ankoraŭ kelkaj supersignitaj literoj por fonetike prezenti la sonon ŝĉ de la rusa lingvo kaj la ps de la helena; krome estu enkondukitaj specialaj supersignitaj literoj por la sonoj ja, je, jo ktp.!

La sekva artikolo en tiu ĉi serio pritraktos la oficialan surogatan alfabeton de Zamenhof, aliajn proponitajn surogatojn por anstataŭi la diakritilojn kaj, fine, paŝojn al plena reformo de la ortografio de Esperanto kaj, eventuale, ankaŭ modifon de la Fundamenta leksiko.

Notoj

1. Louis COUTURAT, Léopold LEAU. Conclusions du Rapport sur l' état présent de la question de la langue internationale. Coulommiers: Paul Brodard; 1910. 32 pĝ. Vd. pĝ. 5 k. sekv.
2a. Carlo BOURLET. Paul Berthelot. La Revuo. 1911 aprilo; 5 (8 [56]): 374-377.
2b. Marcel DELCOURT, Jean AMOUROUX. Berthelot, la fondinto. Esperanto 1975 junio: 68 (6 [834]): 103-104. Represita en: Bulgara Esperantisto. 1988 februaro; 57 (2): 3-4.
3. P.E. STOJAN. Bibliografio de Internacia Lingvo. Genve: Universala Esperanto-Asocio; 1929. 560 pĝ. Fotorepreso: New York, Hildesheim: Georg Olms; 1973. Vd. n-rojn 5522 kaj 5636.
4. Teo JUNG. Ĉiu – Ĉiun. Antverpeno, La Laguna: Stafeto; 1979. 399 pĝ. Vd. pĝ. 51-52.
5. Teo JUNG. La supersignoj. Heroldo de Esperanto. 1948 aprilo 16; 8 (1086): 2.
6. PLENA VERKARO DE ZAMENHOF. Kun Gradaj Paŝoj Eksterlanden! Kajero 6. Kioto: Ludovikito; 1979. 427 pĝ. Vd. pĝ. 116-117.
7. Vd. noton 3, n-rojn 5634 kaj 5635.
8. Paul FRUICTIER. Progreso. Lingvo Internacia. 1905; 13: 307-308. Represita en: PLENA VERKARO DE ZAMENHOF. La Neforgeseblaj Kongresoj. Kajero 7-bis. Kioto: Ludovikito; 1984. 303 pĝ. Vd. pĝ. 69.
9. Lingvo Internacia. 1905; 15: 333. Represita en: PLENA VERKARO DE ZAMENHOF. La Neforgeseblaj Kongresoj. Kajero 7-bis. Kioto: Ludovikito; 1984. 303 pĝ. Vd. pĝ. 70.
10. Vd. noton 1, pĝ. 7-8.
11. PLENA VERKARO DE ZAMENHOF. Korespondaĵo Ludovikologia. Kromkajero 2. Kioto: Ludovikito; s.d. 271 pĝ. Vd. pĝ 204.
12. TEDULO (pseŭdonimo). Raporto pri la 2-a Universala Kongreso de Esperanto en Genève (Daŭrigo kaj fino). Lingvo Internacia. 1906 oktobro 15; 11 (20 [152]): 553-579. Represita en: PLENA VERKARO DE ZAMENHOF. La neforgeseblaj Kongresoj. Kajero 7-bis. Kioto: Ludovikito; 1984. 303 pĝ. Vd. pĝ. 265-293.
13. Lidja ZAMENHOF. La skribmaŝino de mia patro. Pola Esperantisto. 1927; 12. Represita en: PLENA VERKARO DE ZAMENHOF. Post la lel-Tiela Kompletigo. Kromkajero 2-bis. Kioto: Ludovikito; 1986. 285 pĝ. Vd. pĝ. 163-165.
14. Vd. noton 11, pĝ. 199-200.
15. Adolf HOLZHAUS. Granda Galerio Zamenhofa. Volumo 1. Helsinki: Fondumo Esperanto; 1973. 527 pĝ. Vd. pĝ. 232.
16. André ALBAULT. Letero de l' Akademio de Esperanto. 1988; 3: 3.
17. PLENA VERKARO DE ZAMENHOF. Post la lel-Tiela Kompletigo. Kromkajero 2-bis. Kioto: Ludovikito; 1986. 285 pĝ. Vd. pĝ. 65.
18. Vd. noton 11, pĝ. 204.
19. Vd. noton 11, pĝ. 199, 204.
20. Vd. noton 17, pĝ. 91-92.
21. SM (= Stefan MAUL). Zamenhof inventis tiporadan skribmaŝinon. Monato. 1988 marto; 9 (3): 21.
22. V. DEVJATNIN. El rememoroj de malnova esperantisto. La Nova Etapo. 1932: 119-127, 204-208. Represita en: PLENA VERKARO DE ZAMENHOF. Ludovikologiaj Biografietoj. Kromkajero 3. Kioto: Ludovikito; 1987. 335 pĝ. Vd. pĝ. 135-171, precipe pĝ. 165.

Éva Jóba: Aŭtuna rivero

BVM®

– ĝenerala direkcio
– fabriko kun uzino
– uzino

al la estimata legantaro prezentas sin la 25-jara

BETON- kaj FERBETON-INDUSTRIA ENTREPRENO B.V.M.

LA AGADO DE LA FABRIKOJ DE BVM:

Tiuj fabrikoj – krom la lasta – produktas fabrikaĵojn kaj strukturojn el betono, ferbetono kaj streĉita betono por la konstruado, trafiko kaj municipaj servoj.

La fabrikoj krom tiuj partoprenas ankaŭ muntadon ĉe konstruado kaj similajn kunlaborojn.

La Fabriko en Kunszentmárton produktas por la Entrepreno la necesajn teknologiajn ekipaĵojn, muntaĵojn kaj ŝablonojn. Ĝi produktas precipe elementojn por ŝtalstrukturoj, krome maŝinojn por la Entrepreno; krom tiuj ĝi laboras ankaŭ por eksteraj mendantoj kaj eksportado.



Fabrikoj kaj uzinoj

BVM BUDAPESTI GYÁRA
H-1117 Budapest XI., Budafoki út 215.
Telefono: 253-840; Telekso: 22-4877

BVM LÁBATLANI GYÁRA
H-2541 Lábatlan, Rákóczi F. u. 1.
Telefono: 6; Telekso: 22-4006

BVM DUNAÚJVÁROSI GYÁRA
H-2400 Dunaújváros, Papírgyári u. 18-20.
Telefono: 18-384; Telekso: 029229

HIRDI TELEPE
Telefono: 13-986

KOMLÓI TELEPE
telefono: 81-123

BVM ALSÓZSOLCAI GYÁRA
H-3571 Alsózsolca
Telefono: 17-811; Telekso: 062268

BVM SZENTENDREI GYÁRA
H-2001 Szentendre, Dózsa gy. u. 34.
Telefono: 10-622; Telekso: 225836

VÁCI TELEPE
Telefono: 12-796

BVM SZOLNOKI GYÁRA
H-5000 Szolnok, Panel u.
Telefono: 17-450; Telekso: 023326

BVM MISKOLCI GYÁRA
H-3501 Miskolc, József A. u. 25-27.
Telefono: 15041; Telekso: 062277

BODROGKERESZTÚRI TELEPE
Telefono: 11-177

KAZINCBARCIKAI TELEPE
Telefono: 11-177

BVM KUNSZENTMÁRTONI GYÁRA
h-5440 Kunszentmárton, Tiszakürti út 6.
Telefono: 62; Telekso: 023366

La BVM® produktaĵoj por loĝdomoj



PLAFONAĴO

- BVM-PPB plafonsistemo
- Trabo E7 kun port-lato EB
- Trabo EH kun port-lato EB
- Plafondiloj PK, PS
- Plafondiloj VPK, VPS, stukon ne bezonantaj.

MURELEMENTOJ

- rioterm varmizola murbloko
- ÜBK varmizola murbloko.

La elementoj, murblokoj taŭgas por fari muron ŝarĝeblan kaj konvenan al la termoteknikaj normoj.

BETONARMAĴOJ

Por konstrui surloke ferbetonajn struktorojn (ekz. kronojn): betonarmaĵoj laŭdezire (dividferoj, ripoj k.c.).

BAZO-ELEMENTOJ

en diversaj koloroj, dimensioj kaj kvalitoj por konstrui plaĉajn hazmur-kovraĵojn.

LINTELO

- Lintelo A,
- Lintelo AD,
- Varmizola lintelo HA.

ŜELAĴOJ

La ŝelaĵo N taŭgas por grundmuro kaj kelmuro.

KUMENTUBO

La etaĝ-alta kolekta kamentubo taŭgas por forkonduki fumaĵojn de hejtaparatoj kun ĉia ajn hejtilo.

DEKORPLANKO

La prefabrikitaj betontegaĵoj, gazontruaj betonpasejoj kaj la plurkolore fabrikitaj dekorplankoj taŭgas por varie tegi la ĉirkaŭdomajn trotuarojn, algaraĝ-veturejoj, terasojn ktp.

TRANSPORT-BETONO

La BVM-fabrikoj prezentas al la alvenantaj mendantoj miksitajn betonon laŭ pluraj kvalitoj.

Pri la produktaĵoj volonte informas la fabrikoj de BVM, same la tiurilataj komercejoj de TÜZÉP, ÁFÉSZ kaj ÉPTEK.

H-1441 Budapest
Pf. 46
Telefono: /36 1/ 221-459
Telekso: 22-4730

Atuta proza verko!



Sándor Szathmári (1897-1974) estas unu el la pintaj nomoj de la originala Esperanta prozo. Lia ĉefa verko estas sendube la romano „Vojaĝo al Kazohinio", sed li postlasis abunde ankaŭ rakontojn kaj novelojn.
Tiu ĉi ampleksa volumo enhavas ĉiujn liajn originalajn rakontojn kaj novelojn – entute 26 pecojn, sen kiuj la Esperanta literaturo estus nepre pli malriĉa.
„Perfekta civitano" havas validan direndon por ĉiuj civitanoj de ajna ŝtato, sendepende de tio, en kia sociordo ili vivas.

Sándor Szathmári: Perfekta civitano. Plena novelaro. Redakto kaj postparolo Vilmos Benczik. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1988. 21 cm, 45
ISBN 963 571 178 6. Prezo: 39,– ned. gld. (Por Hungario: 200 forintoj)
Oni mendu ĉe la Libroservo de UEA aŭ rekte ĉe Hungara Esperanto-Asocio.

.dor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathmári: Perfe
tano * Sándor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathr
ekta civitano Sándor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor
hmári: Perfekta civitano * Sándor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathmári: Perfekta civit
or Szathmári: Perfekta civi Sándor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathmári: Perfekta civit
ıdor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathmári: Perfe
ándor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathmári: Pe
ano * Sándor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathmári: Perfekta civitano * Sándor Szathı

Ĉu saturiĝis la Sovetia merkato de Esperantaj libroj?

Por ni, kiuj laboras pri la eldonado kaj vendado de Esperantaj libroj en HEA, ekzistas ĉiujare unu firma festotago iam dum la frua somero: ĝi estas la tago, en kiu ni ricevas la jaran mendon el Sovetio. Ĝi estas festo por ni pro pluraj kialoj: unue, ĉar tiamaniere ni ricevas la plej grandan premion, vidante la utilecon de nia laboro, kaj due, ĉar per la enspezoj ni povas lanĉi eldonon de pliaj titoloj. Ĉar tiu mendo ordinare estas tre granda: el la ofertataj 70-80 titoloj kutime dum unu jaro ni vendas al Sovetio proksimume dek kvin mil librojn, do averaĝe ducenton el ĉiu titolo.

Dum tiu ĉi jaro niaj atendoj kaj esperoj estis iomete eĉ pli grandaj ol kutime, ĉar inkluzivinte en nian ofertoliston ankaŭ plurajn polajn kaj bulgarajn eldonaĵojn, ĝi atingis 117 titolojn, t.e. rekordan nombron. Sed ĉifoje la realeco duonigis niajn esperojn: la mendo estis nur por 7726 ekzempleroj, t.e. duono de la kutima mendokvanto.

La fakto nin surprizis tiom pli, ke laŭ la informoj, kiujn liveris al ni la hungara eksporta firmao, ĝuste en tiu ĉi jaro estis nuligitaj en Sovetio ĉiuj limigoj por mendoj, kaj la ofertolisto, kompilita kaj multobligita fare de ni, estis sendita al librovendejoj en pluraj dekoj da Sovetiaj urboj. Sed mendoj venis nur el sep urboj entute. Estas interese rigarde trapromeni la subajn tre surprizajn ciferojn, kiuj montras konsterne grandan neproporciecon inter la diversaj urboj (parenteze staras indiko de procentoj el la tuta mendo):

Vilnius: 4938 libroj (63,9%)
Novosibirsk: 1197 libroj (15,5%)
Leningrado: 855 libroj (11,1%)
Minsk: 452 libroj (5,9%)
Moskvo II.: 191 libroj (2,5%)
Odeso: 85 libroj (1,1%)
Tallinn: 8 libroj (0,1%)

(La sumo de la procentaĵoj superas centon je unu dekono pro la rondigo de la opaj ciferoj.)

Nin multe mirigis, ke el pluraj urboj, el kiuj konstante ni ricevadas leterojn de esperantistoj kun plendoj pro la neaĉeteblo de niaj libroj, mendoj tute ne alvenis. Tia urbo estas ekzemple Vladivostok, Ĥarkov, Riga kaj multaj aliaj. Lastatempe ni ricevis informon, ke eble el Kievo venos ankoraŭ mendo, sed ĝis nun (meze de oktobro) ĝi ne alvenis. Ĉu ni devas alfronti la fakton, ke la merkato de Esperantaj libroj en Sovetio plene saturiĝis? Aŭ eble tio nur koncernas niajn librojn, t.e. niaj eldonaĵoj ne plu trafas la guston de la Sovetiaj legantoj? Ĉu ni devos tiri la konkludon kaj ĉe la difino de la eldonkvantoj ne kalkuli pri la Sovetiaj esperantistoj? Jen dubigaj dilemoj, kiujn ni povos solvi nur kun la helpo de niaj Sovetiaj legantoj, kies leterojn ni atendas, kaj en la sekvaj numeroj en koncizigita formo ni pretas presi sur niaj paĝoj la plej interesajn el ili.

Jen, superrigarda statistiketo pri tiuj naŭ titoloj, kiuj estas menditaj en pli ol 200 ekz. (parenteze staras la kvanto mendita en 1987):

Amuzaj dialogoj: 405 (753)
Taskfolioj por komencantoj: 385 (809)
Tom Sawyer: 385 (1094)
Baza legolibro por komencantoj: 310 (993)
La tuta Esperanto: 348 (410)
La verda koro 305 (400)
Gramatika ekzercaro al la lernolibro de Szerdahelyi: 255 (348)
Hungaraj fabeloj: 225 (217)
La rozo de l' sultano: 214 (257)

Kiel videble, nur ĉe la lasta ero montriĝas ioma kresko. Montriĝas tre gravaj malkreskoj ĉe beletraj libroj, ĉu originalaj (ekz. Nemere), ĉu tradukitaj.

Do, nia frusomera festo ĉijare forrestis. Ni atendas la konsilojn de niaj Sovetiaj legantoj, kion fari, por festi denove en 1989?

Vilmos *Benczik*

* * *



La foto prezentas la unuan jarkolekton de la popularscienca revuo FOKUSO. Aperis jam pluraj numeroj de tiu ĉi jaro, enhavantaj artikolojn pri medioprotektado, medicino, komputiloj, ekonomiko kaj aliaj temoj en facile legebla stilo kun multaj karikaturoj kaj aliaj ilustraĵoj. Se vi ankoraŭ ne vidis tiun ĉi unikan periodaĵon, petu provekzempleron – kontraŭ unu internacia respondkupono – ĉe la redakcio:

FOKUSO, Esperanto-centro, Budapest, Pf. 193, H-1368

RECENZOJ

Pri recenzo de „La Ŝtona Gasto"

Recenzanto havas kompreneble la plenan rajton juĝi verkon seninteresa laŭ enhavo, fuŝa laŭ lingva formo, malaltnivela laŭ beletraj kriterioj, kaj sciigi al la legantoj tiun juĝon.

La recenzista deontologio tamen ne permesas, ke oni misprezentu la recenzitan verkon. Tion faris s-ro A. Korĵenkov en Hungara Vivo 87/5 (p. 191), nomante mian modestan teatraĵon (La Ŝtona Gasto) traduko, kio ĝi evidente ne estas. Dufoje s-ro Korĵenkov uzas la vorton „traduko" aŭ „tradukita" inter citiolj, kredigante tiel al la leganto, ke tiu vorto aperas en la recenzata verko, kio estas rekta malveraĵo. Eble eĉ la redakcio de Hungara Vivo implikiĝas en la respondeco: eble ĝi devus atenti, ke malĝustaĵoj ne aperu almenaŭ en la „oficiala" parto de la recenzo, t.e. en la referencoj de la recenzata verko: tamen ankaŭ tie aperas malĝustaĵoj: Puŝkin estas indikita kiel aŭtoro, kaj aperas (do triafoje!) la indiko: „trad. el la rusa...", kiu estas elpensaĵo de s-ro Korĵenkov.

La sola mencio, kiu efektive aperas sur la eldonaĵo estas: „laŭ Puŝkin". Tiu esprimo simple signifas, ke mi inspiriĝis pli rekte de Puŝkin ol de Tirso de Molina, Molière, da Ponte, Byron, Lenau aŭ aliaj. Se mi ne uzus tiun mencion, estas probable, ke iu ajn kompetenta kaj malica recenzanto malkovrus la fonton kaj akuzus min pri plagiato. Sed s-ro Korĵenkov demonstris, ke li eĉ ne komprenas la esperantlingvan vorton laŭ. Li eĉ montris, parolante pri „ducgoninaza Don Gonzalo d'Ulloa", ke li havas neniun scion pri la verko de Tirso de Molina!

Rezultas el tio, ke nur unu frazero en lia recenzo havas ian rilaton kun la pritraktita temo: „Videble s-ro Duc Goninaz intencis verki sian propran scenaron...". La cetero fontas el miskompreno, kiu randiĝas kun malhonesteco.

Pro tiu grava kaŭzo mi petas la redakcion de Hungara Vivo publikigi mian ĉi-supran reĝustigon kaj proteston.

Michel DUC GONINAZ

Tro pretendema recenzisto

Bernard Golden pri „Dum nokta deĵoro"

En n-ro 5/87 de „Hungara Vivo" aperis akra recenzo el la plumo de Bernard Golden pri la libro de Nevena Nedelĉeva „DUM NOKTA DEĴORO", eldonita de HEA en 1987.

La tono de l' recenzisto estas neniiga. Tiu tono de senkompata prokuroro rilatas tamen ne nur la recenzitan libron, sed ankaŭ ĉiujn verkojn en Esperantujo, kiuj ne indas trovi lokon inter la klasikaj verkoj de la originala Esperanta literaturo.

Sendube, la motivoj de l' recenzisto estas tre noblaj. Li deziras vidi en la Esperanta libromerkato nur verkojn altnivelajn laŭ enhavo kaj stilo, verkojn de talentaj aŭturoj. Kiu ne dezirus la samon?

Sed ĉu en la Esperanta literaturo abundas klasikaĵoj? Kaj kiamaniere atingi tre altan nivelon de niaj Esperantaj originalaĵoj?

Respondon al tiu demando ni trovas en la artikolo de Vilmos Benczik, konata esperanta literaturisto, publikita en n-ro 1/88 de „Budapeŝta informilo" sub la titolo „Belartaj konkursoj de UEA". Jen eltiraĵo de ĝi:

„Literaturaj konkursoj en la naciaj literaturoj plej ofte klare apartiĝas laŭ tio, ĉu ili celas la jam sukcesintajn verkistojn kaj poetojn, aperigintajn jam plurajn librojn, aŭ „kaŝitajn talentojn", kiuj ĝis nun entute ne sukcesis ankoraŭ aperigi siajn verkojn. Belartaj Konkursoj en Esperantujo celas ambaŭ tavolojn: oni bezonas la partoprenon de jam famaj verkistoj, kaj oni deziras oferti eblojn famiĝi al novuloj.

(...) la nombro de la konkursaĵoj ne estas aparte granda. Konsentite, la kvalito ne dependas nur de la nombro, tamen la spertoj montras, ke kvalito povas naskiĝi nur el kvanto. POVAS sed ne nepre naskiĝas, sed sen kvanto plej ofte ĝi CERTE NE naskiĝas. Tial estus dezirinde, se la partoprenantoj de la diversaj brancoj plumultiĝus" (majuskligo de la aŭtoro).

Al tiuj pensoj oni povus aldoni multajn aliajn, kiuj tuŝas la saman problemon en la naciaj literaturoj de ĉiu lando (la tiel nomata „griza torento" – ne altnivelaj publikaĵoj, tre multnombraj kompare al la elstaraj verkoj).

Oni facile povas konstati, ke la vojo al alta literatura nivelo ĉu en la naciaj libromerkatoj, ĉu en la Esperanta librorikolto, estas dornoza, neantaŭvidebla, ofte surpriza. Speciale en la Esperanta originala literaturo aktivas aŭtoroj de ne tre prestiĝaj libroj.

Laŭ mi, Benczik estas prava en sia pritakso de la celo de Belartaj Konkursoj de UEA. Neniu scias anticipe el kiu arbusto elsaltos la leporo. La kritikistoj en Esperantujo devas agi kiel bonaj, paciencaj ĝardenistoj, kiuj patrece flegas la etajn kreskaĵojn kun la espero, ke maturiĝinte almenaŭ kelkaj el ili atingos altan nivelon.

Ekzemplon pri tio donas la ukraina verkistino Nadija Andrianova, recenzante en „Bulgara Esperantisto" la saman libron kiun Golden terure frakasas. Ŝi atenteme rilatas al la aŭtorino Nedelĉeva, emfazante la pozitivajn flankojn de ties rakontoj kaj teatraĵetoj, montrante ankaŭ negativaĵojn, kiujn Nedelĉeva devas forigi porestonte.

Mi rememorigas ankaŭ pri tio, ke multaj rakontoj de Nedelĉeva estis premiitaj en kelkaj eksterlandaj konkursoj (Italio, Hispanio, k.a.).

Ni estu realistoj en la pritakso de la Esperanto-literaturo. Dum longa periodo ankoraŭ ni nombros perfingre la famajn originalaĵojn. Sensaciaj sukcesoj en tiu sfero apenaŭ surprizos nin. Certe estos necesa nova centjaro – la dua – por rikolti pli dezirindajn verkojn, kiuj inde reprezentu nin eĉ antaŭ la nacilingva publiko, atingante ĝin en koncerna traduko.

Nikola Aleksiev

Kaptitoj de pasinteco

István Gáll: Obsedita de l' suno, trad. Vilmos Benczik, HEA 1986. 186 p., 21 cm. Serio Hungara Literaturo n-ro 2. Prezo: 16,50 ned.gld. (Por Hungario 65,-Ft.)

Jen verko, pri kiu mi tuj devas diri: la Esperanta literaturo riĉiĝis per io konsterne majstra. Obsedita de l' suno de István Gáll (1931-1981) prezentas fortan travivaĵon. Ĝi plene katenas la leganton, defias lin aktive rilatigi sin kun ĝia problemaro. Do, oni ne miru, se por iel eskapi la preman senton, kiu restas persekuti onin post la legado, oni ne trovas alian eskapon ol ekrelegi. Kiel la romanpersonoj restas kaptitoj de sia

historio, same tiel la leganto fariĝas kaptito de la romano. La verko skuas kaj obsedas.

La kovrila ilustraĵo de Klára Papp simbolas la temaron de la verko: du sunoj, unu nigra pro eklipso, la alia ore brila sed tamen ombrata de du nuboj, unu minace nigra, la alia esperplene blanka. La tempa spino de la romano etendiĝas tra tri jardekoj: ekde la militfina faŝismo tra kirliĝoj de stalinismo ĝis la konsolidiĝo en la sesdekaj jaroj. Tamen, la tumulta kaj kontraŭdira historio de la nuntempa Hungario kreas nur la fonon. Temas pri tio, kiel en tiu ĉi granda kaldrono disvolviĝis la persona historio de la rolantoj.

Homaj tragedioj aperas antaŭ ni. Ne sufiĉis transvivi la mornajn jarojn, kiam regis la leĝo de nigro kaj blanko kaj kiam multaj revoj kruele pereis. Ankoraŭ jarojn poste, kiam unu duono de la popolo jam pardonis al la alia ĝian ekribelon kaj tiu ĉi lasta al la unua sian enprizonigon, la memoro pri ĉio spertita fantomas en la mensoj semante amaran skeptikon, en kiu nova entuziasmo ne plu ekĝermas.

„Mi kompatas nin ĉiujn. Ni estas malfeliĉa generacio. Trifoje oni knokaŭtis nin. Tio estas neforgesebla. Ĉar kiam ni forgesos la militon? Neniam. Kaj la kvindekajn jarojn, la personkulton? Neniam. Kaj la aferojn de la jaro kvindek ses? Neniam, neniam. Por ni ĉio realiĝis alie, ol ni prirevis tion. Eĉ niaj geedziĝoj... En la kvindekaj jaroj estis grandaj ebloj, sed ni ne eluzis ilin. Ni elektis ĉiam la pli malfacilan vojon..."

La ĉefpersono estas Jula, edzino de la nun 40-jara Roĉjo. La vivo de Jula estis funde tragika, ŝi viktimiĝis ĉe ĉiuj turniĝoj de eventoj kaj ĉiam sen propra kaŭzo: dum la milito pro sia raso, ĉe ekanta stalinismo pro sia patro, en kvindek ses pro sia tiama edzo. Roĉjo siaflanke estis bonŝanca en tiuj krizaj tempoj. Hazardaj cirkonstancoj savis lin de enplektiĝo en la eventojn. Kvankam ja ankaŭ li devis atesti ĉion okazantan, lia rolo de bonŝanculo ebligas, ke li nun juĝas la evoluon sufiĉe ekvilibre. Li konscias, ke simplaj klarigoj ne ekzistas. „Ĉar ĉio fariĝis tro komplika, oni devus komenci la klarigojn tre antaŭlonge. La vero havas multajn vizaĝojn – li komencas kompreni kaj toleri ankaŭ tiajn aferojn, kiajn antaŭe ne."

Pli ol la propra pasinteco, Roĉjon turmentas la sorto de Jula, „ĉar ŝi estas por mi la historio". Ĉar la sorto favoris lin mem, li sentas apartan respondecon pri sia edzino, li volas helpi ŝin, porti ŝin pluen, fari por ŝi ĉion, por – kvazaŭ nome de la socio – rekompenci al ŝi ĉion, kion ŝi senkulpe suferis. Sed lia strebado ne atingas ĉe Jula tian reeĥon, kian li deziras. Eĉ male; Jula troige, spite eĉ la eltenivon de sia fiziko, strebas esti si mem, sendependa. „Antaŭe oni prijuĝis min ĉiam kun konsidero al aliaj personoj." Tio okazis kaj en bono kaj en malbono: oni persekutis ŝin pro aliaj personoj kaj eĉ al la universitato ŝi estis akceptita pro Roĉjo, fidela partiano. „Nun finfine mi devas mem garantii pri mi mem!"

Sed eĉ se Jula volas forpuŝi la memoron pri ĉio, kion ŝi travivis, ŝi ne sukcesas. Nokte la pasinteco reaperas kaj premsonĝo torturas ŝin. Sed ĝi turmentas ne nur ŝin: ankaŭ la dormo de Roĉjo fuŝiĝas. Kaj jen, kiel Gáll solvis la formon de sia romano. Ni atestas unu plian fuŝitan nokton de Roĉjo, kiu ne kapablas reendormiĝi kaj bildoj el pasinteco komencas elruliĝi en lia kapo: sen kronologia ordo, laŭ asociacioj aperas homoj, lokoj, okazintaĵoj kaj scenoj, kiujn la aŭtoro brile kunplektas, finante la tuton per kulmina ĉapitro, en kiu Roĉjo lime de dormo kaj maldormo preskaŭ samtempe vidas-pensas ĉion, kion elvolvis liaj rememoroj – kvazaŭ la longa filmo de la romano reruliĝus kun fulma rapideco.

La sukceson de la forma konstruo apogas la lingvo. Ne nur en la klimaksa fino, sed ĉie tra la verko regas la sento, kvazaŭ oni ne estus leganta sed pelata antaŭen laŭ la kura fluo de la teksto. István Gáll ricevis en Vilmos Benczik interpretiston, kiu virtuoze rekreis en Esperanto ne nur la lingvaĵon sed ankaŭ la spiriton de lia verko. Se mi dirus, ke la verko „legiĝas kiel originalo", tio sonus tro pale...

Obsedita de l' suno estas trapenetrita de profunda humanismo. Ĝi estas forta protesto kontraŭ ĉia subpremo kaj mistrakto de la homo. Sed ĝi mesaĝas ankaŭ, ke la pasintecon oni ne povas supervenki forpuŝante la memoron pri ĝi, ĉar tiel farante oni riskas, ke la koŝmaro revenos – kaj ne nur en sonĝo.

* * *

Gratulon al HEA, ke ĝi eldonis en Esperanto tiun ĉi modernan verkon. Legi ion ĉi tian estas vere refreŝige, ĉar tiom ŝime malmoderna estas nia traduka beletro! Ni pensu ekz. pri la anglalingva literaturo. Kial damne oni daŭre proponas novajn tradukojn el Ŝekspiro, dum eĉ frazo ne aperis el Hemingway, Steinbeck, Salinger, Greene, Lessing ktp. ktp. lo funde putras ĉi-kampe.

Osmo Buller

Japanio el alia vidpunkto

KOBAYASI Takizi: La 15a, marto, 1928. Romano. Tradukis el la japana NUKINA Yositaka. Eldonis Japana Esperanta Libro-Kooperativo. ISBN 1-11-46-204. 13x18 cm, 109 p.

La direkto de interesiĝo de okcidentanoj pri Japanio firmiĝis stereotipa: tekniko, moroj, pli frua historio. Ĉi tiu libro kondukas la legantojn sur „novan" terenon: en la sorton de japanaj sindikatanoj komunistoj, falintaj viktimoj de la grandskalaj arestoj far la kabineto Tanaka la 15an de marto 1928.

Spertaj gvidantoj, simplaj manlaboristoj, movadaj novicoj kaj intelektuloj, aliĝintaj pro diversaj motivoj kaj sur variaj vojoj al la laborista movado, do vasta gamo de aktivuloj estas kondukita en la arestejon de urbo Otaru. Kiel ili reagas al la abrupta nokta aresto, karceraj cirkonstancoj kaj drastaj pridemandoj kaj – kio same interesas – al la ambigua konduto de policanoj-provosoj, kiuj farinte sian labordevon refariĝas ethomoj, zorgantaj pro la longe nevidata familio kaj inklinaj eĉ striki pro la trolongiĝinta deĵoro – jen la iom magra suĵeto de la romano.

Kobayasi protagonistigas ĉiutagulojn kun proprecaj, grizaj zorgoj por la familio aŭ tiaj individuaĵoj, kiel la ĉiutagaj cigaredoj; sed samtempe troviĝas io en ili, la konscio de la socia maljusteco, kio levas ilin super la samspecanojn. Tamen ĉi tiuj homoj kondutas nature, regiĝas de ordinaraj afliktoj kaj timoj, malhavas iajn ajn eksterajn trajtojn de heroismo.

Watari ekzemple, la sperta laborista funkciulo trafurzas sian ĉelon, kaj rideksplodas, kiam envenanta policano haltas frapite de tio. Kaj nelonge post tio, kun la sama natureco li gigantiĝas heroo, kontraŭstarante ne-por-homajn torturojn.

La vivproksimeco de ĉi tiuj figuroj ne estas hazarda. Elveninta el malriĉa kamparana familio, studinta per subteno de sia onklo kaj fariĝinta bankoficisto, Kobayasi aktive partoprenis la subteran kaj laŭleĝan laboristajn movadojn, ĉefrolis en la avangarda artkritika vivo, konis bone la sindikatanojn, arestitajn la 15an de marto 1928 en Otaru. En la sorto de ĉi tiuj homoj li cetere antaŭdesegnis sian propran, ja post kvin jaroj li same viktimiĝis al polica perforto.

Inter la unuaj li obeis al la apelo de Kurahara Korehito, konulo de la sovetia socialisma realismo pri novtipa, neburĝa realismo, kaj kreis iun el la unuaj soc-realismaĵoj de la japana literaturo per sia „La 15a, marto, 1928". Li uzas tre simplan, senpatosan lingvaĵon; la frazoj fluas kviete, senpasie, sed la vicigitaj bildoj kaj faktoj kreas intensan enan ardon, kiu ne lasas malatenti la leganton. La Esperanta traduko aperis kiel iu el la unuaj sen cenzuraj forstrekoj el la postlasaĵo de Nukina Yositaka, konata vortaristo kaj tradukisto. Eble ĉi tiu fakto – la manko de retrorigardo – klarigas la neglataĵojn de la traduko: la epitetojn kun netroveblaj rilataĵoj: „ricevi tiajn ĉi", la nekonsekvencan uzon de pluralo ĉe

po unu apartenaĵo de pluraj personoj: „virinoj en varmaspektaj manteloj aŭ kun lana ŝalo", la malnovisman troelmeton de „ĉi", la nemotivitan elipson de rekta objekto, la neglektojn ĉe akordigoj: „ili tute ne komprenas la kialon esti metita ĉi tien" kaj la nekonsekvencan interpunkciadon, kiu obeas nek la PAG-ajn proponojn, nek la ŝpareman Okcident-Eŭropan uzon.

La tipografia elformado de la libro estas modela, artisma, konforma al la enhavo, kun nur kelkaj preseraroj.

La libro sukcese malkaŝas plian anguleton de la por ni daŭre mistereta japana realo.

József Kiss Horváth
(Hungario)

Bardo de la revolucia proletaro

Ĥristo Smirnenski. TRA LA VENTEGO. Elektita verkaro. Tria kompletigita eldono. – Sofia: Sofia-Pres, 1986. – 143 p. – 23 cm. Prezo por Hungario: 50,- forintoj.

Ofte oni konsideras la junajn homojn nematuraj, kiuj devas ankoraŭ kreski, aĝiĝi, saĝiĝi antaŭ ol oni povos paroli pri ili serioze. Ĉu estas vere tiel? Ĉu la plej grandaj ideoj kaj verkoj ne naskiĝis ofte ĉe junaj homoj? Ludoviko Zamenhof kreis la bazon de sia internacia lingvo estante 19-jara, finpretigis 26-jara, publikigis 28-jara. Miĥail Lermontov pereis nur 27-jara. Ĥristo Smirnenski mortis nur 25-jara. Ili restis senmortaj.

Ĥristo Smirnenski 1898-1923) estis flama revolucia poeto, kiu levis la proletan poezion sur altan nivelon. Lia inspiro estis la Oktobra revolucio en Rusio, liaj herooj estis sovetaj kaj germanaj revoluciuloj, bulgaraj laboristoj. Lia poezio estis vera poezio. Jen la unuaj versoj, per kiuj komenciĝas lia libro; ilin verkis 22-jara poeto de la ekspluatataj amasoj:

> Ni ĉiuj estas idoj de la patrino-ter',
> sed fremda estas ŝia nutrantan mam' por ni
> kaj en la rond' kapturna de la surtera viv;
> avidaj pri radi', ni mortas en mizer',

Nemultaj estas la versaĵoj de la libro, sed ĉiuj pasiaj kaj konsekvencaj.

La libro enhavas ankaŭ iom da mallongaj prozaĵoj. Ilia ĝenro estas malfacile difinebla, sed ili memorigas romantikajn verkojn de la juna Maksim Gorkij.

La plej bonaj fortoj de la bulgara Esperanto-literaturo kunvenis por traduki la libron de Ĥristo Smirnenski. Ili faris tion ne vane.

Boris Kolker
(Sovetio)

Nuraj faktoj

Pirlot, G. La oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo. – Rotterdam: UEA, 1985. – 32 p. – (Esperanto-dokumentoj; 20 E)

Esperanto-dokumentoj de UEA traktas, ĉefe, diversajn aspektojn de la interligva problemaro, Esperanton kiel solvon de tiu problemo, ankaŭ laboron, organizon, kulturon kaj historion de Esperanto. La dokumentoj aperas en Esperanto, en la angla kaj franca, laŭeble ankaŭ en aliaj lingvoj.

Ankaŭ la instruado de Esperanto ne restas ekster la atento de la dokumentoj. UEA jam la kvinan fojon aperigas la rezulton de la statistika laboro de Germain Pirlot pri la situacio de la oficiala Esperanta instruado en la mondo. La kompilinto prezentas detalan raporton pri la universitatoj kaj samrangaj institutoj, en kiuj Esperanto estas instruata. Ĝin kompletigas informoj pri la ŝtataj leĝoj aŭ dekretoj ebligantaj instruadon de Esperanto en lernejoj.

G. Pirlot sukcesis ricevi informojn el 39 landoj. Laŭlanda priskribo de la ebloj kaj formoj de la instruado evidentigas, ke Esperanto oficiale instruatas en 114 kursoj (universitataj kaj instruistaj) en 22 landoj. Estas interese, ke la averaĝan kvanton de kursoj – kvin – superis Ĉinio (32 kursoj), Usono (15), Pollando (13), Sovetunio (8), Hungario kaj Bulgario (po 6). Eblas rimarki ligon, kvankam ne tro striktan, inter la oficiala instruado kun la Esperanta aktivado en koncerna lando.

Nur en kelkaj kursoj en Ĉinio Esperanto estas instruata devige; ĉiuj ceteraj kursoj estas libervolaj – Esperanto elekteblas apud aliaj fremdlingvoj. Daŭro de la kursoj tre varias: de duona ĝis kvar jaroj, pleje oftas unu- kaj du-jaraj kursoj.

En lernejoj Esperanto estas instruata fakultative (Aŭstrio, Bulgario ktp.), en interes-rondoj (GDR, ĈSSR k.a.) kadre de sociaj aktivaĵoj (Francio, Belgio, Japanio), Krome, en multaj landoj lernejestro povas decidi pri enkonduko de Esperanto, se instruisto haveblas (Usono, Nov-Zelando, Britio k.a.). Fine de la broŝuro oni trovas diagramon, kiu montras la evoluon de la instruado. Estus interese vidi ankaŭ la laŭlandan tabelon kaj aliajn. Iom ĝenas la terminologio, preferindus pli unueca klasifiko. Eblas fari glosaron. En tio la kunlaborantoj povas helpi.

Ĝi estas utila libro. Kaj por tiuj, kiuj okupas sin pri instruado de Esperanto en universitatoj, kaj por la cifer-ŝatantoj – ja fidindaj statistikaj esploroj estas maloftaj en la medio de esperantistoj.

Halina Gorecka

Romano pri netipa faŝisto

István Nemere: Sur kampo granita, Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1987. (dua eldono). 127 p. Prezo: 15,- ned.gld. (Por Hungario: 60,- forintoj.)

István Nemere estas unu el la plej sukcesaj kaj produktivaj verkistoj esperantlingvaj. En 1983 lia originala romano „La blinda birdo" kaj en 1985 „La monto" ricevis la premion „La libro de la jaro". Premante en la manojn la romanon „Sur kampo granita" la leganto, do, rajtas ekspekti kelkajn horojn da ekscita kaj postulema distriĝo.

La libro kontentigas tiujn dezirojn. „Sur kampo granita" baziĝas sur fakta evento: en 1968 en Munkeno estis senmaskigita katolika pastro, kiu dum la dua mondmilito kiel leŭtenanto de la germana armeo en itala monta vilaĝo ordonis mortpafi kamparanojn. La aŭtoro iom ŝanĝis la historion. La heroo de la libro ne estas katolika pastro. Martin Dregger laboras kiel ĉefoficisto ĉe la Ruĝa Kruco en Ĝeveno. I. Nemere priskribas, kiel la heroo engaĝiĝas por savi homajn vivojn – ĉu dum inundoj en Azio, ĉu dum sekecoj en Afriko aŭ post tertremo en aliaj lokoj de la mondo. Lia tasko estas helpi al homoj suferantaj mizeron, fari bonon. Des pli konsternita la leganto estas, kiam li ekscias, ke tiu Dregger estas serĉata militkrimulo. Dum la dua mondmilito li havis sian bazon en malgranda itala vilaĝo. Tie li – la reprezentanto de la malamika okupada armeo – komence provas amikiĝi kun kelkaj vilaĝanoj, li eĉ amon inter tiea knabino kaj si opinias ebla; li penas pri boneco, pri „neŭtrala" rilato. Ke tio absurdas, fariĝas klara, kiam partizana grupo ilin atakas kaj la germanaj soldatoj ekkaptas vilaĝan familion, kiu helpis al vundita partizano. La leŭtenanto Dregger – parte pelita en seneliran pozicion fare de ambicia suboficiro, sed parte ankaŭ konscie ĉar timante pri la propra vivo – ordonas mortpafi la tutan familion. Kiam la gazetaro senmaskigas lin post pli ol 20 jaroj, li propravole prezentas sin al la polico. Antaŭe, tamen, li veturas al la itala vilaĝo por restari vidalvide al la ĉeestintoj. Li ne intencas peti pardonon aŭ veki

kompaton; lia celo estas montri al ili, ke li fariĝis alia homo.

La aŭtoro per Dregger ne prezentas tipan fašistan leŭtenanton. Pli karakterizan konduton de la germanaj fašistoj — Auschwitz, Lidice, Oradour, Coventry — l. Nemere nur gvidvorte aludas. Tio šajnas al mi legitima; la scion pri tiuj eventoj li povas premisi. La demando, per kiu la romano pensigas la leganton, estas: ĉu hodiaŭa bono povas forgesigi iaman kulpon?

La lingvaĵo de l. Nemere estas en la kutima maniero flua kaj riĉa je metaforoj kaj komparoj. Altira kaj animskua la romano fariĝas precipe per la aranĝo de diversaj temponiveloj kaj la rakontado en la unua persono. Pro sia lingva kvalito kaj la enhavo aktuala ĝis la hodiaŭa tago „Sur kampo granita" en la originala Esperanto-literaturo multvaloras, kaj prave ĝi eniris la „Bazan Legoliston de la Originala Esperanta Literaturo", kompilitan de W. Auld.

D-ro Sabine Fiedler
(GDR)

Ni amiku kun BONVOLU

Bradburne, E., Vollen, K. Feliĉa familio: Kolora bildlibro Tradukis el la angla V. Ošlak. — Luzern: Caux Verlag, 1983. — 56 p., il.

Kio ĝi estas — ĉu fabelo, historio, rakonto? Ne! Plej šajne estas aboco, gramatiko de homaj interrilatoj. Mi ankoraŭ neniam renkontis porinfanan libron en tiom simpla maniero, kie nur dank' al unu pluma streko antaŭ vi aperas ridetanta hometo BONVOLU, plia streko — kaj ekridetis la domo, vizitita de la bona homo. Kiel bone kaj facile oni ekfartas kun la hometo BONVOLU kaj liaj bonaj helpantoj „Gajaj lampiretoj". Kial? Jen ja: la bildoj paĝon post paĝo venigas nin al la konvinko, ke se vi kondutos laŭ la konsiloj de l' bonkora hometo, vi kaj viaj proksimuloj vivos pli bone, pli ĝoje. Jen estas liaj konsiloj: helpu, amiku, donacu, ridetu. Kaj se tia homo vizitis vian hejmon, la infano ne timos dormi nokte, neniu restos en soleco kaj la vivo aperos pli agrabla.

Sed ekzistas ankaŭ alia hometo DONU. Kion do konsilas tiu tipo kun malkontenta mieno? Vekhorloĝo sonoras — dormu ankoraŭ iom; puŝu aliulon, prenu la plej grandan pecon. Ankaŭ liaj „amikoj" estas similaj: MINEKULPAS, PLENDULOJ, TABANO TEDULO, ŠKARABO BALBUTULO. Provu aŭskulti ilin, sekvi iliajn konsilojn kaj jam frakasinte taseton vi kontraŭvole asertas: „Mi ne kulpas", vi grumblemas, plendas pri l' sorto. Jen ankoraŭ unu „amiko" CIMO ENUIGULO — kaj ĉio ĉirkaŭe iĝas griza kaj enua. Kia, do, estas via hejmo, se tia koterio vizitas vin? Jen kiel... plorinde

aspektas la domo. Ĉu vi plu volas amiki kun DONU?

Prefere ni amiku kun BONVOLU, ofte diru „bonvolu" kaj „pardonu", helpu unu la alian, zorgu pri la proksimulo, levu humoron — kaj via domo ekridetos, la tuta strato ekridetos. Kaj se ĉiuj kuniĝos, ankaŭ la Teron lumigos rideto, kaj malnobluloj malaperos. Fakte, mi rerakontis la tekston, sed praktike mi nomis ĉiujn edukajn celojn de l' verko — jen ili pentritas, rigardu, eĉ legi ne necesas — ilustre, simple kaj neordinare. Kvankam la libro estas destinita por infanoj, ĝi estas interesa por ĉiuj aĝoj. „Renkonsciiĝu, avĉjo! Ĉu vi amikiĝis kun PLENDULO?". „Kaj vi, ĉarmulinjo, ĉu en via poŝo sidas ŠKARABO BALBUTULO?". „Ne amiku, kara knabo, kun MINEKULPAS". „Kio malhelpas vin feliĉigi ne nur vian domon, sed ankaŭ viajn straton kaj urbon?"

Estas interesa ankaŭ la aranĝo de la libro. Ĝi estas universala, ĉar la teksto ne estas presita en la libro, sed sur apartaj folioj, kiuj folioj evidente aperis jam plurlingve kaj mi tenas la Esperantan version de vere internacia libro. Avantaĝas, ke via infano mem partoprenas en librofarado, gluas slipon kun teksto sub la konforman bildon, kaj la libro pretas — legu, eduku, edukiĝu.

Natalia *Talankina*

Tradicia fabelo

Magia peniko: Fabelo. Trad. el la ĉina kaj adaptis Han Šing; Il. Li Šiĝji. — Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. — 39 p., il. Prezo por Hungario: 40,-forintoj.

Ĉiu popolo havas siajn fabelojn, kie bonaj herooj uzante propran kuraĝon kaj lerton kaj foje „magiajn ilojn" venkas malbonon, savas kaj feliĉigas same malriĉajn, sed honestajn homojn. Ankaŭ en la infanlibro „Magia peniko" ni konatiĝas kun tiaspeca ĉina fabelo: hela kaj optimisma.

Knabo, frue perdinta la gepartojn, devis sin vivteni per kolektado de brulligno kaj herboj. Malriĉo ne permesis al li lerni pentroarton ĉe pentristoj. Sed Ma Ljang — nia protagonisto — kun admiro rigardis la ĉirkaŭon kaj pentris tion sur sablo aŭ sur ŝtonoj. Reveninte vespere hejmen li ripetas la samon sur la muroj. Sen havi penikon li uzas jen arbobranĉon, jen pecon de lignokarbo. Post kelkjaraj ekzercoj la bildoj de Ma Ljang fariĝas versimilaj. Kaj iufoje la maljuna bonkora magiisto donacas al la knabo penikon. Kaj nun ĉiuj bildoj de Ma Ljang viviĝis. Kiom da ĝojo li alportis per sia pentrado al la samvilaĝanoj donacante al ili la plej bezonatajn objektojn.

Oni ne povas longe teni la sekreton. Pri la magia peniko sciiĝis ankaŭ la loka riĉulo. Sed lia provo perforte preni la penikon ne sukcesas, ĝi servas nur al bonaj homoj. Do, la mandareno devas jam afable peti: „Mia bona infano, bonvolu pentri por mi monerdonan arbon". Kaj la „bona infano" šajniginte konsenton rericevas la penikon. Li eĉ pentras la menditan arbon, sed sur insulo meze de vasta maro. La monavida mandareno surŝipiĝas kun la tuta familio kaj subuloj kaj impetas al la insulo, postulante pli kaj pli fortan venton... La furioza maro prenas en sian profundon la avarulojn.

Kaj nia heroo denove donacas ĝojon al homoj. Bona, simpatia fabelo. Precipe interesa ĝi estas por 5-9 jaraj infanoj, dum la kolorriĉaj ilustraĵoj plaĉos al ajnaĝa esperantisto.

La strebo realigi la revon — lerni pentri, laboremo, kompato al homa malfeliĉo, malavareco, amo al la naturo, kuraĝo kaj eltrovemo — tiujn trajtojn ni plezure edukus en niaj infanoj. Kaj la fabelo „Magia peniko" helpos nin ĉe tio. La lingvaĵo de l' teksto sen esti tro komplika, tamen sukcesas ne veni al primitivo.

Natalia *Talankina*

GAJA PAĜO



Dum ekzameno...

ĉarma junulino estas vane demandata pri mitologio de epopeoj.

– Bonvolu diri fraŭlino almenaŭ tion, kiu estis la unua viro?

– Pardonon, sinjoro profesoro – indignas ŝi ruĝvizaĝe – tio estas ja mia privata afero, aŭ ne?

Al ŝi okazis ...

kiam junulo dum dancado prezentis sin kaj ekbalbutis: – Ne atendu, fraŭlino, amindumadon miaflanke! Mi rekte demandas: ĉu jes aŭ ne?!

– Ho, kion mi povus respondi? Jes! Sed nur tial, ĉar vi sukcesis tute persvadi min...

Kaj la plenaĝuloj?

Edzo sincere konfesas hejme al la edzinjo:

– Hodiaŭ la ĉefo terure ekkoleris kontraŭ mi, kaj fine li kriis – imagu – ke mi iru al la diablo!

– Nu, kaj kion vi faris?

– Kion mi faru? Tuj mi hejmenvenis.

Sed ne ĉiam!

– Restu amiko, restu! Kial vi forkuras?

– Mia edzino atendas min kun vespermanĝo...

– Nu, almenaŭ tiun glaseton... plua kvaronhoro jam ne gravos...

– Kia kvaronhoro? Ŝi atendas min kun la hieraŭa manĝo.

Aŭ? Aj!

Sinjoro Montekala gaje babilas inter amikoj, kaj fanfaronas:

– Se paroli pri miaj plej belaj aventuroj, dankeblaj al la filmoj...

– Neniam ni aŭdis – iu interrompas – ke vi tiel ŝatas la filmojn!

– Ho, ne mi, sed mia edzino...

Nekredeble

– Eva, ĉu vi vidas tiun sinjoron ĉe la drinktablo? Imagu, li havas 3 milionojn!

– Nekredeble! Nun, monatfine?

Nekredeble?

– Kion skribis tiu postulema ulo en la gastlibro? – demandas la ĉefkuiristo la kelneron.

– Nenion – eĉ ne unu vorton. Sed la stekon li gluis al la gastlibro.

Ĉarlatanaĵo?

„Granda ĉarlatanaĵo... Deknaŭ viktimoj!" – kriegas surstrate gazetkolportisto. Pasanto kolere riproĉas lin:

– Ĵus mi aĉetis vian gazeton, sed eĉ unu vorton ĝi ne skribis pri tio!

– Grandioza ĉarlatanaĵo! – krias denove la kolportisto. – Dudek viktimoj!

Iluziaĵo!

– Kredu, kara najbarino, ke mia edzo adoras min, kaj eĉ dum laboro li pensas ĉiam pri mi.

– Tre verŝajne! Mi vidis lin senpolvigi la tapiŝon...

Iluziaĵo?

– Diru Petro, ĉu vi havas ian pasion?

– Kompreneble, Paŭlo! Mi ege ŝatas kanti sub la duŝo.

– Interese! Kaj kion vi kantas prefere?

– Dueton.

Kaj fine

– Bonan vesperon, fraŭlino, ĉu mi povas hejmen veturigi vin?

– Per tiu aŭto? Nu bone. Kie vi loĝas?

Ervin *Fenyvesi*

El la verkaro de Francisko Szilágyi

ni citas kelkajn titolojn en la ĉefaj linioj de nia enigmo (Horiz.2,41, kaj 77.; Vertik. 1, 2, 40, kaj 45. — ensendendaj linioj). Inter la solvintoj ni lotumos premiojn. Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Horizontale: 2. Majstronovelo de F.Sz., la unuan fojon aperinta en Literatura Mondo, 13. Pika ilo de ŝuistoj, 14. La unua virino laŭ Biblio, 15. Paŝu internen! 16. Rampulo, lacertulo. 17. Romia polihistoro, verkisto (Marcus Terentius), 19. Nivelo de domo(R), 20. Bonodora daŭrafolia arbusto, kuracplanto(R), 21. Malbonodora toksa gaso, 22. Ligo de ŝatoj(R), 23. Parto de molekuloj(R), 25. Fosaĵo por renversi bastionon, 26. Vegetaĵ' el la kruciferacoj, 27. Maŝino por suprenlevi akvon, 29. Elektre ŝargita formo de atomo(R), 30. Tro fervora en religiaj devoj(R), 31. DJ, 32. Reen: speciala vazo(R), 34. Denove viziti, 36. Respekto pri mortintoj(R), 38. Reen: produkti valoran(R), 39. KL, 41. Romano de F.Sz. 43. Persona pronomo, 44. Eŭropa ĉefurbo, 46. Frakcio(R), 47. Konsonantoj de vesto, 48. Oficiala esplor', 51. Kontraŭa, 53. Tri... tri = naŭ, 55. Muzika verko, 56. Vagonaro trafikas sur ĝi, 58. Mamulo neparhufa(R), 60. Cent — en pluraj slavaj lingvoj, 61. Senhara, 63. Infinitivo por nedifinita ago. 64. Plurfoje, 66. Prepozicio, 67. Konforma al realo(R), 68. Soldata taĉmento, 70. Akcidenta malfunkcio, 72. Purigi ejon(R), 73. Dolĉa frukt', 75. Ne eksa(R), 76. Mitologia estaĵ' — anĝel', 77. Titolo de novelo de F.Sz.

Vertikale: Titolo de lia poemo, 2. Lia novelo, 3. Insularo inter Alasko kaj Kamĉatko, 4. Universitata titol', 5. Femalo, 6. Prefikso, 7. Ekzistantaj, 8. En areo de floroj, 9. Prepozicio, 10. Interne, 11. Aranĝo de kultaj ceremonioj(R), 12. Reton teksanta artikulo, 17. Reen: eldanĝerigi(R), 18. Sufikso de medicino, kemio, 24. Rezidej' de registarano, 26. Ŝelo de kinarboj, 28. Reen: nia globo, 30. Eŭropa ĉefurbo, 33. Parto de inaj seksorganoj(R), 35. Plende krii, 36. Litero por iu neracionala nombro, 37. Delikata odor', 39. Antaŭnomo de Marx, 40. Lia novelo, 41. Ne vin, 42. Havena konstruaĵo, 45. Antaŭnomo de detektivo Biro en H.41. 49. Tuto de monsumoj kaj produktiloj(R), 50. Ago ion movi al si, 52. Prepozicio, 54. Larĝa strat', 57. Post la sepa, 59. Nekristaliĝinta(R), 60. Enhavanta arĝentecan metalon, 62. Kara, mola ŝtofo(R), 65. FP, 66. Konjunkcio, 69. Reen: membro, 71. Kiel H.14. 72. Alvoki dian favoron(R), 74. Konsonantoj de plendo, 76. Komenco de V.39.

I.Z.



Solvo de la krucenigmo en la numero 1988/4:

Pro li ekploras naturo, besto / nubo kaj tero
Kaj bardoj mirakante lin gloras.

(Hristo Botev, tr. Ivan Dobrev)

Premion gajnis per lotumado:
S-ro Cvi Löwenkopf, Maagan, Israelo; s-ro Medgyes Béla, Budapeŝto, H; s-ino Biruté Trimakienė, Kapsukas, Litovio SU.

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes

Terra

de István Nemere

La plej nova sciencfikcia romano de Nemere kondukas en foran estontecon, kiam la homaro vivos en la kosmo kaj jam forgesos eĉ pri sia naskoplanedo.

1. Kion signifas la mallongigoj MUT kaj GUT?
2. De kiu instituto estis la prezidanto profesoro Siderus?
3. En kiu jaro okazis la reformo de stelatlasoj, kiam oni ŝanĝ is la kosman koordinatan sistemon?

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvo de la demandoj en la n-ro 1988/1:

1. La kosmonaŭtoj de la ŝerco estis Sergej, Volodja kaj Helen.
2. La heroino de „Dum nokta deĵoro" laboris en telefoncentralo.
3. Oni festis la 50-jaran jubileon de Esperanto-societo „Hela estonteco".

Premion gajnis per lotumado: s-ro Jakub Šamšiev, Samarkando, Uzbekistano SU; s-ino Roma Thorsen, Kopenhago, DK. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Korespondi deziras

Katrin Malich (25) oficistino ktm, pĉt. Scharfenberg OT-Gruben 49, GDR-8251. — Miroslav Smišek (27) vendisto kun gehungaroj, pri H-ujo, literaturo, poemoj, filmoj; kol. bk. Sokolov Engelsova 1534, CS-356 05. — Blanka Faltynková (40) flegistino ktm, pĉt; kol.bk, pm. Predmérice n.L. Skolská ul. 321. CS-503 02. — Inĝ. Valentin Genĉev (26) fraŭlo pri historio, sporto, vojaĝoj, mod. muziko; kol bk, ins. moneroj. Sofia Krasno selo 215, vh. E/96. BG-1680. — Dainius Pranauskas (22) med. studento, kun samaĝuloj, pri muziko, medicino, foto, tradicioj; interŝ. pk, libroj, E-aĵoj. Vilnius str. Putnos 9-78, Litovio SU-232.042. — S-ino Janina Pugzlienė (44) ktm, pri E-movado, naturo, turismo; interŝ. bk, prosp. k.a. Panvėzys Statybininkų 3-28. Litovio SU-235.300. — Bogdan Grajek (21) oficisto, pri filatelo, historio; kol. pm, bk. Lubcz 24. PL-88-421. — F-ino Maria Teres Pazur instruistino de angla, ridema, revema, respondos al revemuloj nepre. Goleniow Zawadzkiego 90/6 PL-72-100. — Inĝ. Aleksandr Vajsberg (47) kun artoŝatantoj, filatelistoj, pk, Eo. Murmansk Monĉegorsk, ab.k.53, SU-184.280. — Lernantino Marina Ŝmigirilova (17) kaj laboristino Elena Mironenko (18) el urbo Nikolaev, prosp. Lenina 171/30, ktm, pri muziko, lit. historio, foto, lingvoj; kol. bk, ankaŭ A, G, Ĉ, PL lingve. SU-327.055. — Teknikisto Stanislaw Ĉuprinski (26) en karbominejo, pri turismo, psikologio, vivmanieroj. Pavlovice ul. Gorniča 9c/5, PL-43-250. — F-ino Danuta Deryn (27) librotenistino, pri turismo, alpinismo. Czestochowa ul. Obraniaka 35m13. PL-42-200. — Veterinar-studento Krysztof Kisielowski (21) kun vegetaranoj, pri turismo, filozofio, psikologio, biologio. Wroclaw ul. Lompy 21/4. PL-50-308. — Studento Piotr Cymerman (25) eklernis hungare; pri lingvoj, kulturoj, historio, vojaĝoj; interŝ. E-libroj k.s. Wodzierady Marianów 11. PL-98-105.

— Laima Meiĵiene (37) oficistino en blindul-metiejo, pri kulturaj objektoj, kantonotoj, libroj, popolkutimoj, E-aĵoj k.s. Kaunas V. Vitkausko 28-37, Litovio SU-233.031. — Bonifacijus Kasperiunas (50) ktm, preferas ĉasadon. Druskininkai a.d. 12. Litovio SU-234.690. Ewa Zarowska (29) flegistino pri turismo k.a. Bytom Odr. str. Widok 2, PL-67-115. — Lernanto Slawomir Kesy (19) pri turismo, sporto, Eo; kol. pm, bk, sondisko. Otorowo 96, PL-64-551. — Alicja Tabor (27) flegistino, pri sporto, muziko, filatelo. Krzeszowice ul. Dluga 8/10. PL-32-065. — Pavel Jacka (36) patro de du infanoj ktm, pĉt, serioze kaj persone konatiĝi. Kroméríz Havlíčkova 3887, CS-767 0l. — F-ino Ĝiuginta Malukaite (19), pri muziko, arto, geografio, lit. Palanga J. Janonio 8-1, Litovio SU-235.720. — Jelena Dydykina (19) studentino de agrokulturo, ŝatas ĉevalsporton, muzikon, lit. Ivanovo Blagova 42-20. SU-153.022. — Galina Kuznecova (21) ktm, kun gekomencantoj. Ivanovo prosp. Lenina 98-51. SU-153.004. — Liceano Elzbieta Podemska (17) pri div. temoj. Lask ul. 22-Lipea 16/15, PL-98-100. — Lernantino Justyna Bator (18) pri pop.muziko, lit., turismo; kol. bk, kaj fotojn de muzikgrupoj. Mielec ul. P. Skargi 13/26. PL-39-300. —

E-Klubo Freŝa Vento volas amikojn el tm por 20 komencantoj. Gurjev pk.35 Avangard-3. Kazaĥstano SU-465.027. — E-Klubo „Orienta Avangardo" en Kamĉatka ĉefurbo — div. profesiuloj (16 — 55 j.) pri div. temoj, interŝ. E-aĵojn k.s. — adr. klubfondinto: Andris Natinj Petropavlovsk-Kamĉ. bulv. Ribackoj Slavi 3-10. SU-683.024. — Vladimir Ĵuravlov (28) instruisto kaj 10 lernantoj (10-13) pri div. t. el Krasnojarska rajono. Zelededevo ŝkola N.26. SU-662.070. — Elvira Malyhina (24) pediatro, pri turismo, kuirado, kalend. Krasnojarsk per. Vuzovskij 16-83. SU-660.025. — Viktor Karev (28) komputisto, pri junularo, fantasto — samadrese ges-anoj (elektristoj, studentoj k.a.) pri div.t. Krasnojarsk p.k. 2420. SU-660.075.

LETERKESTO

Gaston Waringhien, Parizo, F: En via lasta letero ni plezure legis la racian rifuzon de la radikrimoj; kaj same vian mildan komprenon — tamen ne akcepton — al rusaj esperantistoj, kiuj „sub insida influo de la patrina lingvo lasis sin trompiĝi pro tiu rusa fonetika apartaĵo". Certe en nia lingvo, tute male, la finaj vokaloj havas ja gravan sencan valoron, sekve ili ne estas „estingeblaj", oni devas ilin sufiĉe klare prononci. — viaj reagoj pri „enhavo riĉa kaj interesa" de H.V., ne malofte kun laŭdoj (Sonetkrono de A.B.Ĵuravlov „unuaranga"; teknikaj paĝoj „paŝantaj al grava tereno", k.a.) ĉiam stimulas nian redakcion, kiu dankas pro la zorga atento kiun vi — grandmerita eksa prezidanto de nia Akademio — dediĉas al nia revuo.

Boris Glozman, Zaporoĵe, SU: Ruslingva revuo „Znanije-Sila" (Kono estas forto) en sia februara numero publikigis — kun kolora ilustraĵo — la novelon „Arrividerci Roma" de György Moldova. La redaktoro ne preterlasis atentigi, ke ĝi estis tradukita el Esperanto, kaj li transprenis ĝin el niaj revuo-paĝoj. Denove utila afero por nia lingvo, kaj ni amike dankas vin pro tiu informo.

Artur Arteev, Siktivkar, SU: El la ĉefurbo de la Komia ASSR ni ricevis vere ĉarman fabelon, verkitan de nia juna — 17-jara — leganto. Ĝia titolo: „Verdaj steletoj" jam aludas al la interpaciga rolo de Esperanto inter — la steloj. Ni sugestas al vi, dankante la verketon, pluan progreson en nia ŝatata lingvo.

Liljana Dokova, Sofio, BG: En nia n-ro 1987/6, p.218, ni esprimis la deziron, ke la tie publikigita „Jubilea festkanto por Esperanto" — premiita en la Belartaj Konkursoj kaj prezentita en Varsovio dum la jubilea Kongreso — estu ankaŭ alifoje, ofte kantata. Kun plezuro ni ricevis la informon de nia legantino, ke la Sofia Esperanto-Ĥoro en majo, je sia dekjara jubileo dum solena koncerto prezentis ĝin en Sofio. Mem la komponisto, Dimitâr Terziev direktis la ĥoron, kiun cetere li fondis kaj delonge gvidas. Verŝajne similaj informoj venos ankaŭ de aliaj Esperanto-aranĝaĵoj, daŭrigontaj la sukceson de tiu bela kaj inda muzikaĵo.

Igor Antipov, Ĉehovsk, SU: Ni bonorde ricevis vian solvon — feliĉe, ĝi montriĝis ĝusta. Cetere ni ege bedaŭras, sed ni povas utiligi sole la Esperanto-abocon, do bonvolu venonte atenti tion, sendante al ni ian kontribuaĵon. Akceptu salutojn!

E HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik * Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan McGill, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro György Nanovfszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk * H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELIR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. *
Indexszám: 25 377 0018-7704, ISSN 0018-7704.

Készült a MÉMMI sokszorosító üzemében, Gödöllő — 186/88



TRAKIS
BUDAPEST



INDUSTRIAJ RENTGENAPARATOJ SERVAS LA SENDIFEKTAN MATERIALTESTADON

La ĉefaj karakteriziloj:

- **Malgrandaj formato kaj pezo**
- **Facila-simpla manipuleblo**
- **Fidindeco**
- **Malaltaj prezoj**

TRAKIS
BUDAPEST

H-1441 Budapest
Pf. 46
Telefono: /36 1/ 221-459
Telekso: 22-4730

Beton- kaj Ferbeton-industria Entrepreno BVM prezentas sin al la estimata legantaro de nia revuo sur la pagoj 150 kaj 151



BVM®

Beton- kaj Ferbeton-industria Entrepreno
Budapest XI., Budafoki út 209.
Telefono: (36 1) 613-810,
Telekso: 22 -4877